

Antonietta Bernardoni

# La ĉiutaga vivo kiel historio

sen timoj kaj sen psikiatrio

Tradukis al Esperanto Alessandra Madella kaj Luigia Oberrauch



ILEI



Antonietta Bernardoni

**La ĉiutaga vivo  
kiel historio  
sen timoj kaj sen psikiatrio**

Antologio de eseoj  
fare de la kolektivo Antonietta Bernardoni

Kun prefaco de  
Ahmad Reza Mamduhi, Prezidanto de ILEI

Tradukis al Esperanto  
Alessandra Madella kaj Luigia Oberrauch

ILEI  
Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj  
2023

El la itala originalo “La vita quotidiana come storia senza paure e senza psichiatria” eldonita de Edizioni ETS Pisa, kiu afable disponigis la rajtojn, tradukis al Esperanto Alessandra Madella kaj Luigia Oberrauch.

Papera versio: ISBN 978-2-940665-02-0  
Reta versio: ISBN 978-2-940665-02-0

© 2023, ILEI - Internacia Ligo Esperantistaj Instruistoj  
por la eldono en Esperanto

Kunlaboris por la presado la eldonejo Edistudio ([esperanto@edistudio.it](mailto:esperanto@edistudio.it))

Itallingva originala eldono:

© 2018, Edizioni ETS, Pisa, Italujo, represita en 2021  
Edizioni ETS, Palazzo Roncioni, Lungarno Mediceo 16, I-56127 Pisa  
[info@edizioniets.com](mailto:info@edizioniets.com), [www.edizioniets.com](http://www.edizioniets.com)  
ISBN 978-884675111-9, ISSN 2420-840X

## Komuniko de la redaktoroj

Nia kolektivo “Antonietta Bernardoni” konsistas en grupo de homoj, kiuj atente sekvis la esplorojn kaj agadojn de kuracisto Antonietta Bernardoni dum kelkaj jardekoj.

Nia kontribuo limiĝas al la verkado de biografio.

Por eviti kiel eble plej multe niajn proprajn aldonadojn aŭ interpretojn de ŝiaj pensoj, ni limigis nin al kolektado de notoj, de ŝi nomataj “eseoj” (inkluzive de la antaŭparolo), simple klopodante kunigi ilin.

Ĉi tiu teksto estas fragmenta kolekto de kelkaj notoj, kiujn Bernardoni skribis en malsamaj tempoj kaj en diversaj situacioj. Ŝi faris tion dum la mallongaj paŭzoj de sia intensa praktika laboro celanta ebligi al homoj en malfacilaj situacioj, konsiderataj persone kaj psikiatre gravaj, ne deprimiĝi antaŭ la malfacilaĵoj de la vivo kaj konservi aŭ trovi sian lokon en la lukto por pli justa socio.

Nia apudmeto de notoj sendependaj unu de la alia klarigas la nesisteman naturon de ĉi tiuj skribaĵoj, ĉar la rakontoj de la kuracisto baziĝas preskaŭ ekskluzive sur la vivspertoj de viroj kaj virinoj, kiujn ŝi helpis reekzameni sian personecon. Tio klarigas ankaŭ la foreston de citaĵoj de aliaj aŭtoroj.

Komence de ĉiu ĉapitro troviĝas resumo indikanta temojn, konceptojn, ideojn, notojn de pripensado de Bernardoni, por reliefigi ilin en la teksto. Ni volis provizi al la leganto ilon por trovi en la enhavo de ĉiu sekcio de la volumo specifajn interesajn temojn.

Ĉiuj dokumentoj de la arkivo Bernardoni estas fizike deponitaj kaj konsulteblaj ĉe Centro Studi Movimenti, via Saragat 33/a, 43123 Parma (PR), Italio, <http://www.csmovimenti.org/>; retpoŝto: [centrostudimovimenti@gmail.com](mailto:centrostudimovimenti@gmail.com)



# Biografio

## Antonietta Bernardoni (1919-2008)

Bernardoni estas konata – ne nur en Italio – ĉar ŝi metis la resanigajn procezojn de la tiel nomataj mensmalsanuloj en la centron de sia esplorado kaj pro sia radikala kritiko al psikiatrio, psikanalizo, psikologio. Tiel ŝi antaŭenigis la publikajn debatojn pri Populara Terapio Agado kaj la konstruadon de “antrop-evolua malalienado”, nova scienco, laŭ kiu en la kampo de homaj rilatoj ĉiuj povas iĝi esploristoj kaj sciencistoj.

Ŝia laboro vekis grandan intereson, konsenton kaj partoprenon, sed ankaŭ fortajn rezistemojn. Ŝi naskiĝis la 2-an de novembro 1919 en Montese (Modeno), kie ŝi mortis post longa malsano en 2008. Pasia pri homaj sciencoj kaj medicin-sciencaj studoj, ŝi unue akiris diplomon pri beletro kaj filozofio ĉe Universitato de Florenco kaj poste diplomigis pri medicino kaj kirurgio ĉe Universitato de Modeno.

Ŝi partoprenis en la itala partia batalo.<sup>1</sup> Ŝi estis instruistino, kuracistino, terapistino, esploristino. Forte kritika pri la nuna soci-ekonomia sistemo, ŝi konstante aludis al la laborista movado kaj ĝiaj organizoj, precipe al Itala Komunista Partio (PCI).

Jam en 1939, kadre de filozofia kaj “psikologia” esploro farita ĉe la Instituto pri Psikologio de Universitato de Florenco – la sola tiam ekzistanta en Italio – Bernardoni komencis “detruan kritikon de psikanalizo kaj psikologio, kiel iloj de homa scio”.<sup>2</sup>

En 1949, kiel medicina studentino, ŝi havis sian unuan kontakton kun psikia-

---

1. Cfr. ANPI di Modena (a cura di), Irma Marchiani Il commissario Anty, Cooptip, Modena 1985.

2. Bernardoni, *L'Attività Terapeutica Popolare*, Cooperativa Tipografi, Modena, 1976, p. 28.

trio. Tiam ŝi disvolvis malfidon pri la terapiaj kapabloj de tiuj, kiuj devus instrui al ŝi kiel koni kaj resanigi “malsanojn de la animo”. Prefere ŝi vidis en iliaj intervenoj procezon de truda kuracado kaj psikiatrigo. Ĉi tiun malfidon akompanis ŝia “malkovro de la terapiaj kapabloj de ĉiuj, kiuj ne vivas per ekspluatado aŭ kontraŭbatalado de aliaj homoj kaj kiuj, do, ne havas intereson kaŝi la veron en ĉiuj aspektoj, precipe rilate al realaj kaj konkretaj interhomaj raportoj”.<sup>3</sup>

Malaprobante la tradician aliron al tiel dirita “psikiatria” sufero, Bernardoni komencis labori por la transformo de la konkretaj situacioj, en kiuj troviĝas la persono kun malfacilaĵoj. Ŝi laboris komence private – per individua terapio – kaj poste publike, per la Populara Terapio Agado aŭ PTA (itale, Attività Terapeutica Popolare aŭ ATP) de ŝi mem kreita.

Profesoro Angiola Massucco Costa, tiam direktoro de la Supera Instituto de Socia Psikologio en Torino, difinis ĉi tiujn du fazojn de la esplorado respektive kiel la unuan kaj duan segmenton.

Ŝia privata terapio (unua segmento) konsistis en originala, radikale nova terapio. Ĝi okazis kun la sistema partopreno ne nur de gepatroj kaj geparencoj, sed laŭeble ankaŭ de amikoj, laborkunuloj aŭ lernejanoj, eĉ kontraŭuloj de la persono en malfacila situacio.

En ŝia terapio, la kreo de helpgrupo estis centra. Ŝi ne multe pripensis la simptomojn de la subjektoj en terapio, sed prefere analizis la disvolvan potencialon de iliaj interhomaj rilatoj, iliajn interagajn manierojn kaj vivon, iliajn projektojn kaj la koherecon kun ilia mondovizio. Tiamaniere ŝi preparis la vojon por eblaj senkondiĉigaj procezoj kaj nova lernado.

Ĝis la nasko kaj disvolvo de PTA, Bernardoni ĉiam multe hezitis paroli pri la terapio, kiun ŝi praktikis. Ŝi timis, ke “de tia terapio povus naskiĝi ‘nova lernejo’, sen la falsaĵoj kaj la neraciismo de psikiatrio, psikologio, psikanalizo, sed tamen ankoraŭ lernejo, kiu rajtus trakti problemojn, kiuj – en la foresto de primaraj aŭ sekundaraj lezoj ĉe la centra nervosistemo – ne vere estas problemoj je medicina signifo [...]. Ŝi estis tre konscia, ke necesis nek nova psikiatrio nek nova medicina lernejo, sed pli bona organizo, ĉiutaga kaj interhoma, de popola solidareco”.<sup>4</sup>

La dua fazo de ŝia esplorado (dua segmento) prenis la formon de Populara Terapio Agado, en kiu helpo ne plu estis donata de D-ro Bernardoni sed de publika asembleo de PTA.

En la unua periodo, la kuracistino partoprenis kaj mem gvidis la asemblean debaton. Sed poste ŝi intence sindetenis en sia partoprenado por pli bone permesi al la asembleo mem kolektive, reciproke kaj egale ekzerci stimulon por la person-

---

3. *Same*, p. 147.

4. Archivio Centro Studi Movimenti (ACSM), Parma, / Antonietta Bernardoni / , koverto 28 “convegno Fondazione Pinna Pintor”, fasc. 4 “Primo e secondo segmento (terapia individuale e ATP)”.



eca kresko de ĉiu, sen delegi ĝin al iu ajn anstataŭanto, inkluzive de ŝi.

Populara Terapio Agado ne estas resaniga medicina agado, sed nova formo de preventa populara agado de libera, kolektiva, konkreta, daŭra, kaj reciproka naturo. Ĝi havas kiel celojn la sciencajn studadon de personeco, antaŭenigon kaj transformadon de la vivokvalito kaj interhelpon inter la ekspluatataj.<sup>5</sup>

Jam antaŭ la Populara Terapio Agado, Bernardoni publike kreis grupon kontraŭ la timoj, ene de Eduka Kunlabora Movado de Modeno, kies kunvenoj okazis ĉe la loka Laborista Ĉambro. Ŝi donis tiom da praktikaj kontribuoj en tiuj okazoj, ke la komenca Modena grupo de la eduka movado al kunlaboro baldaŭ fariĝis nacia grupo de Movado por la Eduka Kunlaboro (aŭ MCE-grupo) por la socia mastrumado de mensa sano.

Same antaŭ la kreo de PTA, Bernardoni, kune kun aliaj, organizis publikajn kunvenojn pri “kvartalaj homaj rilatoj” ĉe kvartalo S. Faustino de Modeno.

Pro siaj multnombraj rilatoj kun la scienca, akademia kaj politika mondo, la partopreno en konferencoj kaj kongresoj, la kontribuoj al la soci-sanigaj programoj de iuj provincoj kaj regionoj ŝi pli malpli longe restis ankaŭ en Florenco, Milano, Torino, Parma kaj aliaj italaj urboj.

Ŝi verkis:

- La salute mentale: lettera a un metalmeccanico (Mensa sano: letero al metalisto), Tipografio Dal Cin, Conegliano, 1973.
- La psichiatria contro la scuola (Psikiatrio kontraŭ lernejo), Eldonejo M.C.E., Conegliano, 1975.
- Psichiatria senza futuro (Psikiatrio sen estonteco), Eldonejo Linea, Padova, 1975.
- L'attività terapeutica popolare (Populara terapio agado), Cooperativa Tipografica, Modena, 1976.
- Multnombraj mimeografoj verkitaj kaj disdonitaj ĉe konferencoj.

---

5. Prelego dum la konferenco pri Gramsci “Scienze dell'uomo e trasformazione della società”, Florenco 10/11/75. ACSM, Parma, / Antonietta Bernardoni /, koverto 3 “1975”, fasc. 11 “novembre 1975”.



## Prefaco

Mi elkore esperas, ke la eldono de tiu ĉi interesa libro fare de la nova estraro de ILEI helpas por malfermi novan vojon al la verkado kaj tradukado por disvastigo de konoj, pensoj kaj spertoj pri edukado fare de interesigantoj en la tuta mondo. Eble multaj tiaj verkoj – kiel la nuna libro – unuavide kaj laŭŝajne ne estas rilataj al instruado kaj lernado, sed fakte povas ege helpi al la persona evoluado de i.a. instruistoj kaj lernantoj.

Jardekoj antaŭe, en printempa granda libro-ekspozicio en la plej vasta parko de Tehrano, mi ekrimarkis, ke ĉirkaŭ duono de la libroj estas memhelpaj aŭ sin-helpaj verkoj – ĉu tradukitaj ĉu originalaj! Tio klare montras, ke ni homoj ja ne estas robotoj, sed estaĵoj multe emociaj kaj fragile delikataj, kiuj forte bezonas la psikajn kaj mensajn helpojn.

Se paroli pri la verkinto de la nuna verko, d-ino Antonietta Bernardoni, certe temas pri avangarda virino, kiu tiel kuraĝe kontraŭparolis jam establitajn sciencojn kiel psikiatrion, psikologion kaj psikanalizon. Interesa aspekto de ŝia skolo estas tio, ke la paciento traktiĝas ene de siaj ĉirkaŭuloj – ĉu parencaj, ĉu amikaj, ĉu eĉ malamikaj. Mi vidas tion kiel holisman econ de ŝia aliro en ŝia metodo. Ja kiel multaj tion esprimis, la homo estas sociema kaj interago inter ĉiu homo kun la aliaj estas grandskale efika sur ambaŭ partioj.

Alia aprezinda aspekto de ŝi estas tio, ke ŝi ne deziris estri aŭ fari ĉion mem persone kaj intence faris aliajn gvidantoj de la terapiaj sesioj. Tio estas karakterizaĵo de sukcesaj iniciatintoj, kiuj kune kun prezentado de sia novaĵo, provas eduki ankaŭ aliajn personojn, kiuj povus daŭrigi la aferon eĉ post ili – laŭ mi, temas pri grava sekreto por daŭripovigi sian novan vojon.

Iam plej multaj homoj estis kontraŭ ĉio ne tute laŭ la ĉeftendenca scienco, sed nun, probable post kiam unuflanke la pilieroj de tia scienco iom ŝanceliĝis ĉefe sekve de kvantumfizikaj eltrovoj, kaj aliflanke “nesciencaj” skoloj iel science esprimis siajn principojn, jam multaj homoj pretas apertamense aliri senantaŭjuĝe ankaŭ ne strikte akademiasajn praktikojn, metodojn kaj eltrovaĵojn.

Kiel William James (1842-1910), por-Esperanta usona filozofo, montris per sia pragmatismo: tio, kio praktike funkcias bone, ne povas esti facile malagnoskebla. Verŝajne la vero ne apartenas tute al iu specifa homo, pensmaniero, skolo, k.s., sed ĉiu disponas nur pri parto aŭ parteroj de la vero. Eble nia tasko nunmonde estas kunmeti tiajn vererojn kiel puzlerojn unu ĉe la alian por kompletigi la tutan bildon de la vero. Feliĉe la nuna epoko estas tempo de interdisciplinaj kaj holismaj aliroj al diversspecaj problemoj. Ja tiaj aliroj pli kapabligas nin por percepti la kompletan formon de la elefanto en mallumo.

Kiam ILEI, kiel ligo de instruistoj, eldonas tian verkon, ja iel agnoskas tian novigan aliron ne nur al mensa aŭ psika kuracado, sed ankaŭ al novaj kaj nekutimaj pedagogiaj aliroj. Laŭ mi, originalaj pedagogiaj libroj iam havas specialan lokon en Esperantujo, ĉar nia lingvo certe havas tre distingajn diferencojn relative al la etnaj lingvoj. Certe, se instruado de Esperanto estas ĝuste kiel instruado de la etnaj lingvoj, tio povas en multaj kazoj rezulti al tre malfacilaj kaj temporabaj instruado kaj lernado. Dum, ekzemple speciale preparitaj lecion-planoj por instruado de Esperanto povas esti multe pli efikaj, ĉar ili for de komplikaj kaj ne-logikaj de la etnaj lingvoj, rekte kaj senprobleme transigas Esperantajn trajtojn kaj karakterizaĵojn al la lernantoj.

Probable, en la nuna epoko, instruistoj devas ne sufiĉigi al nuraj metodologio, instrumaterialoj kaj aliaj similaj aspektoj de siaj kursoj, sed bezonas pli atenti ankaŭ al la (inter)homaj aspektoj de la instruado kaj lernado. Do, nun bezonatas pli inkluzivema pedagogio, kiu ekzemple rekomendus ankaŭ pri:

- Ĉu vere mallaŭta aŭdigado de – precipe baroka – muziko dum la klaso plimultigas la lernivon de la lernantoj?
- Ĉu komforta sidloko, kiu ne lacigas la sidantajn lernantojn dum la relative longaj klasesioj, povas helpi al pli bona atento kaj lernado.
- Kiom estas la optimuma daŭro de ĉiu klasesio – kaj por instruisto kaj por lernantoj?
- Kia lumo pli taŭgas? Ĉu taglumo aŭ artefarita lumo? Ĉi-kaze kiakolora?
- Kia etoso pli helpas al bona lernado: ĉu tro serioza aŭ iomete ŝercema? Ĉu en amikema etoso kaj dum ridetado nia memoro pli bone funkcias?
- Ĉu ĉion diru la instruisto detale pri ĉiu gramatika aŭ semantika punkto, aŭ nur helpetu al la lernantoj, por ke ili mem eltrovu tion? Verŝajne la dua estas pli efika, ĉar en seminario pri instrumentoj mi aŭdis, ke ili provis ege diversajn manierojn por vidi kiu maniero estas pli efika, i.a. ili eĉ utiligis elektrajn ŝokojn! Kaj la fina rezulto estis tio, ke lernantoj pli profunde kaj pli resteme lernas, kiam ili mem ekeltrovis la punktojn! Do restas la demando: kiomelcentan parton de la koncerna punkto la instruisto diru aŭ induktu al la lernantoj, por ke ili mem eltrovu la celon?
- Mi memoras karan veteranan kolegon en arkitektura laborejo, kiu instruis al ni la francan kaj ĉiu-foje antaŭ komenci la sesion petis nin fermi la okulojn

por minuto kaj meditante refreŝiĝi por pli bone absorbi kion li volis instrui al ni – mi persone vere sentis la bonan efikon de tiuj unu minutoj. Ĉu ni rekomendu tion aŭ similan praktikon al instruistoj?

- Se temas pri ĉeesta klaso, kia estu la aranĝo de la seĝoj? Ĉu klasike la lernantoj sidu surbenke al la instruisto, kiu staras vidalvide al ili? Aŭ ronda sidado pli efikas? Ĉikaze, ĉu ankaŭ ronda tablo helpas?
- Ĉu kiam ajn lernantoj permesatu prezenti siajn demandojn, aŭ ili faru tion nur dum tempo, kiun la instruisto difinas?
- Ĉu sinhelpaj tekstoj – precipe tiuj, kiuj temas pri instruado kaj lernado – estas taŭgaj por Esperantoklasoj? Se jes, en kiunivela(j) kurso(j)?

...

Kaj nun, en nia ĉiutage pli virtualiĝanta mondo, ni vidu kiaj gvidlinioj povas helpi por pli-efikigo de niaj retkursoj. Ekzemple:

- Ĉu dum la klasoj ĉies kameraoj estu ŝaltataj ĝiseble? Tiukaze en kia(j) pozicio(j) oni povas aperi? Ĉu kuŝitaj permesatas? Kio pri manĝado?
  - Ĉu tekst-babilejo dum la klasoj funkcio aŭ oni malŝaltu tion por pli fokusigi la atenton de la lernantoj al la paroloj de la instruisto? Eble nur la instruisto povu skribi tie? Aŭ ankaŭ lernantoj sed nur al la instruisto kaj ne unu al la alia(j).
  - Dum la retaj klasoj, kiaj kondutoj kaj agoj ĝenas aŭ ĝojigas nin?
  - Ĉu registrado pli bonigas la kvaliton de la sesio? Ĉu la registraĵo de la tuta sesio estas publikigela/inda en la interreto? Aŭ ni kundividu ilin nur kun la koncernaj lernantoj? Aŭ ni publikigu ilin nur post modifado de la registraĵoj?
- Mi esperas, ke ILEI iam sukcesos prepar(ig)i libron aŭ libroserion pri sinhelpaj konsiloj por instruistoj kaj lernantoj, kiu akcelos la efikecon de instruado kaj lernado – ĉu por ĉeestaj, ĉu por retaj kursoj.

Mi ne povas fini la vortojn sen esprimi miajn specialajn dankojn al la kolektivo Antonietta Bernardoni pro la zorgoplena laboro por la preparado de la verko, same kiel al la tradukintoj de la libro, d-ro Alessandra Madella, la vicprezidanto de ILEI, kaj ŝia patrino, s-ino Luigia Oberrauch Madella, la sekciestro de ILEI en Italio, ilia traduko celas ankaŭ trovi esperantistojn el la tuta mondo, kiuj pretas traduki la libron en siajn naciajn lingvojn tra Esperanto.

Aprilo 2023

*Abmad Reza Mamduhi*  
Prezidanto de ILEI

Traduko de la flugfolio en la alfronta paĝo:

Kvartalo S. Faustino MODENA  
Strateto S. Faustino 35

ĉiumerkrede vespere je la 21a  
ĉiudimanĉe postagmeze je la 16a

POPOLA TERAPIA AGADO

- karakteroj: senpaga  
kolektiva  
konkreta  
daŭra  
reciproka
- objekto: scienca studo: pri homa personeco  
pri vivkvalito  
pri reciproka helpo inter ekspluatitoj
- celoj: plibonigo de la personeco de ĉiu individua laboristo  
promocio de la popola solidareco  
solvo de aldonaj aŭ eviteblaj konfliktoj per:  
kritiko  
memkritiko  
konkreta transformo de konkretaj situacioj  
senmaskado de falsajoj de la psikiatrio, psikanalizo, psikologio  
lukto por la realigo de la rajto al fizika kaj mensa sano, lukto farenda en  
strikta ligo kun laboristaj organizoj per:  
prevento de malsanoj kaj promocio de media sano  
disvastigo de la scioj rilate al la Supera Nervoza Aktiveco  
disvastigo de la scioj rilate al la sana kaj malsana homa korpo  
kunlaboro kun santeknikistoj kaj viglado de ilia agado
- ĉiuj, kiuj intencas labori por sia propra kaj aliula valorigo en vizio de la mondo, kiu proponu profundan transformon de la socio, estas kore invitataj partopreni.

Modeno, Pasko 1975

Multobligita ĉe Laŭra Barbieri, via Crispi 36, 41100 Modena

QUARTIERE **S. FAUSTINO** s.c. **MODENA**

ogni mercoledì sera ora 21  
ogni domenica pomeriggio ora 16

Stradale S. Faustino, 33

# ATTIVITÀ TERAPEUTICA POPOLARE

caratteri:

- gratuita
- collettiva
- serena
- continuativa
- reciproca

oggetti: • studio scientifico

- della funzionalità umana
- della qualità della vita
- del costo reciproco tra sfattati

finalità: • valorizzazione della personalità di ogni singolo lavoratore.

- promozione della solidarietà popolare
- soluzione conflitti "aggravati" e "artificiali" mediante
  - critica
  - autocritica
  - trasformazione concreta di situazioni concrete
- smarrimento delle falsificazioni della
  - psichiatria
  - psicoanalisi
  - psicologia

- lotta per la realizzazione del diritto alla salute fisica e mentale, lotta da condurre in stretto collegamento con le organizzazioni dei lavoratori malati
  - promozione attività e promozione delle solidarietà dell'ambito.
  - diffusione delle conoscenze relative all'attività lavoro-Signora.
  - diffusione conoscenze relative al corpo umano sano e malato.
  - collaborazione con i tecnici della salute e vigilanza sulle loro attività.

Tutti coloro che intendono operare per una valorizzazione propria ed altrui in una visione del mondo che si propugna una trasformazione profonda della società sono cordialmente invitati a partecipare!





# Antaŭparolo<sup>1</sup>

En ĉi tiu esploro rilate al aspektoj de ĉiutaga vivo kaj individua personeco, ni nur ekkomencis forigi iujn el la plej disvastigitaj antaŭjuĝoj celantaj konservi la ekzistantan staton de aferoj.

Tre ofte temas pri eraroj kaj antaŭjuĝoj ligitaj al falsajtoj de psikologio, psik-analizo, psikiatrio, “sciencoj”, kiuj neniel posedas la sekreton de homaj faktoj. Ni devas alfronti kontraŭulojn, kiuj povis profiti je jarmiloj de spiritisma kulturo kaj arto celantaj glori povon kaj evidentigi la malegalecon inter homoj.

[...] eĉ la plej bonaj esplorinstrumentoj ne kutimas analizi la tavolon de ĉiutaga vivo je la nivelo de interhomaj rilatoj, kiuj donas signifon al la vivo de la individuo kiel tia, ĉar je ĉi tiu nivelo la balasto estas pli forta kaj la postvivoj de la pasinteco estas obstinaj. Tiel oni ofte renkontas kamaradojn, kiuj, kvankam ili kapablas analizi la grandajn eventojn de internacia politiko, ne kapablas identigi kaj analizi la realajn kondiĉojn de familia konflikto kaj de statoj de neorganika sufero, de malkontento, de propra aŭ alies angoro. Do, ili ne povas antaŭenigi je tiu nivelo konkretan transformadon de konkretaj situacioj.

Estas alibio por ĉi tiu nekapablo, kiun ni ne akceptas: temas pri la aserto, ke tiujn problemojn nur psikologio, psikanalizo, psikiatrio kapablas solvi.

Sed ni ne akceptas ĉi tiun alibion. Ni forte reasertas hodiaŭ (parafrazante kaj plilongigante la deklaron de Georges Politzer, la juna marksisma psikologo mortpafita de la nazioj), ke nek psikiatrio, nek psikanalizo, nek psikologio iel detenas la sekreton de homaj faktoj pro la simpla kialo, ke ĉi tiu sekreto estas nek psikiatria, nek psikanaliza, nek psikologia. Nur historio povas malkaŝi ĝin.

La historio de ĉiu socio, kiu ekzistis ĝis nun, estas historio de klasbataloj [...] subpremintoj kaj subpremitoj ĉiam estis en konflikto unu kontraŭ la alia. Ili subtenis senĉesan lukton, foje kaŝitan, foje malkaŝitan [...].

Ĉi tiu aserto validas ne nur por la homaj faktoj, en kiuj milionoj da homoj estas implikitaj, sed ankaŭ por ĉiu formo de homa konflikto, je ĉiu nivelo. La lukto inter klasoj ankaŭ reflektiĝas je la nivelo de malgrandaj grupoj, eĉ je la nivelo de

---

1. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, koverto 47 “progetti libri”, fasc. 8, “La vita quotidiana come storia”.

intimuloj kaj eĉ ene de la sama individuo, kies “konscio” povas esti disŝirita per absorbado de kontraŭdiraj ideologioj.

Alivorte, la klasbatalo ankaŭ trapasas la unuopajn personecojn, kiuj ofte reprezentas veran batalkampon, en kiu la regantaj ideologioj (la hieraŭaj kaj la morgaŭaj) interbatalas sen reteni ian ajn frapon.

La ŝlosilo por interpreti ĉiutagajn problemojn estas la sama, kiu necesas por legi la eventojn, en kiuj partoprenas la grandaj homamasoj, kiuj faras la historion.

La personeco de la individuo ankoraŭ neniam estis studata per taŭgaj iloj, ĉar la nun uzataj iloj reprezentas la frukton de miljara tradicio de idealisma-spiritisma karaktero.

Ĉi tiu tradicio simple starigas la individuon kontraŭ la socio sen konsideri, ke la individuo – eĉ en sia biologia identigo kiel biologia objekto dotita de subjektiveco kaj kapabla konkeri altan gradon de memkonscio- reprezentas ligilon de sociaj rilatoj.<sup>2</sup>

Ĝis kiam ni ne komprenos, en la viva konkreteco de individuaj biografioj, por kiaj celoj kaj per kio la reganta kulturo proponas kaj trudas al ni iujn personecajn modelojn, perforte ekskludante la ne-konformajn, ni ne sukcesos fari la necesajn elektojn por kontribui al la nepraj ŝanĝoj por povi atingi la plej riĉan floradon de personeco, kiun niaj tempoj ebligas.

Neniu formo de edukado, kiom ajn rafinita kaj kompleksa, iam ajn povas anstataŭigi la larĝan spiron, la vastecon de la rigardo, la potencialon por kresko, kiuj nur povas utile formiĝi kiam la persono mem luktas por ŝanĝo. Ekster tiu lukto ne povas ekzisti vera formado de personeco, sed nur bagatela akiro de personaj kapabloj sen historia signifo kaj tial sen iu ajn homa grandiozececo. Temus nur pri vivoj de homoj, kiuj ne scipovus respondi la demandon: kial mi vivas?

Ili eĉ ne kapablas fari al si kaj al aliaj ĉi tiun bazan demandon, kiu reprezentas la stimulon, el kiu ekas la unuaj konsciaj vivaj elektoj.

Ĉi tiu socio ne ofertas eksplicitajn kaj malambiguajn respondojn al ĉi tiu demando. Ĝi estas tre ofte respondata ofertante al la junuloj esti konsumataj kaj perdataj (laŭ manieroj aŭ formoj de subpremo kaj ekspluatado, kun malsamaj privilegioj dependantaj de la apartenoklaso) en etaj konkursoj kaj konfliktoj. Sed ĉi tiuj surface kontentigas nur iliajn tujajn dezirojn kaj tial nur permesas al ili travivi, sed certe ne vivi laŭ la plena senco de la vorto. Tiu fakto kuŝas ofte ĉe la origino de la rifuzo de la ekzistanta mondo fare de la junuloj.

Sed la efikoj de la rifuzo de tio, kio ekzistas, estas tute malsamaj depende de la fakto, ĉu ĉi tiu rifuzo estas aŭ ne estas akompanata de politika perspektivo, de projekto pli granda ol ni mem, kiu permesas al ni aktive ligiĝi kun luktantaj homamasoj.

---

2. A. Bernardoni, *Psichiatria senza futuro*, La Linea, Padova, pp. 81-82.

Ĉi tiu rifuzo povas iĝi faktoro de individua kaj socia kresko nur se ĝi ne fariĝas pure individuisma netoleremo, sed parto de pli vasta lukto por la konkero de nova mondo.

Kvankam ni scias, ke ni ne povas hodiaŭ, en ĉi tiu socio, esti homoj de la estonteco, ni ne devas rezignacii pri individua, limigita, konkurenca personeco. Ni devas esti atentemaj, por ke tio ne okazu, dum je la ĝenerala nivelo ni okupiĝas pri la grandaj bataloj, el kiuj nia socio devos eliri radikale transformita. Ni, do, ne evitu okupi nin – je la nivelo de personeco, konduto, interhomaj rilatoj – pri la konsekvenca transformado de ni mem. Liberigante energiojn por pli grandaj bataloj, tio samtempe ebligas al ni esti, se ne homoj de la estonto, almenaŭ “homoj de la transiro”.

Fakte okazas tre ofte al ni malkovri, ke en nia ĉiutaga vivo ni mem kaj niaj kunuloj estas – je la persona nivelo – homoj de la nuntempo kaj, iusence, eĉ homoj de la pasinteco.

Kial eĉ tiuj, kiuj luktas por transformi la mondon, renkontas tiom da malfacilaĵoj por sin transformi, vastigi la limojn de siaj vivoj, detruji murojn kaj barilojn, kiuj malliberigas ilin, artefarite apartigante la personon de la politikisto?

Transformi sin kohere kaj konscie estas – pro la kontinua kondiĉado, kiu devenas de nunaj produktaj rilatoj kaj de la kulturo, kiu defendas ilin – tre malfacila tasko eĉ por tiuj, kiuj jam kohere kaj konscie batalas por transformi la socion.<sup>3</sup>

Klopodi identigi ĉi-nivelo la spacojn, kiuj hodiaŭ malfermiĝas por alternativa disvolviĝo de konkretaj homoj, reprezentas la celon de nia esplorado. Ĝi strebas havi scienca karakteron, kvankam ĝi certe ne volas esti sen politika pasio.

Ĉi tiuj verkoj celas instigi, ke ĉiu kamarado engaĝiĝu – laŭ maniero kongrua kun sia propra mondkoncepto – krom en la pli vasta kaj larĝaspira politiko, realigita de la grandaj laboristaj amasoj kaj de iliaj organizoj, ankaŭ en la eta ĉiutaga politiko de ĉiu momento. Ĝi devas esti antaŭenigita je persona, familia kaj grupeta nivelo de iu ajn, kiu intencas doni sian kontribuon al la kontraŭkapitalisma lukto. Tiu ĉi lasta devas esti batalata ĉiam – ankaŭ per kohera agado en tiu aparta mondoparto, en kiu ĉiu el ni kapablas efike interveni persone, laborante kun la plej proksimaj kamaradoj por “malkolonigi” – almenaŭ kiom multe eblas al ni hodiaŭ – la ĉiutagan vivon de la subpremado fare de la kapitalo.<sup>4</sup>

---

3. A. Bernardoni, “Lo specifico psichiatrico una frode”, en “Brescia Oggi”, 11 julio 1978, p. 3.

4. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, koverto 47 “progetti libri”, fasc. 8, “La vita quotidiana come storia”.

Neniu homa renkonto, kiom ajn mallonga kaj ŝajne sensignifa, estas neŭtrala: ĝi ĉiam lasas spuron.

Kiu ajn agas por transformi la mondon tiel, ke ĝi pli multe respondu al la homaj bezonoj, estas sciencisto kaj esploristo en la plej vera senco de la vorto. Tial li estas iniciatinto en si mem kaj en aliaj pri scio, kohereco, sekureco, iĝante efika fonto de mensa sano.

Male, kiu ajn havas intereson manipuli kaj falsigi realecon por eviti ĝian transformadon, konstituas daŭran fonton de ideologia misformo de la realo, de ne-direblaj interesoj traktataj subakve, de dubasencaj kaj kontraŭdiraj stimuloj. Tial li estas ankaŭ fonto de “mensa malsano”.<sup>5</sup>

Tiuj, kiuj vivas en momentoj de profunda socia ŝanĝo, nun pli kaj pli videbla en la tuta mondo, se ili havas la necesan politikan konscion por taksi la ŝanĝojn progresemaĵoj kaj por konscie partopreni en ili, sentas, ke ili kaj iliaj kunuloj estas ĉefroluloj en la transformado, kiel elemento de la homaj amasoj, kiuj moviĝas al la estonteco.

En tiaj kondiĉoj, ĉiutageco altiĝas al valoro de historio. En la ĉiutaga vivo agadas vivantaj kaj konkretaj homoj. Ĝi riĉas je aparte evidentaj, signifoplenaj sociaj ligoj daŭre transformiĝantaj.

La kapablo influi la realon, ligita kun persona kaj kolektiva politika konscio – en epoko, kiam ekzistas materiaj kondiĉoj por rapida ŝanĝo – estas la fonto de profundaj emocioj ligitaj al la konscio pri la ĝoja detruo kaj kolektiva kreo, kiu okazas sub niaj okuloj kaj kun nia plej intensa partopreno.

Ĉi tiu verko havas nenium alian celon ol doni humilan kontribuon al la ĉiutaga vivo kaj personan feliĉon de la batalantoj, sen povi influi, se ne treege limigite kaj nerekte, ilian kontribuon al la historio, kiu okazos sub la gvido de la laborista klaso kaj ene de ties organizitaj fortoj.<sup>6</sup>

*Antonietta Bernardoni*

---

5. A. Bernardoni, “Luce sul male oscuro”, en “Brescia Oggi”, 6 julio 1978, p. 3.

6. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, koverto 47 “progetti libri”, fasc. 8, “La vita quotidiana come storia”.

## ĈAPITRO 1

# La homo estas historia subjekto kaj biologia objekto

ĈU LA VIVO ESTOS MUZIKO?

Ĉu la vivo estos muziko?

Ĉu la vivo estos festo?

Estos, certe tiel estos, se ni  
ĉiuj kapablos diri: "Ĉesu".

1981

ACSM, Parma, / Antonietta Bernardoni /,

koverto 19, "Poesie a macchina" (Poeziaĵoj per maŝino)

## ENHAVTABELO

- Politiko kaj ĉiutaga vivo
- En la studo pri personeco...
- Kiel ni povas kompreni la rilaton inter individuo kaj historio...
- La kerno de individueco ĉefe konsistas ...
- Reala povo kaj ebla povo rilate al la kvalito kaj kurso de la vivo
- Nia ĉiutaga vivo
- La ŝanĝo de la medio nepre venas antaŭ la ŝanĝo de la subjekto
- Volo de ŝanĝo kaj iloj por ŝanĝi
- Kiel disvolviĝas homa personeco?
- Volo ŝanĝi
- Homa interagado neniam estas neŭtrala...
- La historia valoro de homa vivo...
- En la kampo de feliĉo...
- Ĉu la homo vivas nur per racio?
- La homa specio diferencas de la bestaj specioj
- La kampo de la instinktoj...
- Estas nenio pli neracia ol kontraŭstarigi racion kaj instinktojn.
- Ni ŝanĝiĝu hodiaŭ por la feliĉo de hodiaŭ kaj morgaŭ
- Kiel vi, ankaŭ mi okupiĝas pri historio

## POLITIKO KAJ ĈIUTAGA VIVO<sup>1</sup>

[...] La vivo de la individuo ne nur havas personan kaj familian signifon, sed neeviteble fluas en la grandan riveron de la historio.

Ni ĉiuj konstruas la historion: neniu el ni estas iam neŭtrala.

Ni ĉiuj efektivigas en ĉiu momento agon, antaŭenigante aŭ bremsante ĝian evoluon.

Se ni intence elektis praktiki – kune kun niaj kamaradoj – antaŭenigan agon sur la kurso de la historio, ni devas konscii pri la fakto, ke ĉi tiu ago estas efektivigata ne nur kiam oni batalas grandajn batalojn [...], sed ankaŭ en la ĉiutaga vivo de si mem, sia laboro, siaj personaj kaj familiaj korinklinoj.

Laŭ ĉi tiu perspektivo, ĉiu el ni senĉese devas preni pozicion antaŭ konfliktaj situacioj ligitaj – rekte aŭ nerekte – kun la klasa divido de la socio, en kiu ni vivas.

Tre ofte la granda konflikto estas vualita per ŝajna interkonsento, kun interklasa fono, kiu celas kaŝi antagonismajn klasajn interesojn, kiuj respeguliĝas je la nivelo de malgrandaj grupoj aŭ eĉ ene de la individuo.

Ĝis la sojloj de netolerebla transiro, la konflikto estas administrata de psikologio kaj psika “kulturo”, kiuj diras al ĉiuj, ke la veraj konfliktoj ne estas tiuj inter ekspluatataj kaj ekspluatantoj, sed nur tiuj generitaj de la komplekso de Edipo.

Alifoje la netolereblo de la ekzistanta stato estas kaŝita de la fakto, ke en multaj familioj, en multaj grupoj, en ĉiu loko estas unu aŭ pluraj homoj, sur kiuj koncentriĝas la malhumaniga efiko de ĉiuj ekzistantaj rilatoj.

Sed oni ja zorge volas kaŝi al vi, ke ekzistantaj rilatoj malhomigas vin: jen do – je ĉies trankviligo – la “socia” funkcio de la psikiatro, al kiu estas konceditaj oro kaj honoroj pro tiu sia kapablo “forigi la kulpon” de unuopaj homaj grupoj kaj de la kapitalisma sistemo.

La psikiatro – kiu forprenas pekojn de la kapitalisma mondo – trankviligas ĉiujn, ke la malfeliĉaj aferoj, kiuj okazas al la subjekto, devenas de ŝanĝoj okazantaj nur ene de la subjekto mem.

Neniu do respondecas: nek la posedanto, nek la produktaj rilatoj.

Nenio devas esti radikale ŝanĝita en ies vivo: maksimume la subjekto – se riĉa – devos sperti psikanalیزan traktadon kaj – se malriĉa – devos esti “resanigita” per elektroŝokoj, insulinŝokoj kaj psikotropaj drogoj.

La burĝa kulturo, en kiu psikanalizo kaj psikologio okupas lokon pli kaj pli grava, individue kaj kolektive efektivigas ĉiujn antaŭzorgojn en familia edukado kaj en lernejo, por ke oni ne rimarku la grandegajn sociajn maljustaĵojn, al kiuj ni partoprenas ĉiutage, ofte per vualitaj okuloj.

Ĉi tiu kulturo celas kaŝi aŭ almenaŭ minimumigi la ekspluatadon de homo fare de homo. Ĝi konvinkas la individuojn ekde infanaĝo, ke ĉiuj devas resti en

---

1. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 1, “Tesine la qualità della vita”.

la sama loko, ke “ni ĉiuj navigas en la sama boato” kaj ke estas en ĉies intereso, ke ĉiuj plenumu la funkcion, en kiun – atentu!-- la destino kaj ne la klasa divido de la socio metis ilin.

Sed burĝa kulturo povas esti efika nur se ĝi enradikiĝas en familian vivon kaj en ĉiutagan moralon.

Estas esence por la prizorgado de la kapitalisma sistemo, ke la edzino vidu kiel “natura” la fakton esti en la vasta plimulto de kazoj reduktita al la funkcio de hejma sklavo. Devas aperi “nature”, ke la infano tre ofte timas siajn gepatrojn. Devas ŝajni “nature”, ke la amo de infanoj al iliaj gepatroj miksiĝas kun malamo.

Temas pri la – ĉiutagaj kaj mikrosociaj – efikoj de la granda konspiro de silento, kiu celas kaŝi aŭ mildigi klasajn antagonismojn.<sup>2</sup>

11/5/1978<sup>3</sup>

**EN LA STUDIO DE PERSONECO** devas esti konsiderataj biologiaj aspektoj kaj sociaj aspektoj, kiuj dialektike interagas inter si. Fakte, ekzistas neniu aspekto, neniu manifestiĝo, pro kiu necesas rilati al la koncepto de psiko.

Sed la tuta reganta kulturo, pro tre specifaj celoj, kiuj estas la celoj de la reganta klaso, estas plenplena je la koncepto de psiko. Do, tute ne sufiĉas eviti uzi ĝin. Necesas ankaŭ aktive batali, je la persona nivelo kaj je la socia, kontraŭ la idealismaj kaj neraciismaj implicoj ligitaj al ĉi tiu koncepto eĉ kie oni aŭdacas trompe paroli pri “scienca psikologio”, kvazaŭ scienco kaj psiko ne estus en si mem du absolute malakordeblaj konceptoj.

Ne povas ekzisti scienco pri psiko. Ekzistas sciencoj, kiuj pritraktas anatomion, fiziologion, patologion de la centra nervosistemo, de la pensanta materio, kiu permesas al ni interagi kun la mondo de la homoj kaj de la naturo.

Sed se scienco pri la psiko ne povas ekzisti, male eblas kaj necesas – eĉ se ankoraŭ preskaŭ plene konstruendas – scienco, kiu havas kiel objekton la nerektajn biologiajn aspektojn de la personeco. Temas pri la manieroj ankoraŭ ne multe konatajn – sed certe scieblajn – per kiuj la ekstera natura mondo kaj ĉefe la socia mondo interagas kun la individuoj, formante kaj transformante iliajn personecojn per senĉesa dialektika rilato.

Se oni volas kontribui al la konstruado de ĉi tiu nova scienco, oni devos konsideri, ke fundamenta eco de homoj rilate al aliaj vivuloj estas la pezo, kiun la historio alprenas por ili. Temas pri la pasinteco al ni konata de nia specio kaj, samtempe, la projekto de ebla estonteco.

---

2. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 2, “Tesine varie”.

3. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 6 “1978”, fasc. 2, “Aprile-maggio”, sottofasc. 2..



Por la konstruado – necesa kaj urĝa – de ĉi tiu scienco pri personeco, hodiaŭ ni havas nur partajn kaj nesufiĉajn ilojn, kiel refleksologion, al kiu – malgraŭ la nekontestebla scienca kaj metodika rigoro – eskapas ankoraŭ la sociajn kaj politikajn aspektojn de la homa personeco. Ĝi ankoraŭ ignoras la historion. Kaj – almenaŭ laŭ mia scio – ĝi ankoraŭ ne starigis al si kun sufiĉa sindevido kaj klareco la taskon ne esti nur instrumento de scio, sed ĉefe ilo de liberigo, uzata por siaj propraj celoj de la persono mem kiel ĉefrolulo.

Ĉi-rilate ŝajnas al mi utile memori konkretan ekzemplon pri la liberiga kaj sociema uzo de scioj rilate al refleksologio, kiu havis kiel ĉefrolulojn geknabojn inter la aĝo de dek unu ĝis dek kvar. (Bernardoni rilatas tion al sia propra sperto en la mezlernejo Foscolo de Modeno, kie ŝi estis instruistino.)

En 1966 tri grupoj havantaj inter 25 kaj 30 mezlernejaj infanoj de la aĝo de 11 ĝis tiu de 14, faris kritikan ekzamenon pri la var-cela uzo de homo, pri la fenomenoj de kondiĉado pere de amaskomunikila kaj ĉefe televida reklamado.

La samaj geknaboj ankaŭ faris profundan esploron por identigi kaj kontraŭbatali neraciajn timojn en infanoj kaj plenkreskuloj.

En tiu okazo, la geknaboj, identiginte siajn timojn kaj eble ankaŭ tiujn de siaj pli junaj gefratetoj kaj, kelkfoje, de siaj gepatroj, lernis kiel liberigi sin de suferitaj kondiĉoj por definitive venki senkonsciajn kaj malutilajn timojn en konscia maniero.

Jen konkreta ekzemplo, kiu montras, kiel la scio kaj regado de la fundamentaj leĝoj rilataj al la fenomenoj de kondiĉado kaj senkondiĉigado estas, se ni mem uzas ilin niafavore laŭ niaj projektoj, konscia ilo de interagado kun la mondo de la homoj kaj de la naturo. Ili estas instrumento de transformado kaj ekscio de si mem kaj tial de liberigo.

Tiaj iloj ankaŭ konsistigas defendan armilon kontraŭ tiuj, kiuj intencas influantan personecon por celoj ne niaj, kontraŭ niaj interesoj kaj sen nia scio.

Krom transformo de la ekstera medio, kiu kondukas, kiam eblas, al forigo de malutilaj stimuloj, samtempe devas esti antaŭenigata modifo de nia respondo al eksteraj stimuloj, kiam ajn tio montriĝas necesa. Tio estas, kiam jam lernita respondo ne plu utilas aŭ neniam estis utila en la ĉiam malsamaj situacioj, en kiuj ni troviĝas.

Hodiaŭ, en mondo dronita en psikiatria kaj psikanaliza superstiĉo (por ne menciigi multe pli malnovajn superstiĉojn!), oni devas havi la kuraĝon aserti kun Engels, ke la homoj estas liberaj nur se ili konas la naturajn leĝojn, al kiuj ili estas devigataj submeti sin, ĉar ili ne estas kapablaj uzi ilin por siaj propraj celoj, se ili ignoras ilin.

20/5/1978<sup>4</sup>

**KIEL NI POVAS KOMPRENI LA RILATON INTER INDIVIDUO KAJ HISTORIO**, se ni faras neripareblajn erarojn en la identigo de la ilo, kiu permesas al ni establi ĉi tiun rilaton?

Scii ĝuste atribui al la pensanta materio, sen la neeltenebla kaj danĝera perado de la psiko, la kapablon koni la mondon kaj samtempe pripensi sin mem, atingante altajn gradojn de memkonscio, liberigas la vojon al ĉiam pli rekta rilato de homoj kun aliaj homoj kaj kun si mem, do kun la mondo de la historio kaj kun tiu de la naturo.

Homoj samtempe estas biologiaj objektoj kaj historiaj subjektoj, ili estas historio kaj naturo.

Nia partopreno en la historio, nia konscio pri sociaj temoj kaj nia kapablo ligi nin por transformi ilin fariĝas des pli forta ju pli la vojo de scio estas liberigita de fantomoj de la pasinteco. La plej danĝera inter ili hodiaŭ estas eble la koncepto de psiko, ĉar en la okuloj de la plej multo de la homoj, pro la ekzisto de psikiatrio, psikanalizo kaj psikologio, ĝi konservas sciencan maskon, kiu devas esti disŝirata.

16/1/1976<sup>5</sup>

**LA KERNO DE INDIVIDUECO ĈEFE KONSISTAS** en la historio de la individuo en siaj kunligoj kaj ĝi estas sinergia kaj antagonisma. Tiu historio devas esti konsiderata esence por sia eblo malfermiĝi al la estonteco, taksata laŭ la progresantaj luktoj en la ĉirkaŭa socio.

La historio de la unuopulo estas samtempe historio de konkreta biologia objekto. Oni ne devas ignori ĝiajn leĝojn enskribitajn en la du ĝermaj ĉeloj, de kies kunfandiĝo estiĝis korpo, kiu vivas en daŭra interŝanĝo kun la socia kaj natura medio, en kiujn ĝi mergiĝas [...]

21/10/1975<sup>6</sup>

**REALA POVO KAJ EBLA POVO RILATE AL LA KVALITO KAJ CORSO DE LA VIVO**

Nia reala povo pri nia vivo – kompare kun la ebla povo en donita historia momento, por iu individuo en iu biologia kaj sociekonomika situacio – estas rekte proporcia al la datumoj [...] reprezentataj de la tutaj sociaj rilatoj kaj, samtempe, al la mondvizio, kiu pelas nin vivi antagonisme aŭ harmonie kun niaj interhomaj rilatoj [...] en la historia periodo, kiu mallonge entenas nian vivon.

---

4. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 25 “Angiola Massucco Costa”, fasc. 2, “AMC con data”.

5. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 5, “Vita quotidiana”, sottofasc. 1.

6. *Same*, , fasc. 2, “Tesine la qualità della vita”.

## NIA ĈIUTAGA VIVO<sup>7</sup>

Nia ĉiutaga vivo estas la rezulto de reeĥo kaj interagado je la individua nivelo de la fortoj reprezentitaj de la historia mondo kaj la natura mondo ene kaj ekstere de ni.

Ni ne povas esti protagonistoj individue, sed nur kolektive: ĉi tio ne malpligas, sed pliriĉigas la signifon de la agado de ĉiu homo, kiu kontribuas al la transformaj procezoj de la ekzistanta mondo laŭ la senco de historio.

## LA ŜANĜO DE LA MEDIO NEPRE VENAS ANTAŬ LA ŜANĜO DE LA SUBJEKTO<sup>8</sup>

Jam el la eksperimentoj de Pavlov klare montriĝas, ke la ŝanĝo de la medio nepre venas antaŭ la ŝanĝo de la subjekto.

Nur post modifo, kvankam limigita kaj parta, de sia medio, la subjekto sukcesos ŝanĝi iun aspekton de sia personeco. Tio ebligas al li plu transformi la ĉirkaŭan medion, igante ĝin pli kaj pli kapabla transformi la personecon. Tio povas sekve pli efike funkcii sur la medio, en daŭra serio de reciprokaj interagoj, kiuj – laŭ la favoraj aŭ malfavoraj kazoj – povas esti ĝi malvirtajn aŭ virtajn cirklojn.

Sen antaŭa media modifo, transformado de la pli alta nerva agado estas nepensebla: nur idealisto aŭ neraciisto povus hipotezi ŝanĝon senkaŭze.

Je ĉi tiu punkto ekestas objeto: kiel povos iu, kiu antaŭe estis pasive influita de la medio, ekagi aktive sur ĝin, se li ne kapablis ŝanĝi ĝin?

Ĉu estas saĝe antaŭvidi, ke la necesa media ŝanĝo estos efektivigata de iu, kiu ĝis tiam ne kapablis fari tion?

Ĉu ni ne estos devigataj agnoski, ke la modifo de la personeco venas unue kaj nur poste tiu de la medio?

Kiel en ĉiuj dialektikaj procezoj, kiuj interagas unu kun la alia, oni povus longe diskuti pri la “demando pri la ovo kaj la kokino” .

Ŝajnas al ni, ke en ĉi tiu specifa kazo la demando povas esti solvata konfesante, ke tiu medio, kiun la subjekto ne kapablis iel transformi per si mem, povas esti transformata per taŭgaj aliancoj. Alivorte, la ŝanĝo de medio povas veni el la intehomaj rilatoj de iu donita subjekto.

Validaj aliancoj ne nepre estas tiuj kun esence fortaj homoj. Leonardo da Vinci parolis pri malfortoj, kiuj kune fortiĝas.

La dezirindaj mediaj ŝanĝoj por nia personeca kresko estas ĉiam – en pli aŭ

---

7. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 2, “Tesine la qualità della vita”.

8. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 1, “Tesine varie”, “Tesine la qualità della vita”.

malpli granda mezuro – eblaj.

Ununura vorto povas iafoje agi kiel fajrero, kiu transformas rezignacian medion en luktan etoson, taŭgan por antaŭenigi la novon.

Vortoj estas faktoj, se ili posedas la forton ŝanĝi nian humoron kaj tiun de aliaj por pli bona aŭ pli malbona sento kaj do nian kapablon agi.

## **VOLO DE ŜANĜO KAJ ILOJ POR ŜANĜI<sup>9</sup>**

Kiam la volo ŝanĝi aperas en ni, jam ĉeestas iuj kondiĉoj, kiuj povas ebligi al ni traduki nian volon ŝanĝante faktojn.

Kontraŭe al tio, kion oni kutime kredas, la kondiĉoj estas kutime eksteraj al ni, krom dum iuj periodoj de grandaj organikaj ŝanĝoj en la vivo, kiel la periodo de adolesko aŭ tiu de maljuniĝo.

Tamen eĉ en kazoj, kiam la ŝanĝo devenas de la eno de nia organismo – kiel okazas ekzemple en la profundaj transformoj okazantaj en la pubereca epoko – eksteraj faktoroj ĉiam havos decidan gravecon, se ne ĉe la komenco de la transformado, almenaŭ dum ĝi kaj pro la graveco, ke ĉi tiu ŝanĝo kaŭzos en ni kaj en nia persona historio.

9/3/1979<sup>10</sup>

## **KIEL DISVOLVIĜAS HOMA PERSONECO?**

Antaŭjuĝoj je intelekta kaj klera karaktero obstrukcias la esploran kampon rilate al la uzo de tempo kiel spaco por la evoluo de la homa personeco kaj rilate al la manieroj de ĉi tiu evoluo.

La emo purigi kaj rekomenci de la radikoj (tio estas de la konkreteco de ununura homa personeco mergita en la reciproka intersekciĝo de interhomaj rilatoj ene de sia propra klaso kaj ekster ĝi) povas certe estiĝi el teoriaj konvinkoj pri politika naturo rilate al la valoro de ĉiu homo, kiu ne vivas per ekspluatado de aliaj homoj. Sed la plej efika stimulo estas reprezentata de la konkreta renkonto kun moviĝantaj homaj personecoj, kiuj – kvankam ili ne respondas al humanismaj kaj intelektismaj normoj – malkaŝas riĉan kaj daŭre kreskantan kapablon, precipe koncerne la rilatojn inter homoj. Tio okazas je tiu mikrosocia kaj mikropolitika nivelo, kiu ĝis nun estis netaŭge difinita kiel privata, kaj je pli kompleksa nivelo, kie la biografio de la individuo ekhavas la dignon de homa historio.

---

9. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 2, “Tesine la qualità della vita”.

10. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 45 “Personalità e rapporti interpersonali 1”, fasc. 3, “La concezione della personalità”, sottofasc. 1.

30/8/75<sup>11</sup>

## VOLO ŜANĜI

La persisto de humoroj, kutimoj, statika vido de aferoj kiam ŝanĝiĝis la situacio ekster ni (aŭ ene de ni, kiel okazas ekzemple ĉe la kreskanta infano), malhelpas nian progreson kaj tiun de niaj kunuloj, proksimaj al ni.

La volo forigi – sen restaĵoj – ĉion, kion ni agnoskas superata de la tempo (kaj tio validas se la tempo konsiderata estas la tuta vivo aŭ mallonga horo) devas esti kultivata fare de ĉiu en si mem kaj en la aliaj, por ke oni estu disponeblaj kaj pretaj fronte al novaj kaj malsamaj eventoj.

La plej alta nerva agado de la homo ebligas ĉi tiun daŭran renovigon – tipan precipe ĉe la homaj specioj. Rilatoj kun la ekstera mondo ne estas statikaj kaj heredaj, sed plejparte ili estas portempaj, akiritaj kaj do anstataŭigeblaj.

Tio igas homojn multe pli malfermitaj al iu ajn ŝanĝo. Tial tiuj, kiuj luktas por konservi la ekzistantan staton, sufokis en si mem – ofte pro klasa kondiĉado – unu el la fundamentaj homaj trajtoj: la emon al ŝanĝo.

**HOMA INTERAGADO NENIAM ESTAS NEŬTRALA:**<sup>12</sup> ĝi ĉiam havas terapiajn aŭ patogenajn efikojn. Tio dependas, ĉu nia rilato kun la alia respektas aŭ ne la kreskajn procezojn, en kiuj esprimiĝas la evolua potencialo de la specio.

**LA HISTORIA VALORO DE HOMA VIVO**<sup>13</sup> povas esti taksata, finfine, surbaze de la kontribuo, kiun ĉiu povos objektivite fari al la atingo de nova mondo, komencante de la mondo en kiu – sen sia elekto – li hazarde troviĝis.

[...] **EN LA KAMPO DE FELIĈO,**<sup>14</sup> de ĝustaj interhomaj rilatoj inter kamaradoj kaj kontraŭuloj kaj en la kunteksto de tiu interhelpo, kiun oni devas kontinue interŝanĝi, kiam oni apartenas al la sama batal-linio, por ke ĉiu povu atingi la maksimuman forton, personan kreskon, feliĉon permesitan de la nuntempaj produktantaj rilatoj, ni ĉiuj devas esti esploristoj kaj sciencistoj, por ke neniu devu esti tiel nur laŭ faka kaj aparta maniero.

---

11. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 2, “Tesine la qualità della vita”.

12. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 45 “Personalità e rapporti interpersonali 1”, fasc. 6, “Rapporti interpersonali”, sottofasc. 2.

13. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 5, “Vita quotidiana”, sottofasc. 2.

14. A. Bernardoni “L’Attività Terapeutica Popolare contro l’azione psichiatrizzante delle équipes medico psico pedagogiche nel periodo storico che segna la crisi irreversibile della psichiatria”, Cooperativa Tipogtafi, Modena, quinta edizione, 1978, p.21.

26/4/1978<sup>15</sup>

## ĈU LA HOMO VIVAS NUR PER RACIO?

Kiu, asertante, ke homo ne povas vivi nur per racio, pravigas la ondon de neraciismo, iranta ĝis magio, astrologio, okultismo, kiuj estas disvastiĝantaj tra la mondo kaj menacas iĝi amasa fenomeno, ne tute klare komprenas, kion signifas racieco.

Konfliktoj kutime ekestas inter racio kaj sentoj kiam la subjekto ne mastras sian propran sorton kaj ne posedas la kapablon plani siajn agojn antaŭvidante iliajn longperspektivajn efikojn.

Oni povas realigi vivon, en kiu racio kaj korinklinoj (aŭ se vi volas pasioj) ne nur harmonias unu kun la alia, sed reciproke fortigas unu la alian.

En 1975, elstaraj sciencistoj el Usono, inkluzive de 18 Nobel-premiitoj, alvokis la publikon de la tuta mondo rekomendante, ke ili ne plu donu krediton al la antaŭdiroj kaj rekomendoj de astrologoj.

Laŭ la subskribintoj, astrologio ne posedis la plej etan sciencan fundamenton kaj tial ĝi estas konsiderenda kiel pura superstiĉo.

Temas pri alvoko destinita resti neaŭdita ĝis kiam psikiatrio, psikanalizo, psikologio estos konsiderataj sammaniere kiel astrologio, kiromantiko.

Oni ne povas esti duon-raciismaj.

## LA HOMA SPECIO DIFERENCAS DE LA BESTAJ SPECIOJ<sup>16</sup>

La homa specio diferencas de la bestaj specioj pro tio, ke ĝi devas eduki dum longa tempo siajn idojn. Ili ne nur naskiĝas absolute sendefendaj, restas longtempe nekapablaj plenumi la tipajn agadojn de sia specio, de sia apartena klaso, de sia epoko kaj de sia persona individueco. Sed ili devas ankaŭ, per diversaj gradoj kaj laŭ leĝoj ankoraŭ nun determinitaj fare de privilegio, akiri kvalite kaj kvante malsaman parton de la heredaĵo de scioj, kiujn la tuta homaro amasigis dum jarmiloj.

La bezono de lernado kaj edukado de ĉiu membro de nia specio estas grandega, dum la fundamenta lernado de aliaj specioj ne devas esti akirita pene. Ĝi disvolviĝas dum kreskado, ĉar ĝi jam estas registrita en la genetika heredaĵo.

Fakte, dum jarmiloj migrantaj birdoj transiris senlimajn spacojn sekvante perfektajn trajektoriojn, kiujn ili ne bezonas lerni, ĉar la itinero kaj la rimedoj por laŭgrade taksii ĝian precizecon kaj fine eventuale korekti ĝin, estas registritaj – neforviŝeblaj – en la genetika heredaĵo de tiu specio.

---

15. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 45 “Personalità e rapporti interpersonali 1”, fasc. 5, “Proprietà privata della persona”, sottofasc. 1.

16. La psichiatria contro la scuola (Psikiatrio kontraŭ lernejo), Eldonejo M.C.E., Conegliano, 1975, p. 7.

Sed la homa ido devas ĉion lerni: naskiĝinte ĝi posedas nur malmultajn refleksojn, kiel la suĉan reflekson aŭ la orientigan reflekson.

Pro tio, de kiam homo fariĝas homo, la novnaskito de la homa specio devas lukti longe antaŭ konkeri tiun parton de homa heredaĵo, kiu vere transformos lin en homon, komencante per la kapablo marŝi uzante nur la malsuprajn membrojn, ĝis uzi artikitan lingvon, kiu esprimas pli-malpli maturan penson, kiu poste tradukeblas en la skribajn signojn.

23/4/1978<sup>17</sup>

**LA KAMPO DE LA INSTINKTOJ** estas pli limigita en homo. La esploro de la limoj de tio, kio estas lernita kaj de tio, kio estas instinkta, devas esti farata sen antaŭjuĝoj.

Estas neniu malamikeco kontraŭ instinkteco, neniu miksitita preteksto de venkado, neniu psikanaliza iluzio pri sublimado. Nur spiritismaj kaj idealismaj doktrinoj, kiuj estas malamikoj de homo, povas konsideri malamikoj la instinktojn.

23/4/1978<sup>18</sup>

**ĜIS ESTAS NENIO PLI NERACIA OL KONTRAŬSTARIGI RACION KAJ INSTINKTOJN.**

Tie kie ili vere ekzistas, instinktoj devas esti akceptataj de la racio. Ili iĝas raciaj pro la fakto mem ke ili ekzistas kaj pro la fakto, ke ili povas esti konataj.

3/11/1980<sup>19</sup>

**NI ŜANGIĜU HODIAŬ POR LA FELIĈO DE HODIAŬ KAJ DE MORGAŬ**

Ni ne povas esti blindaj antaŭ la longaj tempoj de la historio. Sed ni ankaŭ ne povas esti surdaj antaŭ la nepraj bezonoj naskiĝantaj en ni mem kaj trudi al ni tro ĝeneraligan esploradon – eĉ antaŭ la longaj tempoj de la historio – pri la multe pli mallongaj tempoj, kun kiuj oni mezuras homan vivon.

Ĝis ni havos la kuraĝon respekti kaj plenumi niajn elementajn bezonojn, ni ankoraŭ estos ĉe la nivelo de la piramidaj sklavoj por la gloro de la faraonoj.

La fundamentaj bezonoj de la individuo devas trovi sian solvon, dum la vivo de la individuo, sub la doloro de la profunda bedaŭro, kiun vekas la signifo de ĉiu

---

17. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 45 “Personalità e rapporti interpersonali 1”, fasc. 5, “Proprietà privata della persona”, sottofasc. 1.

18. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 45 “Personalità e rapporti interpersonali 1”, fasc. 5, “Proprietà privata della persona”, sottofasc. 1.

19. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 1, “Tesine varie”

vivo ne plene vivita.

Kaj kiam ni diras ke vivo ne estas plene vivita, klare estus absurde ignori la historian kaj socian kuntekston, la biologian situacion kaj la klasan situacion, en kiu la subjekto troviĝas.

Estas tamen absurde provi trudi politikan konsciencon de ekstere al viroj kaj virinoj, kiuj estas malhelpataj havi la maksimuman personan, intelektan kaj kulturen floradon eblan por si mem.

Rekoni la rajton je tia florado nepre implicas la konkeron – kvankam laŭgradan kaj kontraŭdiran de politika konscienco, ĉar sen la lumo de la estonta projekto ne limigita al la individuo, neniu unuopa vivo povas havi signifon preterpasantan puran kaj simplan postvivadon, puran kaj simplan bestan biologion. La homa menso ne povas limigi sin al la persono kiel privatulo, pro la doloro de atrofio de la penso. Sekvos fine regreso, en kiu la retiriĝo en la biologian kampon kaj la limigon al ĝi eĉ malplivalorigus la biologian aspekton, ĉar ĝi humiligus la kortik-viscerajn korelaciojn, kiuj estas tiom gravaj por la sano de ĉiu organismo.

La kritikoj faritaj al paradizo, kiu malhelpas homojn solvi siajn problemojn ĉi tie kaj nun, almenaŭ parte validas ankaŭ pri tiuj, kiuj ne metas la ĉielon en la postvivon kaj zorgas pri la feliĉo de homoj, sed prokrastas ĝian realiĝon al post tre longa tempo. Ili petas tiom multe interŝanĝe en terminoj de hodiaŭaj oferoj, ke la feliĉo de la unuopulo estas neeviteble perdata. Do – laŭ iuj – ne eblus konstati grandan diferencon, ĉu oni devas situi feliĉon en la transtombo aŭ en la postvivo.

Kiam feliĉo superpasas la ekziston de homoj, temas ĉiam pri la feliĉo de transtombo. La koncepto de transtombo devas esti komprenata laŭ tempa senco, ne space. Ĉiuj moraloj, kiuj permesas superpasi la rajtojn de la vivantoj en la nomo de la rajtoj de tiuj, kiuj ankoraŭ ne vivas, meritas la nomon de moraloj de transtombo. Meritas la nomon de murdaj moraloj tiuj, kiuj ofertas nunan kaj estontan vivon en la nomo de idealoj de la pasinteco. Devontigo jes, neniigo ne. Florado ne estas ofero.

La vera diferenco konsistas en konstati, ĉu al la individuo estas konkrete donata aŭ ne la rajto batali ĉi tie kaj nun por iom da persona kaj tuja feliĉo, dum oni okupiĝas en la nemalhavebla lukto por pli granda feliĉo, pli longtempa kaj vasta, kiu implicas antaŭenigon de la tuta homa raso.

La rajto-devo konsideri nin portantoj de estonteco, kiel kreantoj de pli bona mondo, ne implicas rezignon de iu ajn fundamenta aspekto de nia personeco, sed reprezentas ĝian plej plenan realiĝon.



## **KIEL VI, ANKAŬ MI OKUPIĜAS PRI HISTORIO**

La diferenco konsistas en tio, ke la historio, kiun mi traktas, estas malgranda historio kaj kiam mi studas la efikojn de strukturoj kaj superkonstruaĵoj sur la biografio de la individuo, mia fenestro estas malfermita al la estonteco. En ĝi, konsiderante la pasinteco kaj la nunon en iliaj reciprokaj interagoj, mi strebas, kune kun la individua ĉefrolulo, serĉi praktikeblajn vojojn kaj pli puran aeron.

La estanteco kaj la pasinteco vidiĝas en la estonta lumo, tiel ke la reala homo studas sin laŭ la vido de la potenciala homo.

Ne temas ankoraŭ pri la nova homo, sed ĉiuokaze pri homo, kiu estas jam malsama, pli forta, pli kohera, pli kapabla esti feliĉa kaj feliĉigi aliajn ol la hodiaŭa.

---

20. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 37 "Lettere non spedite E-P", fasc. F, Franco Ferri Istituto Gramsci.



## ĈAPITRO 2

# Ni malkoloniigu nian ĉiutagan vivon

### FELIĈO, ĈU VI NASKIĜAS EL KURAĜO?

Feliĉo, nur kuraĝo  
de lukto, kiu lumigas la vivon,  
fosis krutan vojon inter montoj kaj mallarĝaj  
klifoj, kie, neatendite,  
vi subite surprizis nin dum  
ni grimpis – per ŝnuroj – la krutaĵon.  
Ni atingis vin sed ni ne serĉis vin:  
raŭkaj pro krioj kaj protestoj, streĉaj  
al generacioj de la estonteco.  
Sed renkonti vin estis dolĉe kaj ĉiuj kune  
ni trinkis dankeme el viaj malavaraj vivfontoj  
kaj rekomencis  
refreŝigite la lacigan iradon.

2/04/1979

ACSM, Parma, / Antonietta Bernardoni /, koverto 19,  
“Poesie a macchina” (Poeziaĵoj per maŝino)

## ENHAVTABELO

- La malkoloniigo de la ĉiutaga vivo
- Esti esence partizanoj...
- Ni ĉiuj estas plentempaj sociaj laboristoj...
- Konsciaj sociaj laboristoj...
- La historio de ĉiu individuo ĝis nun vivinta...
- Ĉu agi en la teatro de vivo, aŭ vivi en historio?
- Kiu el ni povas aserti...
- Enhejmaj arestoj
- La esprimo de si mem kaj de siaj bezonoj helpo kiel koloniigo
- Feliĉo estas historie determinata: hodiaŭ ĝi inkluzivas lukton
- Feliĉo estas plejparte ligita...
- Ni estas ĉirkaŭitaj...
- Bonas feliĉo...
- Kiu nutras la ĝojon vivi?
- Aŭstereco kaj feliĉo
- Ĝojo estas socia produkto, kiu devas esti socie reinvestita...
- La misrezono de hedonismo
- Proleta solidareco kaj kristana kompato
- Ĝis kiom oni rajtas esti implikita en la sufero de aliaj?
- La perforto de kutimo
- Kontraŭ ĝentileco
- La etiketo plenumas la funkcion...
- La scivolemo de aliaj...
- Ni liberigu la liberan tempon!
- Kapabli diri ne por povi diri jes
- Lasu tempon al tempo
- La dubo kiel valoro
- Ĉu optimismo aŭ pesimismo?
- La regado de misuzo
- Fantazio ĉiam estis konsiderata...
- La parolo: nemalhavebla armilo por klasbatalo
- La parolo kiel demonstrado anstataŭ ol kiel komunikado
- La parolo ne nur preparas la agon...
- Silentigi...
- Aŭskulti kaj esti aŭskultata
- Tre profunda memrespekto...
- Multaj malestime eldiras la frazon “paroli per sloganoj”...
- Tuj, kiuj ne sukcesis atingi...
- Spontaneco kaj spontaneismo
- La mortaj tempoj de la tago mortigas la evoluon de la vivo
- Renkontiĝi por manĝi aŭ por komuniki?
- La akiro de personaj kapabloj...
- La sola maniero, kiu ebligas disvolvi...
- Lerneja sukceso ne indikas la kontentigan kreskon...
- Perdota havaĵo, savota vivo
- Ĉu temas pri preceptema kaj subprema moralo...

## LA MALKOLONIIGO DE LA ĈIUTAGA VIVO<sup>1</sup>

La malkoloniigo de la ĉiutaga vivo implicas zorgeman serĉadon de la realaĵo kaŝita malantaŭ malgrandaj gestoj, kiuj kutime estas konsiderataj sensencaj.

Ĉi tiu esplorado ne havas kiel finan celon la malkovron de kvazaŭ nekonscio, kies influo estas atribuita al manifestiĝoj de ĉiutaga vivo, kiujn psikanalizo – per sia devia kaj falsa terminologio – kovras per la termino psikopatologio de la ĉiutaga vivo.

Temas anstataŭe pri la spuroj de la unuaj originoj en tiuj malgrandaj gestoj, kiuj povas esti ligitaj al procezoj de ideologia subigo, aŭ al liberigaj procezoj [...].

Ĉiufoje kiam nia konduto aŭ tiu de nia kunulo estas neracia, ni ne deturnu nian esploron en la nebulojn de freŭda senkonscio, sed ni provu identigi la kondiĉojn, kiujn la Kapitalo daŭre kreas por sia postvivado kaj kreskado [...].

25/1/1975<sup>2</sup>

**ESTI ESENCE PARTIZANOJ**, ĵetante ĉiun momente la pezon de nia forto en la procezojn, el kiuj ekestos ĉiam pli inda estonto por la homoj, redonos al ni nian fortunon multobligita kaj preta denove engaĝiĝi en aliaj procezoj de partopreno, liberigo kaj superado de la nuntempo.

Oni ne povas reveni feliĉa de batalkampo sen esti batalinta.

**NI ĈIUJ ESTAS PLENTEMPAJ SOCIAJ LABORISTOJ**<sup>3</sup> ĉar en ĉiu momento, ĉu laŭ nia konscia volo aŭ sen nia scio, ni havas negativan aŭ pozitivan efikon al iu ajn, kiu ekrilatas kun ni.

**KONSCIAJ SOCIAJ LABORISTOJ**<sup>4</sup> estas tiuj, kiuj kapablas identigi, rekonstrui, transformi povajn rilatojn ene de malgrandaj grupoj, je la servo de la disvolviĝo kaj plibonigo de la personeco de ĉiu homo, danke al reciproka kaj konstanta edukado.

**LA HISTORIO DE ĈIU INDIVIDUO ĜIS NUN VIVINTA**<sup>5</sup> ne estas nur la historio de

---

1. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 5, “Vita quotidiana”, sottofasc. 2.

2. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 2, “Tesine la qualità della vita”.

3. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 50 “Psichiatria”, fasc. 2, “Operatore psichiatrico”, sottofasc. 2.

4. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 50 “Psichiatria”, fasc. 2, “Operatore psichiatrico”, sottofasc. 2.

5. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 50 “Psichiatria”, fasc. 2, “Operatore

homa korpo kaj de la biologiaj procezoj okazintaj en ĝi. Dialektike, ĝi estas ankaŭ la historio de la reciprokaj efikoj de la kontraŭdiroj ligitaj kun la nunaj produkta-daj rilatoj je la interhoma nivelo kaj je la nivelo de individua personeco.

### **ĈU AGI EN LA TEATRO DE VIVO, AŬ VIVI EN HISTORIO?<sup>6</sup>**

Roli en la teatro de vivo ne signifas vere vivi: roli estas nur formo de postvivado, al kiu ni estas devigataj, kiam niaj scioj kaj rilatoj kun la ekstera mondo limiĝas al tiuj, kiujn niaj individuaj fortoj ebligas al ni [...].

La marioneto fariĝos homo nur kiam la rilato kun samklasanoj ebligos al ĝi akiri personan konscion [...].

Ĉiutage en ĉiu familio oni improvizas teatraĵon, en kiu la roloj de la aktoroj ne estis skribitaj, sed improvizataj obeante intrigon transdonitan laŭ la tradicio. En ĝi la avarulo ĉiam restas avarulo, la junulo daŭre serĉas aventurojn kaj panjo estas malespera pro la doloro kaj la zorgo pri la danĝeroj, kiujn alfrontos la infanoj.

Ĉiu el ni devas decidi, ĉu oni volas ludi en vivoteatro aŭ partopreni en la historio. La transiro de ritigita postvivado al feliĉa militemo estas la rezulto de serio da ĉenaj reagoj, kiuj ekas ekster la subjektoj mem kaj havas postefikojn en la plej intima parto de ilia personeco.

**KIU EL NI POVAS ASERTI<sup>7</sup>** en plena konscio, ke li kapablis krei ĉirkaŭ si densan plekton de validaj familiaj, sociaj kaj politikaj rilatoj? Temas pri tiu solida kaj densa plekto de tenacaj sed flekseblaj kaj liberaj familiaj rilatoj, sen kiuj oni ne povas certiĝi, ke la valoro de sia propra individua vivo superu la etajn kaj mal-larĝajn limojn de la privata kaj aparta afero. Tiel oni kapablas eniri, plenrajte kaj klarkonscie, en la nehaltigeblan movadon de tiu parto de la homaro, kiu kolektive planas estontecon, en kiu la libera disvolviĝo de ĉiuj estas kondiĉo por ĉies libera disvolvo.

Ni ĉiuj profunde interesiĝas identigi, por venki ilin, la gravajn distordojn, kiuj devenas de la kondiĉo, ke ni naskiĝis en socio bazita sur homa ekspluatado. Ĝi influis ĉiujn el ni severe, sed ne tute neforviŝeble se, helpe de niaj kunuloj, ni vere pretas serĉi ilin persisteme, per kritika kaj memkritika spirito kaj ne timigitaj de la novaĵo, nek de la suferoj, kiuj povas esti ligitaj kun la ĝojoj de ŝanĝo [...].

Kiel efektiviĝi ĉi tiun necesan radikalan revizion?

Ĉu izole? Ĉu per individua meditado?

---

psichiatrico", sottofasc. 2.

6. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 "Tesine varie", fasc. 2, "Tesine la qualità della vita".

7. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 1 "1965-1973", fasc. 3, "1973"

Ni ne volas ignori la valoron de momentoj de persona meditado. Tamen ni certas, ke nur malferma konfronto, daŭra debato kun familianoj, amikoj, kamaradoj aŭ kontraŭuloj povas malkovrigi al ni falsaĵojn, erarojn, nesufiĉe kreskitajn kosciencojn, ĉikanadon suferitan aŭ kaŭzitan al aliaj, “strangajn” rilatojn, soifon de posedo de aĵoj kaj homoj, kondutojn malfavorajn al la liberigaj procezoj de la luktanta homaro.

### **ENHEJMAJ ARESTOJ<sup>8</sup>**

Kiu konis aŭ sukcesis establi familiajn rilatojn, en kiuj la riĉeco de ĉiuj multiĝas per la riĉeco de la aliaj?

Kiu domo vere tenas la fenestrojn malfermitaj al la mondo kaj povas esti konsiderata kiel bazo de subteno, deirpunkto por la bataloj, kiujn historio forte proponas al ĉiuj hodiaŭaj laboristoj?

**LA ESPRIMO DE SI MEM KAJ DE SIAJ BEZONOJ<sup>9</sup>** estas furioze subpremata, laŭ ĝiaj kvantaj kaj kvalitaj aspektoj ĉe la membroj de la ekspluatataj klasoj.

En ĝiaj kvalitaj aspektoj, ĝi tamen estas parte subpremata eĉ ĉe la membroj de la regantaj klasoj, kiuj devas kaŝi parton de siaj aspiroj, de siaj deziroj kaj antaŭ ĉio de siaj malfortoj.

### **HELPO KIEL KOLONIIGO<sup>10</sup>**

La helpo donita kiam la pova rilato estas stranga, kiam ne ekzistas vera kaj evidenta reciprokeco, kontinue riskas transformiĝi en kolonigan rilaton, en kiu la koloniisto malhelpas la kreskadon de la bezonantaj koloniitoj. Li devas liveri al ili “finitajn produktojn”, alt-teknologiajn varojn, kiujn la koloniitoj neniam devos kapabli produkti memstare, ĉar – per tio – ili endanĝerigus la ekziston de la procezo de koloniigo kaj de la koloniisto kiel tia.

La ĉefrolulo de sia propra liberiĝo povas esti nur la subjekto en malfacilaĵoj.

Helpo estas reala nur se ĝi estas priraktita persone de la subjekto, kies forto kaj kapabloj kreskas. Alimaniere, ĝi estas nur la “helpo” de la koloniisto.

Nur la kreado de situacioj, en kiuj estas klare, ke la helpo estas reciproka, povas malpliigi ĉi tiun danĝeron.

Krome necesas certigi, ke aliaj fortoj partoprenu la liberigan procezon kiel eble plej baldaŭ, eble laŭ konsilo de la ĉefrolulo.

---

8. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 46 “Personalità e rapporti interpersonali 2”, fasc. 4, “amiglia e affetti”, sottofasc. 2.

9. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 46 “Personalità e rapporti interpersonali 2”, fasc. 2, “Condizionamenti di classe”, sottofasc. 2.

10. A. Bernardoni “Psichiatria senza futuro”, La Linea, Padova, 1975, p. 83

Situacio, kiu eble respondas al ĉi tiuj bezonoj, estas reprezentata, ekzemple, de regulaj kunvenoj inter la loĝantoj de la sama kvartalo, kiuj kolektive kaj reciproke interesiĝas pri la problemoj de ĉiuj.

Neniu psikiatria aŭ psikoterapia traktado plenumas ĉi tiujn bezonojn.

7/10/1974<sup>11</sup>

### **FELIĈO ESTAS HISTORIE DETERMINATA: HODIAŬ ĜI INKLUZIVAS LUKTON**

Se ni uzas nian tutan inteligenton por malkovri eblajn kunligojn, rilatojn, frakturojn aŭ eblajn movojn, ni tre ofte trovos, ke el situacio de profunda mal-feliĉo ni povas eliri al la libera aero per la helpo de niaj kunuloj, por ekmarŝi – ĉiuj kune – laŭ vojo al la estonto.

Feliĉo, entuziasmo, ĝojo estas historie deciditaj.

Ĉiumomente estas sennombraj manieroj esti – almenaŭ parte – feliĉaj.

Temas pri formoj de feliĉo malsamaj al la formoj de feliĉo eblaj en aliaj historiaj epokoj.

En epoko, en kiu, kiel en la nuna, estas anoncigitaj fundamentaj ŝanĝoj en la vivo de homoj, ne eblas feliĉi, se la koncepto de lukto ne estas inkluzivita en tiu mondkoncepto.

**FELIĈO ESTAS PLEJPARTE LIGITA**<sup>12</sup> al la kono de la mondo, al la konscio pri la limoj de individua laboro kaj – samtempe – al la kapablo superi ĉi tiujn limojn per ĝustaj kunligoj.

Feliĉo estas socia produkto, kiun oni ne povas ĝui individue, krom dum tre mallonga tempo kaj je pure biologia nivelo, do ne plene homa. Tial estas preferinde paroli pri ĝuo kaj ne pri feliĉo.

11/3/1980<sup>13</sup>

**NI ESTAS ĈIRKAŬITAJ**, dronigitaj, perfortitaj fare de stereotipaj bildoj de feliĉo: arketipoj jam pretaj, kiuj malhelpas nin serĉi veran feliĉon, kiu, por esti reala, devas nepre esti nova.

Posedi la econ de la novo kaj la kapablon generi ĝin estas fundamenta karakterizo (eble la karakterizo) de feliĉo.

---

11. A. Bernardoni "Attività Terapeutica Popolare", Cooperativa Tipografi, Modena, 1976, p.138

12. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 46 "Personalità e rapporti interpersonali 2", fasc. 5, "Felicità", sottofasc. 2.

13. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 46 "Personalità e rapporti interpersonali 2", fasc. 5, "Felicità", sottofasc. 1.



Uzi pretajn modelojn, jam pretajn portistojn de feliĉo, estas obstaklo, kiu malebligas, precipe al maljunuloj, sed ne nur al ili, identigi eblajn fontojn de feliĉo.

4/6/1977<sup>14</sup>

### **BONAS FELIĈO, POR KIU NE EBLAS KONKURENCI.**

En la sama momento, en kiu ni akceptas vidi feliĉon kiel objekton, kiu ne povas esti via, se ĝi apartenas al mi, ni detruas en ni mem la kapablon esti feliĉaj. Kaj tio same okazas se ni sukcesas akiri tion, kion ni volis, aŭ en konkurencado, kiam ni estas senigitaj favore al iu alia.

### **KIU NUTRAS LA ĜOJON VIVI?<sup>15</sup>**

Ekzistas pure biologia ĝojo vivi, kiu ofte superfluas de la infano aŭ junulo, foje interrompita de enuoj aŭ eĉ de malespero.

Se iam la biologiaj kialoj ne sukcesos tenace kunigi sin al sociaj kaj politikaj motivoj, tiu ĉi ĝojo, kiu ankaŭ havas biologian naturon, estas destinata al pluvivo aŭ al estingiĝo.

Ofte tio estigas pesimismon, kiu estas ju pli malfacile venkebla des pli granda estis la iama feliĉo, al kiu la memoro nun turniĝas kun bedaŭro, krome, pesimismo igas nin neatenti pri la ĉesto de eblaj fontoj de ĝojo, kiujn ni jam malfacile vidus pro la fakto, ke ilin ni ne plu kredas eblaj.

Neniu sola kapablas rebruligi la flamon, kiu ja ankaŭ en ni estiĝis pro biologiaj kialoj kaj tial estas ĉirkaŭskribata de la limoj de nia korpo, sed nutrata de la tuta mondo, kiun ni sukcesas vidi de ĉiu kunulo kaj de ĉiu kontraŭulo, kun kiu ni komencas ĝustan ligan aŭ luktan rilaton

4/6/1977<sup>16</sup>

### **AŬSTERECO KAJ FELIĈO**

Ni volas nek humiligojn nek oferojn.

Ni volas remalkovri novajn valorojn, fundamentajn bezonojn, samtempe rifuzante malnovajn valorojn, istigitajn bezonojn, kiuj ne respondas al homaj be-

---

14. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 46 "Personalità e rapporti interpersonali 2", fasc. 5, "Felicità", sottofasc. .

15. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 "Tesine varie", fasc. 2, "Tesine la qualità della vita".

16. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 46 "Personalità e rapporti interpersonali 2", fasc. 5, "Felicità", sottofasc. 1.

zonoj, sed al la bezonoj de kapitalo kaj merkato.

Aŭstereco, se oni bone komprenas ĝin, ne devas esti rezigno sed kolektiva serĉado de malpli rompiĝema ĝojo, de pli intensa plezuro ol tiu, kiun oni povas akiri de nenecesa varo.

Se ni limige konsideras homojn nur kiel produktantojn kaj konsumantojn de varoj, se ni neglektas la konkretan kapablon de ĉiu unuopulo influi la ĉirkaŭan mondon en la senco de transformo, aŭ en la senco de konservado de la ekzistanto, ni ignoras la homojn en ilia digno kiel politikaj subjektoj, ĉefroluloj de historio, kreantoj de estonto.

### **ĜOJO ESTAS SOCIA PRODUKTO, KIU DEVAS ESTI SOCIE REINVESTITA, ALIKAZE ĜI ESTINGIĜAS<sup>17</sup>**

La ĝojo vivi por povi plifortiĝi kaj plialtiĝi devas esti senĉese disdonata. Ĝi devas tuj esti transdonata al la kunuloj. Alikaze – ĵaluze konservita kiel la avarulo konservas trezoron – ĝi ŝrumpas, kolapsas kaj fine nur lasas nin malfortaj, malriĉaj, senesperaj kaj plenaj je bedaŭro.

Alivorte, la vivĝojo devas tuj transformiĝi en disponeblo por kolektiva politika lukto, kiu tuj ek-transformu la ĉirkaŭan medion, por kontraŭstari kaj erozii la distordantan potencon de kapitalo sur la ĉiutaga vivo de ni ĉiuj [...].

### **LA MISREZONO DE HEDONISMO<sup>18</sup>**

La misrezono de hedonismo konsistas el la fakto, ke la hedonisto celas sian propran feliĉon per aliaj aŭ sole, sed ne kun la aliaj.

La aliaj estas iloj, se entute, sed ne kunuloj.

Ankaŭ ĉi tie oni erare konsideras feliĉon kiel koncernantan nur la unuopan individuon: sed – eĉ se feliĉo estas spertata de la individuo – ĝi estas socia produkto, kiun ne povas stabile atingi tiuj, kiuj ignoras ĝiajn sociajn radikojn.

Nur tiu, kiu kolektive produktas feliĉon, povas esti feliĉa.

### **PROLETA SOLIDARECO KAJ KRISTANA KOMPATO<sup>19</sup>**

Pro jarmila misedukado al konkreta homa rilato, oni emas kredi, ke veran helpon al tiu, kiu suferas, povas doni nur tiu, kiu sentas sin implikita kun li en lia sufero.

---

17. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 2, “Tesine la qualità della vita”.

18. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 46 “Personalità e rapporti interpersonali 2”, fasc. 5, “Felicità”, sottofasc. 2.

19. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 2, “Tesine la qualità della vita”.

De tie la termino kompato, kiu signifas suferi kune.

Sed tiu, kiu batalas por sia propra feliĉo kaj tiu de aliulo – sendepende de la prezo pagenda por tia feliĉo – ne sentas la bezonon plonĝi en la abismon de la suferoj de aliaj. Li deziras helpi. Sed li kapablas pli multe helpi, se li pli malmulte kunpartigas la malesperon de aliaj kaj pli multe plifortigas en si mem kaj en aliaj la senton de espero, kiu devenas de konscia ligo kun luktantaj homamasoj [...]

### **ĜIS KIOM ONI RAJTAS ESTI IMPLIKITA EN LA SUFEROJ DE ALIAJ?**<sup>20</sup>

Ne estas juste [...] esti superfortita de la dekadenca sento de kompatemo.

Ni ne suferu kune, sed batalu kune [...].

12/5/1975<sup>21</sup>

### **LA PERFORTO DE KUTIMO**

Tre ofte tiuj, kiuj estas profunde malamikaj al la jam formita enhavo de la establita ordo, trovas pli prudente ne kritiki tiun, kiu protestas, limigante sin kritiki la manierojn kaj eksterajn aspektojn.

Sed nenio estas pli perforta ol tio, kio jam ekzistas, ol tio, kion oni jam kredas kutima kaj ne plu vidas en siaj trajtoj de perforto kaj maljusto.

La sklavo, kiu preterpasas antaŭ niaj okuloj, trenante sian pezon, ne frapas nin: li kvazaŭ venas al ni kiel nevidebla. Se ni vivas en sklava epoko, ĉio ĉi estas parto de la pejzaĝo.

Nur kiam “civilizo”, “kulturo”, “maniero esti” eniras en krizon, ĉar la produktaj fortoj estas sufokataj de la produktadaj rilatoj, ni subite perceptas la absurdaĵon de tio, kio ĝis tiam ŝajnis al ni ne nur evidenta kaj kutima, sed tute nediskutebla.

21/10/1975<sup>22</sup>

### **KONTRAŬ ĜENTILECO**

Speco de fikciaj homaj rilatoj, nedezirataj nek elektitaj de ni, involvas nin, malhelpante la klarecon de ago kaj la potencon de penso.

---

20. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 2, “Tesine la qualità della vita”.

21. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 5. “Vita quotidiana”, sottofasc. 1.

22. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 2, “Tesine la qualità della vita”.

Se baro ne staros firme inter ni kaj tiuj, kiuj alproksimiĝas al ni pro kialoj, kiujn ni ne elektis kaj pri kiuj ni ne samopiniis, la rilato kun kamaradoj ankaŭ emos fali en burĝan rilaton de “ĝentileco”, kiam ĉiutagon, ĉiun horon, ĉiun momenton ni ne intervenas intence en la agordo de niaj interhomaj rilatoj.

En la universala redukto al varo, en kiun ni estas mergitaj, “ĝentile” akcepti ĉiun renkonton, ĉiun dialogon signifas detrui la realajn eblojn de renkonto kaj dialogo.

Nur tiuj, kiuj scias diri firme “ne”, nur tiuj, kiuj ne estas envolvitaj en ĝentileco, aŭ pli ĝuste en la flataĵo, kiun la burĝa mondo lernis de la feŭda mondo, povos taksii sian dolĉecon. Kaj ilia bonveniga aŭ adiaŭa saluto havos profundan signifon.

23/10/1985<sup>23</sup>

**LA ETIKETO PLENUMAS LA FUNKCION** ŝpari al ni la penon havi rektan kontakton kun la aliulo, informi nin persone pri liaj deziroj, kompari ilin aŭtentike kun la niaj por identigi aŭ elpensi, se eble, komunajn vojojn, kiuj rajtigu nin ambaŭ.

Ebligi la ritigon kaj abstraktigon de interhomaj rilatoj, kiujn etiketo emas alt rudi al ni, signifas abdiki nian subjektivecon, nian rajton elekti kaj grupiĝi laŭ niaj elektoj.

24/10/1978<sup>24</sup>

**LA SCIVOLEMO DE ALIAJ POVAS ESTI KONSIDERATA** kiel antagonisma al depresio, se per scivolemo ni celas veran intereson, soifon pri scio, kiu estiĝas de la konscio, ke la aliulo, kiu ajn li estu, tenas gravan parton de la sekretoj de la homaro.

Kaj ju pli li posedas ilin, des malpli ili respondas al la ŝablonoj, kiujn la reganta kulturo provas trudi al ni kiel modelojn de sukceso. [...]

La manko de scivolemo, kiun trudas al ni la tiel nomata bona edukado, deprimas agemon de aliaj. [...]

Deprimo ekestas en la senmovaj akvoj de tiuj, kiuj ne havas rilatojn kun la ekstera mondo kapablajn movi iliajn energiojn.

---

23. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 5, “Vita quotidiana”, sottofasc. 6.

24. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 34 “Giovani e anziani”, fasc. 1, “Anziani”, sottofasc. 1.

## **NI LIBERIGU LA LIBERAN TEMPON!**<sup>25</sup>

La vivo ankaŭ konsistas en malgrandaj ripetemaj kaj banalaj aferoj. Sed utilas al Kapitalo, ke laboristoj ne kapablu elpensi novajn manierojn, kiuj ebligus al ili rezervi la malgrandan spacon, kiun ili devas eluzi por malgrandaj kaj banalaj aferoj. Tiel ili liberigus kaj disponigus tempon, spacon, energion por la konkero de pli vastaj lokoj. Tie la kolektivaj procezoj de la homaro povas okazi en la kunteksto de manieroj kaj tempoj, kiuj ebligus al la individuo liberigi sin laŭeble de tio, kio estas privata kaj individuisma, por eniri en la grandajn periojn de la historio.

La lukto por la grandaj signifoplenaj aferoj estas fakte la tasko de ĉiuj membroj de la homa specio. Ili – ĝuste per sia aparteno al la homa specio – fariĝas iusence senmortaj, ĉar dum la jarcentoj daŭros la efikoj de ilia propra ekzisto, iom post iom je reduktita intenseco, sed kun kreskanta amplekso, kiel la cirkloj kaŭzitaĵ sur la akvosurfaco de forte ĵetita ŝtono.

Efektivigas signifoplenan kaj densan politikan agadon tiu, kiu kapablas konsenti kun siaj kamaradoj por defendi – agante juste, sed kun prudento – la vivon de aliaj kaj de si mem, por ke ĝi ne enprofundiĝu en la ŝlimejon de tiu nula kaj senrilata ekzisto, kiun la Kapitalo ŝatus certigi, ke estu la nia.

4/8/1975<sup>26</sup>

### **KAPABLI DIRI NE POR POVI DIRI JES**

Ni devas lerni pli kaj pli bone kiel diri ne, kapabli firme rifuzi, scii respekte sed senhalte ekskludi el nia vivo tion, kio malebligas la konflikton kaj la disvolviĝon tagon post tago, horon post horo de la ligoj, kiuj ebligas al ni agi laŭ la plej riĉa kaj profunda maniero, konforme al la politikaj elektoj, kiujn ni faris.

“Ne” venas antaŭ “jes”, ne nur laŭ kronologia vidpunkto, sed ankaŭ laŭ graveco: fakte, la malakcepto de granda parto de la ekzistanta ebligas al ni elekti punktojn, kiuj gravas en transformo al la estonteco, por lumigi la vojon neniam trafikitan.

---

25. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 2, “Tesine la qualità della vita”..

26. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 5, “Vita quotidiana” sottofasc. 1.

21/9/1975<sup>27</sup>

### **LASU TEMPON AL TEMPO**

Lasi tempon al tempo povas – en iuj kazoj – esti la esprimo de la rezignema sinteno de tiuj, kiuj atendas la solvon de siaj problemoj nur de la paso de la eventoj.

Lasi tempon al tempo en aliaj kazoj povas reprezenti la esprimon de antikva kamparana saĝo, kiu scias atendi la maturiĝon de la fruktoj de la tero, zorge kultivante la grundon, en kiu ili kreskos.

### **LA DUBO KIEL VALORO<sup>28</sup>**

Kutime ni identigas dubon kun malagrabla stato de angoro kaj sensekureco kaj multaj el ni ŝatus esti – se eble – sen duboj.

Sed dubi reprezentas la komencon de esplorado, same kiel scivolemo reprezentas unu el la ĉefaj homaj valoroj.

Tiuj, kiuj dubas, ofte estas konsiderataj nesekuraj: sed enriskiĝi en serĉado, esti disponebla por alfronti la rezultojn ne estas pruvo de malsekureco, sed de sekureco kaj kuraĝo.

### **ĈU OPTIMISMO AŬ PESIMISMO?<sup>29</sup>**

Ĝi estas falsa problemo.

Ne temas pri akcepti la formulon “la optimismo de la volo kaj la pesimismo de la racio”, sed temas pri trejnado de niaj sentoj por percepti la tutan realon.

Temas pri trejnado de nia aŭdkapablo por percepti la bruon de la kreskanta herbo.

3/11/1975<sup>30</sup>

### **LA REGADO DE MISUZO**

La regado de misuzo estas ege vasta. Ĝiaj dimensioj iras de la faraonaj dimensioj de la sklavamasoj pen-mortigitaj por la konstruado de la piramidoj ĝis la mikroskopaj dimensioj de altrudo al la kunulo de malgranda atendo, kiu ne estas pravigita de komunaj celoj, sed nur esprimo de individualisma intereso.

---

27. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 32 “Favole, filastrocche, proverbi”, fasc. 3, “proverbi”.

28. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 2, “Tesine la qualità della vita”.

29. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 46 “Personalità e rapporti interpersonali 2”, fasc. 7, “Morale”, sottofasc. 2.

30. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 2, “Tesine la qualità della vita”.

**FANTAZIO ĈIAM ESTIS KONSIDERATA** fuĝo de la realo. Sed ni scias, ke fantazio povas anstataŭe esti maniero firme kaj konkrete ekposedi eblan realon – ankoraŭ ne ekzistantan – kiu nur per nia imago fariĝas tia. Fakte, sen la krea projekto ĝi neniam eblus kaj tial neniam ekzistus en la konkreteco de la faktoj.

### **LA PAROLO: NEMALHAVEBLA ARMILO POR KLASBATALO**<sup>32</sup>

Se la socio, en kiu ni vivas, ne tute sukcesis kondiĉigi nin suferi la misuzojn nur per silento aŭ per parolado pri io alia, ni povos ekzameni kaj priskribi la efikon, kiun ĝi havas sur ni kaj nia penso per eksteraj situacioj, uzante vortojn. Ili ebligas al ni konektiĝi kun samuloj por interkonsenti kun ili pri antaŭeniga programo celanta transformadon – je la individua kaj kolektiva nivelo – de la komencaj situacioj.

Kiam ni ne parolas por kaŝi la veron, sed por manifesti ĝin kaj serĉi ĝin kune, paroli egalas agi. Tio estas ne nur, ĉar vortoj esprimas kaj modifas la animstaton de tiuj, kiuj ilin elparolas, sed ankaŭ ĉar la fakto mem paroli malkaŝas kaj plifortigas la volon agi per la kunligoj, kiuj poste ebligas al ni plani la agadon mem kaj efektiviĝi ĝin kolektive.

Krome: ne nur paroli ŝanĝas la humoron de la parolanto kaj de tiuj, kiuj lin aŭskultas, sed ĝi estas – en si mem – esprimo de fido de la subjekto al la ebleco de kunligo kaj al la kapablo kompreni kunulojn.

Sed la kompreno de la kamaradoj kaj la ligo kun ili estos siavice pli intensa kaj efika depende de la vortoj, kiujn ni povis trovi por peti ilian aliancon.

La dubo pri la efiko de vortoj estas dubo karakteriza de la regantaj klasoj, kiuj, por kaŝi la sociekonomikan kaj kulturan subpremado, kiun ili faris, estas devigitaj kaŝi la veron de la ekspluatatoj. Kaj – por pli bone kaŝi ĝin de la ekspluatatoj kaj por pli bone savi sian vizaĝon – ili provas kaŝi ĝin eĉ al si mem.

La aktivulo de la laborista klaso serĉas diskuton kaj debaton. Konsciante, ke vortoj ankaŭ servas por kaŝi la veron, li ne dubos pri la utileco de diskuto kaj debato, bone sciante, ke unu el la plej potencaj iloj de la regantaj klasoj estis – en ĉiuj tempoj – forigi la vorton el la malsuperaj klasoj.

Kiam tio ne estis farita perforte. Ĝi estis farita en pli kaŝa kaj subtila maniero, disvastigante la kredon, ke paroli estas tre malfacila arto plena je kaptiloj. Tiel la vorto – kiu reprezentas la fundamentan diferencon inter la mondoj de homoj kaj bestoj – estas iel ŝtelita el ekspluatatoj kaj subprematoj. Ekspluatataj kaj subprem-

31. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 5, “Vita quotidiana”, sottofasc. 1.

32. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 2, “Tesine la qualità della vita”.

ataj estas ne nur [...] senĉese minacataj pro la fakto, ke la enhavo de iliaj paroladoj povus malplaĉi al la reganta klaso – kiu posedas la ilojn por severe subpremi ilin – sed [...] ankaŭ humiligitaj de la perspektivo, ke ĉio, kion ili diris, povus ŝajni ridinda, ĉar ĝi ne respektas la lingvajn leĝojn starigitajn de la regantaj klasoj kaj konigitajn kvalite kaj kvante en selektema kaj malsama maniero laŭ la grado okupata de la subjekto en la hierarkio de socio dividita laŭ klasoj.

Rekapti en ĝia pleneco la ilon de lukto inter la klasoj reprezentitan de la trafa kaj efika uzo de la parolo – je la nivelo de individua aŭ grupeta vivo kaj je la nivelo de grandaj sociaj luktoj – estas tasko de nekalkulebla politika signifo. Ĉiu el ni povas kontribui al ĝi ĉi tie kaj nun, kuraĝigante paroli kaj aŭskultante kun la plej profunda atento ĉiun ajn, ĉu infanon aŭ ekspluatiton humiligitan en sia esprimkapablo, kiu starigas por preni la vorton publike, antaŭ kamaradoj kaj kontraŭuloj, venkante obstaklojn, arte disponitajn de la subpremantoj, por malhelpi kaj malfaciligi la ligan inter ĉiuj subprematoj.

### **LA PAROLO KIEL DEMOSTRADO ANSTATAŬ OL KIEL KOMUNIKADO<sup>33</sup>**

En socio, kie regas malegaleco kaj kie la homo povas esti lupo por la alia homo, la parolo ofte ne estas uzata por la celoj, kiuj plej apartenas al ĝi. Tio estas, por konigi aliajn pensojn, projektojn, sentojn, por starigi taŭgajn ligojn.

Sufiĉe ofte vortoj povas esti uzata por kaŝi la veron prefere ol por malkaŝi ĝin.

Kelkfoje ni kaŝas nin malantaŭ niaj vortoj aŭ ornamas nin per ili.

La parolo uzata por demonstradaj celoj taŭgas por neegala socio.

Tiu kiu demonstradas, postulas admiron de la aliulo kaj tial humiligas tiun, kiu admiras lin.

7/3/1976<sup>34</sup>

### **LA PAROLO NE NUR PREPARAS LA AGON, SED TAKSAS KAJ VALORIGAS ĜIN.**

Donaco, ne akompanata de vortoj, kiuj instigas kaj donas valoron al tiu, kiu ĝin ricevas kaj al tiu, kiu ĝin donacas, restas esprimo de avareco aŭ, almenaŭ, de komunikaj malfacilaĵoj.

**SILENTIGI<sup>35</sup>** kiel malplivaloriga agado aŭ kiel malplifortiga agado dependas de la pov-rilatoj, kiuj ekzistas inter tiuj, kiuj estas silentigataj kaj tiuj, kiuj silentigas.

---

33. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 2, “Tesine la qualità della vita”.

34. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 45 “Personalità e rapporti interpersonali 1”, fasc. 1, “La comunicazione”, sottofasc. 1.

35. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 45 “Personalità e rapporti interpersonali 1”, fasc. 1, “La comunicazione”, sottofasc. 1.



Silentigi estas malplivaloriga agado ofte ekzercita kontraŭ familianoj. Ĝi povas esti farita brutale forigante la parolrajton, aŭ forprenante atenton, aŭ pli subtile atentigante pri aliaj aferoj.

Estas homoj, kiuj pro serio da cirkonstancoj fariĝis “enuaj”. Tiajn homojn oni ne volonte aŭskultas ne pro aroganteco de aliaj, sed pro interna – kvankam provizora – nekapablo atingi la koron de aferoj aŭ temoj.

Tiuj el ili, kiuj posedas povon, povos daŭre enuigi la aliajn dum sia tuta vivo, ĝis subita malkresko de povo, kiel ekzemple la emeritiĝo, metos ilin antaŭ aliajn pli aŭtentike. Kaj tiam povos okazi, ke eble li subite rimarkas, ke li ne plu estas grava por tiuj, kiuj antaŭe ŝajnis doni al li sian atenton aŭ kiuj troige ridis pro liaj stultaj ŝercoj, kiuj nun ne plu ridigas iun ajn .

Silentigi perfortulon aŭ homon, kiu posedas povon, estas plifortiga agado por ĉiuj tiuj, kiuj estas devigitaj aŭskulti lin.

Esti aŭskultata estas nemalhavebla kreskofaktoro. Sed la atento, kiu vere kreskigas la alian, estas kritika atento, kiu postulas ankaŭ reciprokecon.

La postulo de reciprokeco validas eĉ kiam la parolanto estas aŭdata de centoj da homoj, al kiuj li povas diri tion, kion li decidis diri, sed ne sen konsideri la dezirojn kaj bezonojn jam ĉeestantaj aŭ vekitajn de la parolanto. Ni devas ĉiam havi la animstaton de tiuj, kiuj ankaŭ pretas aŭskulti tiujn, kiuj aŭskultas nin.

En la lernejo, instruistoj tro ofte postulas atenton sen scipovo veki ĝin kaj – kio estas pli malbona – sen voli esti atentaj, kiam lernantoj havas ion por demandi.

Tio estas des pli serioza, ĉar la senfina scivolemo de la junulo preskaŭ ĉiam estis severe subpremota kaj la lerneja strukturo estas tia, ke li — se oni atentis lin — anstataŭ senti sin kuraĝigita demandi pri tio, kion li ankoraŭ ne scias, sentas sin devigita demontri tion, kion li jam scias.

Esti aŭskultata estas kreskofaktoro, dum konversacii, babiladi estas konservema faktoro, ĉar ĝi ŝanĝas nek personecon nek situaciojn. Ili emas krei la impreson, ke ne necesas engaĝiĝi por ŝanĝi.

### **AŬSKULTI KAJ ESTI AŬSKULTATA<sup>36</sup>**

Esti aŭskultata estas esenca kreskofaktoro ne nur por la infano, sed ankaŭ por la plenkreskulo dum la tuta vivodaŭro. Sed nia socio petas kaj proponas al ni nur antaŭfabrikitajn servojn, unudirektajn mesaĝojn, kiuj nur petas esti ricevataj, sed ne donas respondojn al niaj petoj.

Esti vere aŭskultata en nia socio estas ia “magia momento”, kiu malofte okazas pro serio da hazardaj cirkonstancoj, koincidoj, humoroj maloftaj kaj neantaŭvideblaj en socio kiel tiu kapitalisma – kiu enfokusigas en aparteco kaj en individuismo.

---

36. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 2, “Tesine la qualità della vita”.

Kelkfoje okazas ke post amorado, la memoro pri tiu forlaso de si asociita kun la intensa atento de la alia restas en la vivo pli tenace en la memoro pri amo kaj – ofte – ĝi konfuziĝas kun ĝi.

Por ke politika militeco ne iĝu ia fremdiĝo, en kiu oni ne plu vivas en ĉiutaga konkreteco, sed en la abstrakteco de ideologio, necesas, ke la plej proksimaj aktivuloj kreu spacon por elmontri kaj diskuti inter si siajn aspirojn kaj siajn malfacilaĵojn ne nur je la nivelo de la ĝenerala politika lukto sed ankaŭ je la nivelo de la ĉiutaga vivo, de la personeco. Tio estas je la nivelo, kiu konsideras la biologian kaj biografian individuecon de ĉiu, krei spacon por ekkoni la kamaradojn kaj konigi sin de ili ankaŭ en la personaj kaj ĉiutagaj aspektoj, same kiel en la kolektiva lukto.

La distanco inter la privata kaj la politika vivo de ĉiu laboristo devas esti superata, por ke oni povu atingi la plej altan gradon de kohereco.

Sed ĉi tio povas esti farita nur se oni kreas la ĝustajn ilojn.

Aŭskulti kaj esti atente aŭskultata, la kapablo establi realan komunikadon inter homoj, kiuj kunhavas la saman vizion pri la mondo kaj faras – fakte – komunan lukton, estas unu el la plej gravaj faktoroj de persona kaj kolektiva kresko.

1/3/1976<sup>37</sup>

**TRE PROFUNDA MEMRESPEKTO** malebligas al ni postkuri lertaĵojn por doni de ni favoran bildon, sed ankoraŭ ne respondantan al la realo.

Nur rezignante fari “bonan impreson” baldaŭ ni povas esti helpataj, per kritiko de kunuloj kaj per persona lernado, plibonigi nin longtempe.

Sed ĉi tiu lasta formo de plibonigo nepre implicas la kritikon de ĉiu formo de persona parado, ne funkcia por politikaj celoj, de la propraj kapabloj. Male, laŭ la konkurencaj formoj de la burĝa socio, ni povos eventuale “fari bonan impreson” se ni estos perdintaj ĉian volon kaj ĉian deziron.

**MULTAJ MALESTIME ELDIRAS LA FRAZON “PAROLI PER SLOGANOJ”**<sup>38</sup>, sed la aboristoj, kiuj pasigas ok horojn sur la muntado, estas profunde dankemaj al la kamarado, kiu scipovas resumi siajn bezonojn per mallonga, incisiva kaj efika frazo, tiel ke la mallonga frazo povu esti transformata – en la ĝusta momento – en batakrion por la lukto, kiun ili intencas fari.

---

37. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 46 “Personalità e rapporti interpersonali 1”, fasc. 5, “Felicità”, sottofasc. 1.

38. A. Bernardoni, *Attività Terapeutica Popolare*, Cooperativa tipografi, Modena, 1976, p. 22.

9/8/1976<sup>39</sup>

**TIUJ, KIUJ NE SUKCESIS ATINGI** la plej aŭtentikajn fakojn de la politikaj kaj sociaj instigoj de ĉiu homa vivo, kiu okazas en socio dividita laŭ klasoj, ofte kompensas ĉi tiun foreston kaj provas plenigi malplenen, kiu per si mem ne povas esti plenigata per la rimedo de surgatoj, en kiuj la foresto de realaj signifoj estas kompensata per pitoreskaj konotacioj.

Vivo en alpa bivako, vojaĝo al foraj landoj, renkontiĝo kun fremdulo aŭ almenaŭ vespermanĝo en “karakter-plena” tavernaĉo povas “doni koloron” al politike obtuza vivo.

Tamen, ĝi estas koloro, kiun la unua pluvo forportos, malkaŝante la internan malriĉecon de pitoresko, kiu neniam povas anstataŭi realajn vivajn instigojn.

17/3/1975<sup>40</sup>

### **SPONTANECO KAJ SPONTANEISMO**

Esti spontanea signifas por plenkreskulo havi tian konsistencon, ke oni neniam bezonas kaŝi ion de si antaŭ siaj kunuloj, de kiuj oni deziras esti plene konata.

Tio ne signifas, ke en la politika lukto, fronte al la kontraŭulo, la sinteno povas daŭre esti same libera kaj tuja. Sed se spontaneco reprezentas kapablon plene esprimi sin antaŭ la amiko, kaj estas do gardenda homa valoro, la samon oni ne povas diri pri spontaneismo. Mi celas per ĉi tiu termino ellason de internaj aŭ eksteraj stimuloj venantaj de realo, pri kiu neniu kritika taksado estis farita adekvate por decidi, ĉu ĝi devus esti akceptota, malakceptota aŭ transformota.

Esti spontaneisma signifas ne esti kompreninta la lukton, kiu neripareble okazas inter du antagonismaj konceptoj de la mondo. Tio signifas konsideri la realon tuto, negrave ĉu homogena aŭ malorganizita, kiu ĉiukaze reprezentas aron da fortoj, kontraŭ kiuj oni ne posedas taŭgajn ilojn por mezuri ilian direkton.

Se ni ne scias kiel identigi la fortojn, kiuj iras al la estonteco, disigante ilin per klara fortranĉo de tiuj, kiuj plifortigas la ekzistantan staton de la aferoj, ni ne povas havi veran klaskonscion. Ni ne havas gvidilon por agado kaj ni nur povas forlasi nin mem al spontaneismo. Alivorte, ni povas nur pasive submeti nin al la ekstera mondo, rezignante nian kontribuon al ĝia ŝanĝo.

Entute spontanea povas esti nur tiu, kiu klare faris kaj plifortigis dum la tempo la fundamentajn elektojn de la vivo.

Esti spontanea signifas esti kohere elektinta de longa tempo.

---

39. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 46 “Personalità e rapporti interpersonali 2”, fasc. 5, “Felicità”, sottofasc. 1.

40. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 2, “Tesine la qualità della vita”.

Esti spontaneisma signifas lasi nin de tempo al tempo esti kaptitaj de neelektitaj stimuloj: alivorte, esti spontaneisma signifas lasi sin drivi.

7/10/1974<sup>41</sup>

### **LA MORTAJ TEMPOJ DE LA TAGO MORTIGAS LA EVLUON DE LA VIVO.**

Ni akceptas sen ribeli, ke manĝoj markas la ritmon de nia tago. Ni estas tiom avaraj en homaj rilatoj, ke ni lasas renkontiĝon ĉe la tablo aŭ en aliaj okazaj aŭ “devigaj” cirkonstancoj iĝi surogato de dezirataj, volitaj, zorge planitaj kunvenoj por la celo de komuna kresko.

### **RENKONTIĜI POR MANĜI AŬ POR KOMUNIKI?<sup>42</sup>**

Amika konversacio kiel surogato de vera homa komunikado.

Homa komunikado akiros la gravecon, kiun ĝi meritas, kiam ĝi ne plu estos hazarda sed programita kaj ne plu konfuziĝos kun la biologia bezono sin nutri.

Tre ofte hodiaŭ ni ankoraŭ ne scias distingi inter la bezono komuniki kaj la bezono manĝi kaj ni longe restadas ĉe la tablo preter tio, kion postulas la malalta kaloria konsumo de la moderna vivo: tre ofte la abundo de manĝaĵoj denuncas la mankon de vera komunikado.

La renkontiĝo por havi komunan manĝon, renkontiĝo kiu produktas formon de konversacio funkcia al konservado kiel kromprodukto, estos iam afero de la pasinteco

**LA AKIRO DE PERSONAJ KAPABLOJ<sup>43</sup>** ĉiam okazas en individuisma, preskaŭ ĉiam en konkurenca maniero, kiel oni kutime faras en nia lernejo – ekde infanlernejo ĝis universitato. Ĝi ne konsistigas veran riĉiĝon de la personeco, sed falsan memrealiĝon, kiu anstataŭas kaj malhelpas la evoluon de la personeco de la individuo, kiu, por esti vere reala, devas esti konektita al la disvolviĝo de la tuta homaro.

La evoluo de la individuo estas nur iluzia, se ĝi estas elradikigita el la evoluo de la tuta homaro: sen historio ekzistas neniu biografio, sed nur naturo kaj biologio. Tio estas pura besteco.

---

41. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 5, “Vita quotidiana”, sottofasc. 1.

42. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 5, “Vita quotidiana”, sottofasc. 2.

43. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 45 “Personalità e rapporti interpersonali 1”, fasc. 3, “La concezione della personalità”, sottofasc. 2.

[...] **LA SOLA MANIERO, KIU EBLIGAS DISVOLVI**<sup>44</sup> sian personecon en relative malpli nekompleta kaj malkontentiga maniero, estas agi [...] liberigante sin, almenaŭ parte, per daŭraj kritikaj kaj memkritikaj procezoj, de la modeloj de personoj de “sukceso” proponitaj al ni de la dominanta kulturo je la servo de la interesoj de la reganta klaso [...].

**LERNEJA SUKCESO NE INDIKAS LA KONTENTIGAN KRESKON**<sup>45</sup> de homa personeco.

Tre ofte la tiel nomata lerneja edukado ne nur ne estas vera edukado, sed ĝi eĉ ne estas reala instruado.

Fakte, ĝia daŭra sinteno estas transdoni, neniam forpreni aŭ [...] ricevi.

Al la lernanto oni senĉese altrudas pli-malpli validajn sciojn laŭ kutime konservativa perspektivo, sed oni neniam interesiĝas scii kiaj timoj, kiaj antaŭjuĝoj, kiaj suferoj gastas en li.

Ofte la lernanto estas malpli respektata de la instruisto ol arbo estas respektata de farmisto, kiu favoras, kvankam por siaj propraj celoj, ĝian kreskon.

La studento estas traktata kiel ujo kaj, ĝis kiam la ujo ricevas kaj retenadas tion, kio estas verŝita en ĝin, neniu zorgas pri kiel ĝi estas farita.

Nur kiam la lernanto ne ricevas aŭ retenas tion, kio estas verŝita en lin, oni zorgos pri liaj eblaj suferoj. Sed oni vidos ilin ne rilate al la tuta personeco de la lernanto aŭ rilate al lia rajto je vivĝojo, sed preskaŭ ekskluzive rilate al lia lerneja malsukceso. Alivorte, rilate al la malpliigo de lia kapablo ricevi kaj reteni nociojn.

De tia lerneĵ-tipa zorgo al li, la lernanto povos ricevi nur damaĝon, ĉar oni kutime alvokas por li specialistojn, kiuj konsideros liajn vivajn kaj interhomajn problemojn kiel medicinajn problemojn, farante juĝadojn kaj eldonante raportojn, kiuj eĉ pli malfaciligos lian vivon. Ili markos lin kiel mensmalsanulon aŭ kiel eblan kandidaton por mensmalsano kaj tiel malvalidigos liajn gestojn kaj vortojn. Tiel lia kredindeco malpliigo dum pliigo lia soleco kaj liaj malfacilaĵoj komuniki kun la aliuloj.

Tiel do, ni opinias, ke gravas, ke edukistoj kaj lernantoj alfrontu sen antaŭjuĝoj la problemojn rilatajn ne nur al malsukceso sed, paradokse, ankaŭ rilatajn al nekutima lerneja sukceso. Ĝi estas simptomo antaŭ kiu ĉiuj estas gajaj kaj tre malmultaj estas alarmitaj, dum ĝi ĉiam devas vekti la atenton de la instruisto: junulo, kiu dediĉas sin “korpe kaj anime” al studado en lernejo kiel la nia kaj atingas la plej altajn sukcesojn, estas kutime malfeliĉa junulo ankaŭ ĉar, estante

---

44. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 45 “Personalità e rapporti interpersonali 1”, fasc. 3, “La concezione della personalità”, sottofasc. 2.

45. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 2, “Tesine la qualità della vita”.

la lernejo kia ĝi estas, estas malfacile ebligi, ke lia studo estu vere la rezulto de la deziro koni.

Anstataŭe, ĝi estas kutime la rezulto de la deziro havi ajnan formon de sukceso, kiu povu kompensi multajn gravajn aspektojn de la vivo, en kiu li renkontis gravajn fiaskojn. Temas precipe pri la kunteksto de emociaj rilatoj ĉu familiaj aŭ eksterfamiliaj.

La deziro koni la mondon ne igus lin modela lernanto, sed ĝi komprenigus al li, ke gravaj sciofontoj estas fremdaj al la lernejo.

## **PERDOTA HAVAĴO, SAVOTA VIVO<sup>46</sup>**

[...] Ĉiu ajn formo de deziro aŭ posedo, kiu rekte aŭ nerekte kolizias kun la estonteco de la homaro, transformas la subjekton en iun, kiu havas ion por defendi, ĝi transformas lin en iun, kiu – pli aŭ malpli frue – en malferma aŭ kaŝa maniero, staros kontraŭ la novo kaj kontraŭ la fortoj de la proletaro, kiuj antaŭenigas la novon kaj reprezentas ĝin [...].

Dum vi havas malnovon por konservi, vi ne povas vere ami la novon: povas sufiĉi terpeco, domo, malgranda ofico, sinteno de konkurado, poseda amo por malproksimigi nin de kamaradoj kaj de la lukto.

Foje eĉ gardenda bildo de si mem povas konsistigi posedaĵon, al kiu oni al-kroĉiĝas por malhelpi ŝanĝojn interne kaj ekstere de ni.

Nur la intenca malakcepto de ĉiu ajna formo de privata posedo kaj de ĉiu ajna formo de persona ambicio permesos al ni meti nian tutan forton kaj nian tutan energion – povigitajn per ĝustaj ligoj – en la lukton por venki la ekzistantan staton de aferoj.

Kiu havas neniun havaĵon savendan, neniun posedaĵon defendendan, povas ankaŭ tamen ektroviĝi en konservativa pozicio, se li ne scias trovi respondon, kiam iu demandas al li “sed kion vi povas perdi?”.

Preskaŭ ĉiam temas pri laboristoj koloniitaj fare de la reganta kulturo, kiuj devas perdi sian reputacion kiel obeemajn servistojn de la kapitalisma sistemo, la kondescendendan estimon, kiun eĉ la apartenantaj al la regantaj klasoj scias doni al “tiuj, kiuj adaptiĝas kondukti laŭ sia rango”.

**ĈU TEMAS PRI PRECEPTEMA KAJ SUBPREMA MORALO<sup>47</sup>** aŭ pri devontigo celanta antaŭvidi la efikojn de siaj agoj por superi la homan prahistorion?

---

46. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 2, “Tesine la qualità della vita”.

47. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 46 “Personalità e rapporti interpersonali 2”, fasc. 7, “Morale”, sottofasc. 2

### ĈAPITRO 3

## Ĉiutaga subpremo, ĉiutaga liberigo. Povaj rilatoj en la familio

#### EBLA VIVO LOĜAS EN VI

Ebla vivo loĝas en vi,  
kiun vi ankoraŭ ignoras.  
Ĝi estas en vi, sed vi ne vidas ĝin:  
rigardu ĝin kaj ĝi fariĝos reala vivo.

ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/  
busta19 "Poesie a macchina (Poeziaĵoj per maŝino)

## ENHAVTABELO

- La infano naskiĝas kun la senkondiĉa reflekso...
- La bezono ne subpremi infanan scivolemon
- La infano kiu alfrontas la vivon...
- La povo de la plenkreskulo super la novnaskita infano...
- Sed kiu respektas la infanojn?
- Nek fabeloj nek legendoj, sed la kapablo interagi...
- La korinklinoj de la infano
- La rilato infano-plenkreskulo...
- Honoru vian patron kaj patrinon! Kiu honoros la filon?
- Reciprokeco de la eduka rilato gepatroj-infanoj
- Juna burĝo kaj privilegio
- La privata proprieto de la infanoj
- Kiam infanoj, kiam junuloj pensas pri amo...
- Kiu povas vere ami la vivon?
- Tro longa gepatrado kiel sencerebrig-agado
- En ajna aĝo de vivo...
- Oni neniam estas plenkreskulo unufoje por ĉiam...
- Homa kresko
- Plurfamilia kunlaboro
- Plurfamiliaj mikrokollektivoj kaj politikaj kolektivoj
- Por ni malferma familio signifas...
- Neniam zorgu pri ne esti amataj...
- Neposedema amo aperas al multaj kiel malhavo...
- La blinda amo de la klasika mito...
- Mi povas krei simfonion...
- Geedzeca ekzaltigo
- Se mi supreniras la turon "Ghirlandina"...
- Viro kaj virino: renkontiĝo konstruota
- Vireco kaj virineco
- La kvalito de la rilato.
- La konservado de la specio
- La seksa ago ne povas esti fonto...
- Nomi panon la pano kaj vinon la vino
- Ni kompatigas feroce kondiĉitan hundon...
- La burĝa virino...
- Ne plu esti juna
- La aĝoj de la vivo
- Proponu al maljunuloj ripozon anstataŭ devontigon...
- Leonardo da Vinci sub belega kapo de maljunulo...
- Eĉ en la periodo, en kiu nia individua vivo nun estas finiĝanta...
- Se tio, kio finiĝas bone, estas bona...



16/7/1980<sup>1</sup>

**LA INFANO NASKIĜAS KUN LA SENKONDIĈA REFLEKSO** de orientiĝo kaj esplorado. Alivorte, kun la bezono esplori la mondon, tuŝi ĝin konkrete, transformi ĝin por ĝin koni: tio, kio povas ŝajni foje agresemo estas nur esploremo, tio kio ŝajnas perforto, estas nur nesperta maniero demandi al homoj, aferoj, bestoj kaj postuli respondojn: “kiu vi estas vere? kiel vi estas farita? kio estas en vi? kion vi kaŝas al mi? kiaj estas la rilatoj, kiuj povas esti starigataj inter ni?”

Ĉi tiuj estas la demandoj, kiujn la infano, kiu ankoraŭ ne kapablas paroli, faras al la vivanta aŭ nevivanta mondo, kiu lin ĉirkaŭas, komunikante kun ĝi per la nevortaj iloj, kiujn li posedas: ekkapti, premi, disŝiri, flari, maĉi, suĉi.

Nenia agresemo estas en tio, sed nur nehaltigebla deziro koni la ĉirkaŭan medion, ekkomuniki kun ĝi por kontentigi biologiajn bezonojn, kiuj estas fariĝontaj pli kaj pli homaj.

Ĉi-rilate, estas grave rimarki, ke la humanigo de la biologia bezono ne estas individua procezo sed ĉefe socia.

Profit-bazita socio permesas nur reduktitan kaj misformitan humanigon de biologiaj bezonoj. Paroli pri agresemo, krueleco, malbono (Diablo) kiel denaskaj en la infano estas absolute sensenca: la infano ne konas la diferencon inter inerta materio kaj vivanta materio.

Se ĵeti glason sur la teron helpas lin scii, ke vitro estas fragila, se tiri elaston helpas lin ekkoni la etendebledon de iuj korpoj kontraste al la rigideco de aliaj, tiri la voston de la kato estas por li nek gesto de agresemo nek gesto de krueleco, almenaŭ ĝis li ne komprenas, ke la vivanta materio reagas kun sufero al iuj formoj de manipulado.

La rimedo estas do ne sufoki la scivolemon de la infano (aŭtoritata procedo celanta provoki la ekeston de reala agreso kontraŭ aliaj aŭ, en manko de povo, kontraŭ si mem). La rimedo anstataŭe konsistas en havigi al la infano ilojn por pli bone kontentigi lian scivolemon kaj pli efikajn metodojn por esplori kaj koni la realon.

La rimedo konsistas en povigi la infanon, provizante al li novajn esplorajn ilojn, pli efikajn manierojn pridemandi la mondon.

La problemo estas transformi nespertan esploriston, nekapablan kalkuli la efikojn de sia propra esploro sur la esplorobjekto, en pli spertan esploriston, kapablan kritike pridubi la mondon.

Sed ĉi tiu kapablo, tiom altvalora kaj por la individuo kaj por la specio, estas danĝera por tiuj, kiuj tenas la povon kaj volas ĉiakoste ĝin konservi, nesenteme al la damaĝo de la individuo kaj de la specio. Tial edukado, kiu transformas la in-

---

1. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 46 “Personalità e rapporti interpersonali 2”, fasc. 10, “Bambini”.

fanon en pli bonan esploriston, povas nur naskiĝi kiel rezulto de kolektiva esploro de tiuj, kiuj ne tenas la povon.

Mi estas konvinkita, ke multaj homoj en la hodiaŭa mondo vere volas alfronti la malfacilaĵojn, kiujn tio neeviteble kunportas, kaj agi por malpliigi la obstaklojn, kiuj malhelpas la kritikan esploron de junaj kaj tre junaj esploristoj pri ĉi tiu mondo.

Ne la amo de junuloj al esplorado, sed la alligiteco al la povo de la maljunuloj ĝis nun malhelpis ilin igi ĉi tiun mondon pli bona loko por vivi. Unu el la plej efikaj ideologiaj armiloj kontraŭ tiuj, kiuj volas kompreni, estas paroli pri denaska agresemo kaj certigi, ke la serĉado de junuloj estu konsiderata kiel esprimo de ĉi tiu agresemo.

Nur tiuj, kiuj havas nenion por kaŝi, tiuj, kiuj havas neniun perdendan povon super aliaj, sed nur povon konkerendan super si mem, povas ne timi infanon aŭ junulon, kiu faras al si kaj al aliaj la bazajn demandojn.

Oni povas rezigni je povo super aliaj nur akirante realan povon super sia vivo.

Ĉi tio estas la deklarita celo de la esploroj antaŭenigitaj fare de la Populara Terapio Agado, kiu intence proponas venki ĉe la “subpremata subjekto” ĉian ambiguan aliancon kun la subpremanto. Ĝi ankaŭ proponas, kie eblas, konvinki la subpremanton, kiom avantaĝa estas ankaŭ por li la transformado de rilatoj de subpremo kaj perforto en rilatojn de egala alianco. Tio estas la sola sinteno, kiu permesas al la homoj savi sin de la malbonoj, kiuj devenas de aliaj homoj, por ke ili tiam povu, ĉiuj kune, plifortigi la ĝojojn kaj malpliigi la dolorojn, kiuj devenas el la biologiaj aspektoj de nia personeco.

## **LA BEZONO NE SUBPREMI INFANAN SCIVOLEMON<sup>2</sup>**

La instinkto de esplorado – se subpremita – turniĝas en agreson.

Fakte, agreso ne estas instinkto, sed artefakto, kiu reprezentas la respondon de la suferanta infano al ĉi tiu socio, kiu ne nur malebligas al li realigi siajn potencialojn, sed eĉ malpermesas al li esti scivolema. Fakte, estas tro da aspektoj, kiujn li ne devas esplori, estas tro da aferoj, kiuj ne devas esti komprenataj, por ke la ekzistanta ordo restu respektata.

**LA INFANO KIU ALFRONTAS LA VIVON<sup>3</sup>** povas esti komparata al iu subite ĵetita, post ŝiprompiĝo, en mondon radikale alian ol tiu, en kiu li ĝis tiam vivis.

---

2. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 46 “Personalità e rapporti interpersonali 2”, fasc. 10, “Bambini”.

3. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 46 “Personalità e rapporti interpersonali 2”, fasc. 10, “Bambini”.

Ektirita – en por li neatendita maniero – el mondo, kiu estis ekstreme dolĉa kaj komplete protektema, kaj ĵetita en mondon de lupoj, la novnaskito ne nur ne scias kiel moviĝi, sed ne komprenas la lingvon de tiuj civilizitaj “sovaĝuloj”, kiuj ĉirkaŭas lin ĉe lia naskiĝo... Ili estas preskaŭ ĉiam plenaj je amo al li sed jam, senhezite, konvinkitaj, ke ili povas prave ekposedi lian vivon kaj trudi al li ne nur lian nomon kaj familian nomon, religian kredon, mondkoncepton, kutimojn, lingvon, sed eĉ gustojn kaj dezirojn, kiujn plejofte la infano neniam evoluus per si mem.

Temas pri moroj kaj kutimoj, multaj el kiuj estos arbitre difinitaj kiel “instinktoj” eĉ de tiuj, kiuj scias, ke vera instinkto devas esti komprenata ekskluzive kiel kapablo, do kiel parto de la genetika heredaĵo de ĉiuj membroj de specifa specio, sendepende de la lernado.

**LA POVO DE LA PLENKRESKULO SUPER LA NOVNASKITA INFANO**<sup>4</sup> estas totala: ĝi estas povo de vivo aŭ morto, sen ebleco de apelacio.

**LA NOVNASKITO KIEL TIA APARTENAS AL LA HOMA SPECIO**,<sup>5</sup> sed eĉ antaŭ ol ĝia naskiĝo, ĉirkaŭ ĝi prepariĝas aro da iloj de kondiĉado, kiu iom post iom malinversigeble forprenos ĝin de ĝia apartena specio por atribui ĝin – en deviga maniero — al ĝia apartena klaso.

15/2/1978<sup>6</sup>

### **SED KIU RESPEKTAS LA INFANOJN?**

Al la deziro de vero kaj kono de la mondo fare de la infano, la plenkreskulo, kiu tenas la povon, respondas en la granda plimulto de la kazoj per serio da dogmoj.

**NEK FABELOJ NEK LEGENDOJ**,<sup>7</sup> sed la kapablo kreive interagi kun la materia konkreco de la mondo

---

4. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 46 “Personalità e rapporti interpersonali 2”, fasc. 10, “Bambini”.

5. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 46 “Personalità e rapporti interpersonali 2”, fasc. 2, “Condizionamenti di classe”, sottofasc. 1.

6. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 47 “Progetti libri”, fasc. 3, “Chi vuoi veramente essere?”.

7. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 2, “Tesine la qualità della vita”.

La infano bezonas nek fabelojn, nek legendojn. Sed ĝi bezonas kiel eble plej baldaŭ akiri senton pri la konkreteco de la mondo, la neŝanceblan konvinkon, ke la ĉirkaŭa mondo ekzistas en si mem, sendepende de la pensa materio, per kiu la homo estas dotita: la cerbo.

La centra nerva sistemo kapablas doni novaĵojn pri la ekstera mondo kaj dikti la agadon, per kiu ĉiu individuo – per ligo kaj interagado kun aliaj individuoj kaj kun aliaj sociekonomiaj, kulturaj kaj politikaj fortoj – povas influi kaj esti influata, transformi kaj esti transformata, en daŭra kaj eble senlima ekspansio de sia sfero de percepto kaj agado, kiu, por kreski, devas senĉese rompi la obstaklojn, kiuj aperas de tempo al tempo kontraŭ ĉi tiu forto, kiu permesas al ĝi agi por ekposedi la mondon pli kaj pli konkrete.

La obstaklo, kies venkado permesos la trapason de la mondo de neceso al la mondo de libereco, estas reprezentata de la divido de la socio en klasojn.

11/05/1978<sup>8</sup>

### **LA KORINKLINOJ DE LA INFANO**

La amema riĉeco de la infano, de ĉiu infano, estas ligita al multoblaj faktoroj. Sed sendube gravan lokon inter ili havas la manko aŭ la malfortigo de la konkurenckapablo ligita al la produkt-rilatoj. Tiu konkurenckapablo ofte atingas la infanon, precipe se tre juna, en konsiderinde mildigita maniero.

Sed, precipe en la regantaj klasoj, la infano estas pli fruaĝe kaj pli intense “edukita” por starigi al si la idealon fariĝi la pinto de la klaso.

Dum ĉi tiu formo de kondiĉado plifortiĝas, la afekciaj kapabloj de la infano malpliĝas kaj ofte esprimas sin per nereкта kaj enkadrigita maniero.

### **LA RILATO INFANO-PLENKRESKULO<sup>9</sup> devas esti komplete renversita.**

Estas la plenkreskulo, kiu transformas la infanon en individuon apartenantan al sia klaso. Estas la plenkreskulo, kiu ne scipovas iom post iom malligiĝi de la infano ĝustatempe, ĉar li ne sciis plenigi sian vivon per validaj enhavoj.

La Edipo-komplekso devas esti komplete renversita: estas antaŭ ĉio la “profitema” posedo de la gepatroj, kiu faras ĉion por malhelpi la realan kreskon de la homa ido – izolante lin kaj instigante al li ĉiajn timojn.

Misformita kaj timema personeco kondutos laŭ la dezirata maniero.

---

8. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 46 “Personalità e rapporti interpersonali 2”, fasc. 4, “Famiglia e affetti”, sottofasc. 1.

9. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 53 “Quaderni”, fasc. “1972”.

**HONORU VIAN PATRON KAJ PATRINON! KIU HONOROS LA FILON?**

Ĉu la infano devos atendi – siavice – esti patro por havi la rajton esti profunde respektata kaj amata?

Ĉi tiu rajto apartenas al ĉiu homa estaĵo, sed des pli necesas, ke ĝi estu ekzercata pri infanoj kaj junuloj, kies personecoj, tre rapide transformantaj, estas ofte pli sentemaj – ol tiuj de maturaj homoj – al la ricevataj batoj. Tio estas ankaŭ ĉar – en nia socio – la infano ne rajtas elekti sian propran rondon de amikoj kaj kunuloj, el kiuj li povas ĉerpi forton kaj trankvilon kontraŭ la daŭraj misuzoj ekzercitaj de tiuj, kiuj tenas preskaŭ senliman povon super li: la plenkreskuloj.

**RECIPROKECO DE LA EDUKA RILATO GEPATROJ-INFANOJ<sup>11</sup>**

Aliflanke, estas pli malfacile kompreni, ke ne nur la junulo, sed eĉ la novnaskito povas reprezenti neelĉerpeblan fonton de lernado kiel konkreta konverĝpunkto, kie la biologio kaj la socio interkruciĝas, dialektike influante unu la alian en tre rapida sinsekvo de transformoj.

Eĉ tiuj gepatroj, kiuj ne posedas validajn kulturajn kaj politikajn ilojn kaj facile iĝas predo de superstiĉo, povos vidi – tra la infano – la interplektiĝon de biologio kaj socio, kiu okazas ekzemple en la lernado de lingvo, en la akiro de paŝkapablo, en la socialigo de la infano.

Por ĉiu ajn (ne gravas ĉu havanta sciojn rilatajn al la procezoj de kresko, transformo kaj lernado), estos fonto de miro la surprizo, kun kiu la infano alfrontas mondon al li nekonatan kaj tute problemriĉan, same kiel ĝiaj senĉesaj “kial?” Mirinda estos li akapablo vidi kaŭzajn rilatojn, kiuj ofte estas imagataj aŭ malĝustaj, sed foje kapablaj malkovri surprizajn alirojn, fantazi-plenajn komparojn inter situacioj kaj objektoj, kiujn la plenkreskulo nun kutimas vidi kaj distingi kiel klare disigitaj. Tiu fakto ĵetos novan lumon en la okulojn de plenkreskuloj pri multaj aspektoj de la vivo, kiuj jam ŝajnis evidentaj kaj tute banalaj.

Ĉiuj gepatroj entuziasme rakontas epizodojn rilatajn al la kontakto de la infano kun la ĉirkaŭa realo, ofte sen rimarki, ke la aŭskultantoj ne kunhavas la intereson, kiun kutime provokas nur la vigla kaj freŝa ĉeesto de infano.

Du epizodoj: infano ĵetas lakton sur la plektaĵojn de sia fratino, karesante ŝin kaj nomante ŝin “miaŭo”.

En la momento, kiam la trajno forlasas longan tunelon, infano ekkrias: estas jam morgaŭ.

10. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 46 “Personalità e rapporti interpersonali 2”, fasc. 4, “Famiglia e affetti”, sottofasc. 2.

11. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 46 “Personalità e rapporti interpersonali 2”, fasc. 4, “Famiglia e affetti”, sottofasc. 1.

Ofte la plenkreskulo, jam laca, senkuraĝa, nekapabla vidi la eblecon de socia transformiĝo, estas puŝata de la scivolemo de infano aŭ de la entuziasmo de junulo rekonsideri la ĉirkaŭan realon kiel problemon kaj do kiel objekton de esploro kaj transformado, precipe socia.

Ofte tiuj, kiuj nun konsideras “evidenta” la dividon de la socio en klasojn, estas skuitaj de specifa demando de sia filo: kial mi ne povas aĉeti novan palton? Kial Paĉjo Kristnasko alportis al mi nur malgrandan aŭton, dum al la filo de la kuracisto li alportis aŭton pli grandan ol li mem?

La infano senĉese reproponas problemojn, pri kiuj la plenkreskulo jam rezignis diskuti. Ĉi-kaze la plenkreskulo povas reagi al infana scivolemo pridubante sin, sian rezignacion, sian izolitecon, sian fatalismon, aŭ li povas reagi kun kolero provante sufoki la kialojn de la infano, kiu tiel estos senigita de la plej grava instrumento de scio de la homo: scivolemo kaj la deziro esplori la mondon, el kiu povas ekesti iam la intenco ligi sin kun kunuloj por ĝin transformi.

4/II/1974<sup>12</sup>

## **JUNA BURĜO KAJ PRIVILEGIO**

Juna burĝo estas edukita por konsideri siajn privilegiojn “naturaj”.

Iom post iom la novnaskito, kiu – kiel ano de la homa specio apartenas al la tuta homaro – transformiĝas en ano de la reganta klaso, kiu rajtas je tuta serio da privilegioj, kiujn oni neas al aliaj.

Tiuj ĉi “edukaj” procezoj aŭ – pli bone dirite – tiuj deformaj procezoj ne okazas sen malfacileco.

Precipe en epokoj, en kiuj la fundamentaj linioj de la historia kurso estas malpli kaŝitaj kaj kie ajn oni perceptas en la aero la odoron de ŝanĝo kaj profundaj transformiĝoj, la akcepto de privilegio povas fariĝi ĉiam pli malfacila: la juna burĝo, kiu ne sukcesis akcepti la privilegion kun sereneco, kvazaŭ ĉio estu ŝuldata al li, tre ofte aperos al siaj gepatroj kaj membroj de sia klaso kiel degenerinta filo.

Sed la malfacileco akcepti la privilegion ne – aŭ tre malofte – estos akompanata de klara vizio de la mondo.

En tia situacio la juna burĝo tre ofte trovos sin malkontenta, ne plenumita, sed sen klare kompreni kial, malsukcesante vidi la solan alternativon, kiu validas hodiaŭ. Tio estas, la malakcepto de sia devena klaso kaj la elekto de enradikiĝo en la kampon de kontraŭkapitalisma lukto; do batalante – kune kun la laboristaj organizoj – kontraŭ la subpremo ekzercita fare de la propra deven-klasoj.

Ne havante klaran alternativon, li povas sin fordoni al “strangaĵoj”, senefikaj

---

12. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 2, “Tesine la qualità della vita”.

protestformoj, kiuj frue aŭ malfrue returniĝos kontraŭ lin. Li povas – finfine – prezenti tutan serion da “perturboj”, kiuj ofte kondukos lin al la psikanalizo, kies ĉefa enspezofonto estas reprezentata de la junaj kaj riĉaj burĝoj maltrankvilaj antaŭ la historiaj movadoj.

Tre ofte la psikanalizo sukcesas kie gepatroj – tro emocie implikitaj en la procezo de formado de sia “heredanto” – ne sukcesas.

Ofte la fina rezulto de psikanaliza terapio – tre multekosta ne nur laŭ mono, sed ankaŭ laŭ personaj valoroj – estos reprezentita per la akcepto de la konata reala principo.

Tiel, ankoraŭfoje la homo maltrafis sian destinon transformi la realon, irante laŭ la senco de la historio, kaj li estis devigita de sia klaso konduki ne kiel homo, sed kiel konservativulo.

Tute alia estos la sorto de la juna burĝo, kiu, dum la esploro, al kiu li estas pelita de sia propra maltrankvilo, renkontos la praktikon kaj teorion de marksismo kaj povos ekkompreni ĝian plenan historian signifon.

Tiam komenciĝos por li periodo de transiro markita de laciga ŝanĝo kaj de intensa liberigo de energioj kaj ekscitaj projektoj, sed ĉefe de rompo de malnovaj interrilatoj, kiuj estos anstataŭigitaj per novaj – sur la nivelo de egaleco – kun kunuloj. Krome estos venkado de pasinta kondiĉado kaj remetado de sia tuta personeco en la fandujon.

Ĉe la fino de ĉi tiu procezo li trovos sin ne plu apartenanta al privilegiita klaso, sed prefere posedanta la privilegion kontribui al transformado de la mondo per marŝado – kune kun la kamaradoj – en la senco de la historio.

## **LA PRIVATA PROPRIETO DE LA INFANOJ<sup>13</sup>**

Gepatroj, kies gefiloj havas eĉ pli gravajn problemojn ol tio, kio kutime okazas en nia socio, ĉiam pli emas vidi la eksteran mondon kiel la malamikon de la “normaleco” de sia infano. Ili preteraŭdas ĉiun lian telefonvokon, spionas ĉiun kontakton kaj ĉiun rilaton. Ili traserĉas la skribaĵojn serĉante leteron, sekretan taglibron aŭ ajnan alian spuron, kiu fine metas ilin sur la spuron de la “malamiko”. Temas pri tiu, kiu ŝtelas de ili la korinklinon kaj estimon de la filo, de kiu ili senescepte ĝuus en la foresto de “konfliktiganto”.

Fakte nur agnoskante la ekziston de malamiko eblas – laŭ ili – doni klarigon pri la rifuzo – alie nekomprenebla – akcepti kun entuziasmo resti por ĉiam la privata, ekskluziva, persona posedaĵo de la gepatroj.

Same kiel la avarulo vidas en ĉiu ajn eblan ŝteliston de sia trezoro, tiel ĉi tiuj

---

13. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 45 “Personalità e rapporti interpersonali 1”, fasc. 5, “Proprietà privata della persona”, sottofasc. 2.

gepatroj – ĵaluze posedemaj kaj suspektemaj – vidas en ĉiu ajn eblan kaptilon al sia filo.

La perfida konvinkemo de la ekstera malamiko liberigas ilin de la devo fari mem-kritikan ekzamenon pri sia propra personeco kaj konduto. Ekzemplodonaj patroj kaj patrinoj, ili estis senmerite trafitaj en siaj plej karaj korinklinoj de ombraj kaj senskrupulaj individuoj, ŝtelistoj de la filoj de aliaj.

Tamen ni ne devas forgesi, ke la sinteno al filoj portas profunde la signon de klaso. Antaŭenrigardantaj klasoj estas eble pretaj rekoni la dignon de la filo almenaŭ egala al tiu de la patro. Sed kiu alfrontas la pasintecon konsideras sin la gardanto de vero, kiu devas esti transdonita sen gravaj variaĵoj al la posteuloj.

Por la burĝo la filo estas antaŭ ĉio la heredanto. Por la proleto la filo estas la plej juna, la plej forta kunulo, tiu, kiu povas eble venĝi la misuzojn faritajn de la regantaj klasoj al la gepatroj.

Por la proleto, la filo ne estas la heredanto de la pasinteco, sed li estas tiu, kiu antaŭvidas la estontecon.

**KIAM INFANOJ, KIAM JUNULOJ PENSAS PRI AMO**<sup>14</sup>, ili ne pensas kiel promocii la amon de aliaj al aliaj, sed ili preskaŭ ĉiam pensas pri kiel antaŭenigi la amon de aliaj al si mem.

Kelkfoje okazas, ke la filo provas kreskigi pli bonan komprenon inter la gepatroj. Ankaŭ ĉi tio estas maniero atingi la celon esti pli amata.

Kutime nur poste en la vivo (multe pli ofte, bedaŭrinde neniam) aperas la deziro kaj la kapablo antaŭenigi la amon de aliuloj al aliuloj, plene konscie, ke tio okazu sen ke la subjekto partoprenu en la sento de tiu, kiu faciligis la naskiĝon.

La kapablo sindoneme antaŭenigi amon meritis la kvalifikon de “maturato”, de “plenkreskulo”, se ĉi tiuj vortoj ne estus uzataj kutime nur por rekompenci la obeemulojn. Sed ĉi tiuj vortoj estos reproponataj de la specio por nomi tiujn, kies kresko kaj feliĉo ne finiĝas je la individua nivelo, sed estas enigitaj en la evoluajn movojn de la specio.

Veraj progresoj en la praktiko kaj kono de amo antaŭsupozas kapablon esplori, aŭdacon rigardi, kiuj povas esti atingataj nur kiam amo ĉesas esti klasifikata kaj taksata surbaze de abstraktaj, dogmaj, hierarkiaj, kulpigantaj kategorioj.

---

14. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 45 “Personalità e rapporti interpersonali 1”, fasc. 6, “Rapporti interpersonali”, sottofasc. 1.



## KIU POVAS VERE AMI LA VIVON?<sup>15</sup>

La redukto de la interesoj de la individuo al ekskluzive aŭ ĉefe privataj interesoj implicas en si mem altan gradon de eksponiĝo al la risko perdi alligitecon al la vivo.

Ni ĉiuj bezonas senti nin utilaj kaj amataj.

Fakte, tamen, nur tiu homo, kiu sin perceptas ne ekskluzive kiel privata subjekto, sed ankaŭ kaj ĉefe kiel subjekto de politika agado, povas esti – en ĉiu momento de sia vivo – utila al si kaj al aliaj, eĉ se maljuna, eĉ se malsana.

Gepatroj, kiuj koncipis sin ekskluzive kun la celo kreskigi siajn infanojn – kiam venas la tempo, en kiu la infanoj mem, nun plenkreskuloj, kapablas esti sendependaj ekonomie, emocie, intelekte – spertas senton de netransportebla malpleno kaj turnas sian pensadon pri natura morto kaj foje eĉ memvola morto.

Koncepti sin ekskluzive kiel funkcion de la infanoj ankaŭ implicas – tre ofte – la klopodon bremsi la procezojn de kresko kaj aŭtonomio de la infanoj pro la ofte ne eksplicita timo, ke la infano, kreskante, povu senti – nevole sed reale – malpliigon de utileco kaj valoro de la gepatroj.

Tre ofte la krizoj tiel oftaj ĉe junuloj de dudek jaroj ne ŝuldiĝas al misteraj biologiaj kialoj, nek al konfliktoj de la “profundo”, sed al la teruraj streĉiĝoj vekitaj en gepatroj de la ideo de la tuja jura emancipiĝo de la filoj kaj multe pli de la filinoj, kiuj, post kiam ili fariĝos plenaĝaj, estos metitaj laŭleĝe en la situacion – konsideratan de la gepatroj danĝera kaj absurda – povi fari memstarajn elektojn, eĉ (terure diri!) en la seksa kampo.

Kelkfoje la gepatroj pli-malpli kohere aŭ kontraŭdire kondukas por ĉiakoste eviti tiun situacion konsideratan de ili kiel la antaŭsigno de ĉiu ajn katastrofo [...].

Tiaspecaj gepatroj povas iri ĝis klopodi trovi ĉiumaniere la ilojn por konservi la gepatran aŭtoritaton por nedifinita tempo.

La plej bona ilo estas reprezentata de psikiatro malhonesta aŭ nekapabla ekzameni konkretajn rilatojn de povo kaj subpremo aŭ dotita je ambaŭ kvalitoj, kiu pretas deklari la junulon nekapabla kompreni kaj voli, donante psikiatrian signifon al ĉiu el liaj gestoj.

Iafoje okazas, ke iuj gepatroj tenas sin relative junaj kaj aktivaj ĝuste pro tio, ke ili havas handikapitan infanon, kiu daŭre bezonas ilian asiduan zorgon.

Kiam la handikapo de la infano ne estas organika, sed psikologia, necesas esplori la interesojn de la gepatroj kaj iliajn ligojn kun la ekstera mondo, por helpi ilin kompreni la ekzistantan mondon kaj la senĉesan lukton inter la malnovo kaj la novo, kiu en ĝi disvolviĝas.

---

15. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 2, “Tesine la qualità della vita”.

Povus tiam esti, ke – komencante partopreni en la nuntempaj luktoj – la gepatroj alprenu, per tiu sama fakto, malpli posedeman sintenon al la infano suferanta de mensaj malordoj, tiel favorante lian kreskon, aŭtonomecon kaj personajn, sociajn, politikajn ligojn.

Klopodi igi personajn interesojn kiel eble plej koincidaj kun la ĝeneralaj, prenante kiel proprajn interesojn la interesojn de la klaso, kiu reprezentas la altiĝantan homaron, plifortigas la ligon kun kunuloj kaj la amon al la vivo.

Alivorte, engaĝiĝi politike ligas nin pli firme kaj pli profunde al la vivo.

12/3/1979<sup>16</sup>

### TRO LONGA GEPATRADO KIEL SENCEREBRIG-AGADO

En la raporto donita de Pavlov en septembro 1932 ĉe la 14a Internacia Kongreso de Fiziologio en Romo, oni legas:<sup>17</sup>

Ĉe la pli alta besto, ekzemple la hundo, kiun ni uzis kiel objekton de ĉiuj niaj esploroj, la plej kompleksaj ligoj de la organismo kun la ekstera medio – kiuj estas la plej gravaj por la konservado de la individuo kaj la specio – dependas ĉefe de la agado de la subkortikalaj regionoj plej proksimaj al la kortekso.

Tiuj ĉi agadoj estas: la nutra, kies celo estas trovi nutraĵon, la defenda, kiu emas eviti ĉion, kio povas kaŭzi damaĝon, ktp...

Ili estas kutime nomataj instinktoj, inklinoj; psikologoj nomas ilin per la termino emocioj, sed ni donas al ili la fiziologian nomon de kompleksaj nekondiĉitaj refleksoj.

Tiuj ĉi ekzistas ekde naskiĝo kaj estas kaŭzita de limigita nombro da stimuloj, sed ili sufiĉas nur en frua infanaĝo, kiam gepatroj zorgas pri siaj infanoj. Pro tio bestoj senigitaj je hemisferoj invalidiĝas, ili ne kapablas havi sendependan ekzistadon. La ĉefa fiziologia funkcio de la cerbaj hemisferoj, en la daŭro de la tuta individua ekzistado, konsistas en senĉese akiri sennombrajn kondiĉitajn signalajn stimulojn, kiuj aldoniĝas al la limigita nombro da absolutaj kaj denaskaj stimuloj, tiel senĉese kompletigante la absolutajn refleksojn per kondiĉigitaj refleksoj. Tiel la objektoj, kiuj influas la instinktojn, estas signalitaj al la organismo en ĉiam pli vasta gamo, per ĉiam pli diversaj indikoj, per minimumaj aŭ komplikaj signaloj, kio ebligas ĉiam pli bonan kontentigon de la instinktoj kaj samtempe donas al la organismo ĉiam pli grandajn eblojn konservi sin ene de la naturo, kiu ĝin ĉirkaŭas.

Komencante de ĉi tiuj konsideroj de Pavlov, ni povas nin demandi ĉu, koncerne la homan specion, ĉiuj gepatroj vere scias kiel ebligi al siaj infanoj ĉiam pli

---

16. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 40 “Neurofisiologia e ATP”, fasc. 4, “Pavlov”, sottofasc. 1.

17. P. Pavlov, Psicopatologia e psichiatria, Editori Riuniti, Roma, p. 231.

bone plenumi la fiziologian funkcion de siaj cerbaj hemisferoj, senĉese vastigante la heredaĵon de kondiĉigitaj stimuloj.

Ĉi-rilate ŝajnas al ni grave observi, ke se, kiel diras Pavlov, bestoj senigitaj je hemisferoj fariĝas handikapitaj kaj ne kapablas havi memstaran ekzistadon, reciproke tiu, kiu estas malhelpita havi memstaran ekzistadon, vivas kvazaŭ li estus senigita de la cerbaj hemisferoj kaj estas, laŭ iu signifo, “sencerbigita”, invalida.

Se bestoj senigitaj je hemisferoj invalidiĝas, ankaŭ individuoj (ne gravas ĉu ili apartenas al bestaj specioj aŭ al la homa) kiuj estis malhelpitaj uzi siajn hemisferojn por rekte kapti la stimulojn, kiuj venas de la medio, estas invalidaj.

Handikapuloj estas ekzemple junuloj, kiuj ne rajtis pensi per sia cerbo, kiuj ne rajtis fari siajn proprajn elektojn surbaze de siaj propraj spertoj.

Handikapuloj estas junuloj, kies gepatroj pretendas scii, kion la infano bezonas, eĉ kiam li aŭ ŝi atingis la aĝon, en kiu li kapablas ne nur percepti siajn proprajn bezonojn, sed ankaŭ esprimi siajn bezonojn, siajn elektojn kaj plenumi la agojn, kiuj ebligas al li realigi ilin.

Pro ĉi tiuj kialoj, ĉiu, kiu kontraŭas la liberan kaj racian agadon de la junulo, agas kiel “malcerebra faktoro”.

Por iuj gepatroj, la perfekta infano estas tiu, kiu ne uzas siajn cerbajn hemisferojn kaj ne perceptas mediajn stimulojn, krom se ili estas filtritaj, aprobitaj, permesitaj de la gepatroj.

En la historio de Johano ni havas konkretan ekzemplon de malcerebriga gepatra agado,<sup>18</sup> kiu rezultigas simptomatologion, kiu estas erare konsiderata kiel persona eco kaj koncernanta psikiatron.

En 1944 Maria, junega farmlaboristino de la Modena ebenaĵo, geedziĝis kun kunulo, kiu tuj foriris al la fronto, lasante ŝin naskontan infanon, kiun la patro neniam vidos, ĉar li mortis en la milito kelkajn monatojn poste.

La seksa vivo de tiu ĉi virino, kiu ĉesis kun la foriro de la edzo al la fronto, havis la daŭron de kelkaj semajnoj kaj ne plu reekos, ĉar la virino dediĉos sin tute, absolute kaj preskaŭ fanatike al la kresko de tiu infano, sur kiun ŝi verŝos samtempe la patrinan kaj la edzinan amemon.

De la momento, en kiu, en la sesa monato de gravedeco, Maria ricevis la novaĵon pri la morto de sia edzo, ŝi prenis la decidon labori per ĉiuj rimedoj, pri kiuj ŝi disponas, por ke la dramo ne okazu denove: ŝi kaj ŝia filo devos disiĝi neniam, ili devos resti nedissolveble kunigitaj dum la tuta vivo.

La ideala rilato inter patrino kaj infano ŝajnas al ŝi tio, kion ŝi nuntempe sperdas: la gravedeco.

Tial Maria, kiu ĉiam laboris kiel kamplaboristo kaj ĉiam vivis subĉiele farante

---

18. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 30 “Disalienistica”, fasc. 5, “Terapia casi concreti”.

la saman malfacilan laboron kiel viroj, ek esploras ĉiun eblecon, kiu ebligas al ŝi daŭre resti kiel eble plej proksime al sia infano, kiam ĝi naskiĝis.

Ŝi provas esti kudristino sed tio estas tro malfacila: de kiam ŝi estis infano ŝiaj manoj nur faris malglatajn movojn. Ŝi eĉ ne lernis legi kaj skribi, sed en la medio de ekstrema malriĉeco, en kiu ŝi vivas, neniu hontas esti analfabeto, ĉu temas pri la analfabeteco de tiuj, kiuj neniam lernis legi kaj skribi, ĉu temas pri la analfabeteco, tiel nomata revena: tio estas de tiuj, kiuj, lernis legi kaj skribi, sed tuj forgesis, ĉar ili estas devigitaj labori ekde la infanaĝo.

Sia maltrankvila serĉo por hejm-bazita tasko estas kontentigita kiam al ŝi estas ofertita trikmaŝino, kiun ŝi povos pro parte pagi per sia propra laboro.

Ŝi tiel povos resti proksime al sia filo tage kaj nokte.

Kiam, en la aĝo de ses jaroj, la infano komencas vizitadi la lernejon, li timas la aliajn infanojn: li eskapas de ili alkroĉiĝante kiam li povas al la jupoj de la instruistino, kiu, konante lian rakonton, traktas lin kun aparta mildeco, tiel ke li sukcesas establi kun ŝi rilaton, kiu anstataŭas – en la matenaj horoj – tion, kion li havas kun sia patrino dum la resto de la tago.

Al homoj, la infano havas sintenon faritan el scivolemo kaj timo, kontraŭdiran sintenon, kiu puŝas lin samtempe serĉi ilin pro scivolemo kaj eskapi de ili pro timo.

La strikta rilato, kiun li establis kun la instruistino, favoras la evoluon de liaj lernejoj kapabloj. Dum la kvin jaroj de bazlernejo li fariĝas ĉiam pli kapabla je abstraktaj intelektaj plenumoj, dum li estas mallerta en siaj movoj, ankaŭ ĉar li estas tro nutrata de sia patrino, kiu eĉ fieras havi grasan filon, ŝi kiu tiom suferis pro malsato dum la infanaĝo.

Intertempe la virino ne plu estas simpla trikistino: ŝi ne nur sukcesis pagi la partopagojn de sia trikmaŝino, sed nun ŝi kapablas enspezi laborigante aliajn, alivorte, ŝi fariĝis “grupisto” (ĉi tiu vorto indikas tiujn mezajn ekspluatistojn, kiuj disdonas al grupo de hejmaj laboristoj la trikaĵojn, kiujn ili prenas el la fabrikoj, kiuj intertempe ekestis kaj disvolviĝis preskaŭ ĉie en la areo de la Padusa valo, kie loĝas la virino).

Johano estas nun 10-jara kaj la plej lerta en sia klaso, krom en gimnastiko, sed li daŭre estas vestita, lavita, nutrata preskaŭ tute de sia patrino, kvankam li atingis la aĝon, kiam la plej multaj el liaj kunuloj iras labori en kampoj. Intertempe Maria al kutimiĝis, kvankam malfacile, ne havi lin dum la matenaj horoj.

Nun ŝi opinias, ke se ŝia filo sukcesus fariĝi instruisto, ilia familia situacio povus daŭri sen abruptaj ŝanĝoj dum la tuta vivo.

Ĉar al ŝi jam mankas la rimedoj kaj la kapabloj de la knabo al studoj estas super la mezumo, la projekto iras, ŝajne sen malhelpoj, al sia realiĝo: Johano komencas vizitadi la lernejojn en la urbo.

Tamen, ĉi tiu ŝanĝo ne enkondukas ajnan elementon de sendependeco aŭ eĉ

limigita aŭtonomio en lia vivo. Dum la aliaj knaboj iras per buso, li estas anstataŭe akompanita al lernejo fare de lia patrino, kiu intertempe sukcesis kunmeti la monon por aĉeti aŭton por plenumi sian rolon kiel grupŝoforo.

La lernejaj rezultoj de la knabo estas bonegaj en ĉiuj fakoj, krom en gimnastiko, sed preskaŭ tuj lia patrino sukcesas, sub preteksto, ke li estu sendevigita de tiuj lecionoj.

La instruistoj de ŝia filo, kun kiuj Maria havas oftajn rilatojn, foje montriĝas zorgemaj pri la diverseco de la knabo, kiu fariĝas pli kaj pli vorema, pli kaj pli grasega, pli kaj pli nekapabla je interhomaj rilatoj kun kunuloj (de certa momento pluen estas ĉefe la knabinoj, kiuj timigas lin).

Sed la patrino nun estas memfida, ne nur je ekonomia vidpunkto, sed ankaŭ je kultura vidpunkto, ĉar kune kun sia filo ŝi unue lernis legi kaj skribi kaj fari aritmetikon kaj poste iom post iom ekhavis la sciojn, kiujn Johano devis lerni.

La duboj de iuj instruistoj “ĝenujoj” ne skrapas ŝin. Fakte, kion plu oni povus voli?

Ŝia filo vivas nur por ŝi kaj, alternative, por la lernejo, kiu permesos al li iam iĝi instruisto kaj do povi daŭre pasigi – krom la matenaj horoj – la tutan tagon kune, kiel ili faras nun.

Eĉ nokte ili dormas kune en la sama lito.

La komenco de pubereco en la filo ne puŝis Maria doni al li sian propran ĉambron, sed ili daŭre dormis kune, interŝanĝante amemojn, kiuj daŭre plilongigis kaj pliprofundigis.

Je la aĝo de 17 jaroj, la knabo prepariĝas por la ŝtata ekzameno, kiu konsekros lin kiel instruisto. Kvankam li estas sendube la unua en la klaso, la jam akiritaj lernejaj sukcesoj ne trankviligas lin, male ili igas lin ĉiam pli avida je novaj sukcesoj, tial antaŭ la ekzameno li longe vekas nokte kaj kiam li enlitiĝas, li luktas por ekdormi.

Unun nokton, dum li estas en lito kun sia patrino, li eksplodas en nehaltigebla ekploro.

Maria provas konsoli lin kaj brakumas lin.

La longaj sendormaj noktoj malfortigis en ambaŭ la procezojn de inhibicio kaj la brakumo baldaŭ iĝas seksa brakumo, ĉe la fino de kiu la filo saltas el la lito kaj ekkrias, frakasante ĉion atingeblan.

La najbaroj rapidas alkuras, Johano anstataŭ iri fari siajn skribajn ekzamenojn, estas kondukata al psikiatria hospitalo, kie oni formulos la diagnozon de “ĉio-detrua krizo en skizofrenia subjekto” kaj oni parolos pri “eksplodo de psikoza kerno” ĝis nun latentata.

Kaj kio okazos nun? Kio estos la sorto de Johano?

La sorto de Johano estos plejparte determinita de la juĝo, kiun aliaj donas pri li. Ĝi estos plejparte determinita de ĉu li havas la bonŝancon renkonti pli aŭ malpli frue en sia vivo (nun markita de diagnozo psikiatria) iun kapablan vidi ke

cirkonstancoj eksteraj al Johano (komencante per la milito) estas je la radiko de malfacilaĵoj kiuj, ekde iu momento, fariĝis personaj malfacilaĵoj, sed tamen lasis nerompitaj liajn kapablojn establi, en malsamaj cirkonstancoj, malsaman rilaton kun la mondo [...].

Kio estis la kulpo de la patrino, se en tiuj cirkonstancoj ŝi ne povis esti bona edukistino de sia filo, rilate al kiu ŝi kompreneble disvolvis tro protektemajn kutimojn, kiuj malhelpis al ŝia filo iom post iom akiri la kapablon vivi ĉiam pli sendepende?

Johano poste diros: “Kiam ajn mi tuŝas propraokule, kiel antaŭ iom da tempo, la fidon, kiun la homoj de ĉi tiu vilaĝo havas al mi, kie mi estas bazlerneja instruisto dum pli ol 10 jaroj, mi devas reripensi mian pasintecon, mian historion (ĉi tie nekonatan de ĉiuj) kiel iama mensmalsanulo. Temas pri rakonto, kies radikoj devenas eĉ antaŭ mia naskiĝo, rakonto en kiu la decida turnopunkto estas, oni povas diri, ‘koncentrita’ en kelkaj momentoj, mi dirus preskaŭ momenteroj, tio estas, kiam nekuracebla psikozulo, kia mi estis konsiderata, renkontis iun, kiu anstataŭ najli lin al la pasinteco, komencis sian paroladon dirante: ‘kia instruisto eksterordinara povas fariĝi viro, kiu konis per rekta sperto, sur sia propra haŭto, la decidan gravecon de la rilato de la infano kun plenkreskuloj!’

En tiu preciza momento – mi estis ankoraŭ enhospitaligita en psikiatria hospitalo kaj mi memoras la precizan punkton en la atendoĉambro, kie oni alparolis min tiel – sur la fono de la bruo de la ĉaretoj portantaj la tagmezan manĝon –, mi sentis ke mi forskuis pasintecon, kiun mi kredis por ĉiam disbatinta ĉiun eblecon de vivo kaj renaskiĝo. Mi sentis, ke ankaŭ mi havas estontecon.

Kiom da fojoj, precipe en la lastaj jaroj, kiam iom post iom solidiĝis mia memfido dum malaperis timoj pri la pasinteco, mi pensis, ke mi havas la devon diskonigi al aliaj (precipe al tiuj, kiuj ankoraŭ estas konvinkitaj, ke mensa malsano estas patologia procezo propra de la individuo) almenaŭ la bazajn liniojn de mia sperto!

La antaŭenpuŝo, kiu venas al mi en ĉi tiu momento, ĉar mi sukcesis konvinki la patrinon de unu el miaj lernantoj (kiu tiel similas al mia patrino) lasi sian filon havi almenaŭ ian rilaton kun siaj kunuloj ne perita de ŝi, donas al mi la puŝon por komenci [...]”.

**EN AJNA AĜO DE LA VIVO**<sup>19</sup> la personeco de ĉiu homo povas renoviĝi ekde siaj fundamentoj, tiel, ke la propra renoviĝo fariĝu fonto kaj stimulo por la renoviĝo de aliaj.

---

19. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 26 “ATP aggiornamenti”, fasc. 1, “ATP che cos’è”, sottofasc. 2.

**ONI NENIAM ESTAS PLENKRESKULO UNUFOJE POR ĈIAM:**<sup>20</sup> necesas de tago al tago stimuli la kreskon de kunuloj

ni neniam estas plenkreskulo unufoje por ĉiam: necesas de tago al tago stimuli la kreskon de kunuloj kaj certiĝi, ke ili pli kaj pli interesiĝu pri nia persona kresko [...].

### **HOMA KRESKO**<sup>21</sup>

Daŭre surpreni kaj transdoni la rolon de ĉefrolulo sen esti rigida, sen ĉikani aŭ esti ĉikanita, reprezentas la esencon de interparolado, dialogo kaj agado kaj, do, de homa kresko.

En socio dividita en klasojn, kie ĉiuj, inkluzive de la infanoj de proletoj, pasigas multajn jarojn en medio, kiel lernejo, kie la iniciato ĉiam kaj nur apartenas al la instruisto, atendante komenci vivi en medio – tia kiel la fabriko, kie la iniciato apartenas – plenrajte – ĉiam kaj nur al la posedanto, tia sinteno ne estas “spontanea, sed devas esti pene konkerita per reciproka kritika helpo”.

### **PLURFAMILIA KUNLABORO**<sup>22</sup>

La familio povos esti plifortigata kaj igata, almenaŭ laŭ la nuntempa eblo, parte libera kaj fonto de liberigo, nur se ĝi ĉesos esti la esprimo de egoismo.

Tiusence, novaj formoj de plurfamilia kunlaboro, en kiu nombro da familioj, uzante la leĝon n. 865 pri loĝejoj kun nedividita propio, povos establi stabilajn rilatojn de senkondiĉa solidareco kaj reciproka helpo surbaze de intence planitaj kaj konscie akceptitaj renkontiĝoj.

Tiuj ĉi formoj de plurfamilia kunlaboro ebligas solvi, almenaŭ laŭ la nuntempa eblo, la problemon de infanoj kaj maljunuloj, komencante ĉesigi la ekskludon de maljunuloj kaj havigante al la infano medion tiel varian kaj riĉan je korinklinoj kaj spertoj, en kiu povi kreski sincere kaj malkaŝe al aliaj.

Ni konscias pri la malfacilaĵoj, kiuj neeviteble estiĝos el ĉi tiu radikale malsama vivmaniero, kiu ne trovas konkretan ekzemplon en la pasinta sperto, ĉar la plurfamilia kunlaboro intencas diferencigi sin, teorie kaj praktike, de ĉia malvere noviga sperto, kiel la tielnomitaj “komunumoj”, kiuj implikas senbaran seksan komunumon, kiun plurfamilia kunlaboro ekskludas progame.

---

20. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 2, “Tesine la qualità della vita”.

21. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 2, “Tesine la qualità della vita”.

22. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 29 “Cooperazione multifamiliare”, fasc. 1, “Cooperazione multifamiliare più titoli e frammenti”.

Tiel estos provizita homa medio, el kiu solidareco kaj kunlaboro inter ĉiuj ĉerpos nutraĵon prefere ol la egoismo de la individuo. Sed, disvolvante kiel eble plej multnombrajn komunajn servojn, estos ankaŭ farita ne neglektebla kontribuo al la tre grava nesufiĉo de loĝejoj [...].

La disvolviĝo de plurfamilia kunlaboro permesos al virinoj (senŝargitaj, kvankam parte, de sia ŝarĝo kiel dommastrinoj) kultivi individuajn kaj sociajn interesojn.

Renkontiĝoj almenaŭ ĉiusemajne ebligos reciprokecan interŝanĝon de ideoj, kritikoj, intencoj, “listigon” de la materiaj kaj spiritaĵoj bezonaj de ĉiu kaj, kune, de la rimedoj por ilin kontentigi, krom elasta kaj libera komuna programado de kolektiva vivo en funkcio de la harmonia evoluo (almenaŭ laŭ la nuntempa eblo) de ĉiu individua personeco.

9/12/1975<sup>23</sup>

### **PLURFAMILIAJ MIKROKOLEKTIVOJ KAJ POLITIKAJ KOLEKTIVOJ**

[...] Evidentiĝas, ke la edukado povos atingi maksimuman reciprokecon, se la edukaj manieroj de la gepatroj estos diskutataj ne nur de pluraj geedzoj sed ankaŭ kaj ĉefe kun gefiloj, ne nur propraj sed ankaŭ de aliaj, pri kiuj ne eblas ekzerci tiun formon de jura arbitracio difinita kiel “patria povo”. Tio estas ĉar tia edukado okazos reciproke ne nur inter samuloj sed ankaŭ inter membroj de diversaj generacioj kaj transformiĝos en servon, per kiu ne plu eblos kontrabandi la volupton je ekskluziva posedo kaj privata proprieto de individuoj.

Metode diskuti, je regulaj kaj proksimaj intervaloj, en asembleo malfermita al ĉiuj membroj, inkluzive de infanoj, tuj kiam ili scipovas kompreni kaj uzi la elementojn de la lingvo, aŭ eble eĉ pli frue, donas al ĉiuj membroj de la kolektivo konkretajn garantiojn de reciproka personeca plifortigo. Kaj tio okazas ambaŭ en plurfamiliaj mikrokolektivoj aŭ en politikaj kolektivoj.

La povo de gepatroj ne devas esti senlima. Ni devas povi apelacii kontraŭ ĝi, kontraŭ tiuj, kiuj povas malhelpi nin lastmomente eliri el la domo kun kunulo, partopreni vojaĝon, esprimi nian opinion.

Multfamilia kunlaboro, kiu metas la plenkreskulon en la situacion devi respondi al gejunuloj kaj samaĝuloj pri sia agado, devigante ilin racie motivi siajn malpermesojn, kiuj ne plu povas esti simple “Ho ne, ĉar tion mi decidis”, reprezentas validan sekurigilon de la rajtoj de la infano.

Plurfamilia kunlaboro kiel venkado de konfliktoj kaj kiel liberigo de energioj.

Plurfamilia kunlaboro kiel puŝo al socia reagado.

---

23. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 29 “Cooperazione multifamiliare”, fasc. 1, “Cooperazione multifamiliare più titoli e frammenti”.



**POR NI MALFERMA FAMILIO SIGNIFAS**<sup>24</sup> familion kiu povas ankaŭ esti nuklea, alivorte, esence kunmetita de paro kaj de iliaj infanoj, sed kiu malakceptas la principon ke “malpuraj vestaĵoj estu lavataj nur en la familio”.

20/2/1980<sup>25</sup>

**NENIAM NI ZORGU PRI NE ESTI AMATAJ:** ni devas zorgi nur pri ne scii ami.

Ni laboru por ke ni amu unu la alian en la kunteksto de transformo de la mondo: ni havos nian parton de amo sen serĉi ĝin, preskaŭ kiel kromprodukton de tiu unua engaĝiĝo nia, de tiu fundamenta agado nia.

10/2/1987<sup>26</sup>

**NEPODEMA AMO APERAS AL MULTAJ KIEL MALHAVO,** kiel ofero, foje ideale motivita, sed tamen ĉiam rezigno.

Sed sufiĉus pripensi, ke homo “posedata” de iu alia estas homo neeviteble malhelpita en sia evoluo kaj esprimo.

La amo, kiun ni donas en tiaspecaj situacioj, nevole iĝas mutiliga.

10/2/1987<sup>27</sup>

**LA BLINDA AMO DE LA KLASIKA MITO** devas esti anstataŭigata per la idealo de klarvida, antaŭvida amo, kies sageto ne celas la koron de la alia, sed kapablas transiri spacojn kaj obstaklojn kaj antaŭvidi la estontecon, kalkuli la efikojn sur ni kaj sur la sentoj de la aliuloj. Alivorte, ĝi ebligas al ni rajdi la tigron.

10/2/1987<sup>28</sup>

**MI POVAS KREI SIMFONION,** mi povas pentri bildon, mi povas verki kantotekston stimulitan de alies ĉeesto, sed mi ne rajtas, nek iam donus al mi feliĉon se ne mallonge, inkluzivi la ekziston de aliulo ene de mia projekto.

---

24. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 29 “Cooperazione multifa- miliare”, fasc. 1, “Cooperazione multifamiliare più titoli e frammenti”.

25. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 46 “Personalità e rapporti interperso- nali 2”, fasc. 4, “Famiglia e affetti”, sottofasc. 1.

26. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 45 “Personalità e rapporti interperso- nali 1”, fasc. 5, “Proprietà privata della persona”, sottofasc. 1.

27. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 46 “Personalità e rapporti interperso- nali 2”, fasc. 8, “Sesso”, sottofasc. 1.

28. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 45 “Personalità e rapporti interperso- nali 1”, fasc. 5, “Proprietà privata della persona”, sottofasc. 1.

Ni devas lerni plani konsiderante la aliajn, kalkuli kune kun niaj realaj kaj potencialaj fortoj ankaŭ la fortojn proprajn al nia eventuala alianco kun aliaj, kritike rigardante nin por senmaski ekde la komenco ĉian afekcian movadon, kiu celas transformi la alian el aliancano por komuna afero al nia instrumento de personaj bezonoj.

25/3/1981<sup>29</sup>

### **GEEDZECA EKZALTIGO**

Viro, trapasinte dezertan areon, finfine venis al klara fonto, kiu ŝprucis de monteto apud granda rivero.

Estingante sian soifon li sentis nepriskribeblan plezuron, tial li pensis: se akvo kapblas havigi al mi tian intensan plezuron, neniam sentitan antaŭe, kial mi ne ĵetu min en la riveron? Kaj tiel do li faris per la sankta geedzeca ligo por eternigi tiun momenton de feliĉo.

**SE MI SUPRENIRAS LA TURON “GHIRLANDINA”<sup>30</sup>** mi vidas, ke la homoj, kiuj estas sur la malsupra placo, estas malgrandaj kaj mi scias, ke tio estas trompo.

Sed se mi malsupreniras en la abismon de la amo, mi subite malkovras, ke estas unika homo en la mondo, kiu superregas ĝin, sed mi ne plu komprenas, ke ĝi estas trompo kaj mi ne scias kiel fari korektojn.

8/5/1975<sup>31</sup>

### **VIRO KAJ VIRINO: RENKONTIĜO KONSTRUENDA**

Tre ofte rasismo estas maskita de la ŝajne egaleca formulo, kiu povas esti esprimata per la vortoj: ni ĉiuj estas egalaj, ni ĉiuj havas la samajn rajtojn [...].

Kelkaj virinoj kredas ke ili estas egalrajtecaj kaj ili estas anstataŭe rasismaj.

Ili rezignas kompreni la anatomi-fiziologiajn diferencojn, kiuj distingas la partneron.

La multeco de stimuloj, kiujn la viro ofte bezonas por povi plenumi la aman agon, estas ofte – malĝuste – ricevita de la virino, kiu atingis sian propran politikan konsciencon, kiel peto por ŝi humiliga, sed ĝi estas nur la peto de intima formo de kunlaboro en la ago, kiu devas porti ambaŭ al la atingo de plena feliĉo.

---

29. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 46 “Personalità e rapporti interpersonali 2”, fasc. 3, “Coppia”, sottofasc. 1.

30. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 2, “Tesine la qualità della vita”.

31. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 47 “Progetti libri”, fasc. 8, “La vita quotidiana come storia”.

La virino, kiu ne atingis aŭtentan komprenon pri la emocia kaj seksa mondo de la viro, ofte kondutas – sen scii tion kaj senkonscie – en ekstreme kruela maniero.

## **VIRECO KAJ VIRINECO<sup>32</sup>**

Valorigi la virecon de viro aŭ la virinecon de virino signifas antaŭ ĉio valorigi tiun ununuran personecon kiu, inter siaj specifaj ecoj, posedas ankaŭ la seksan.

Konsideri viron aŭ virinon antaŭ ĉio kiel sekse vira kaj virina, antaŭ ol konsideri ilin kiel apartenantaj al la homa specio, reprezentas formon de rasismo, kiu estas kastriga, ĝuste kiam ĝi ŝajnas plifortigi la seksan aspekton de la individuo.

Homo estas kombinaĵo de biografiaj datumoj kaj biologiaj datumoj, inkluzive de la seksaj. La donita seksa – kvankam ĉefe de biologia naturo – estas proksime interplektita dum sia evoluo kun la biografiaj donitaĵoj rilataj al specifa individuo, per kiuj ĝi estas intense influata, same kiel la individuaj biologiaj donitaĵoj siavice estas influataj de la apartena klaso kaj de la erao, en kiu oni vivas.

La biografiaj donitaĵoj kaj – kvankam en pli malgranda mezuro – eĉ tiuj komence nur biologiaj, devas fakte esti historiigitaj en la plena amplekso de la termino.

El ĉi tiu interplektiĝo – kiu okazas en specifa socia kaj natura medio kaj en specifa historia epoko – eliras la specifaj atributoj de la individuo, kiuj konsistigas unikan kaj neripeteblan konstelacion, ne pro ia mistika kvalito interna al tiu aparta personeco, sed ĉar senfinaj estas la rezultoj de la sennombraj kombinoj de subjektivaj kaj objektivaj procedo, same kiel la bildoj rezultantaj el la nepercepteblaj movoj de kalejdoskopo.

31/8/1972<sup>33</sup>

## **LA KVALITO DE LA KUNLIGO**

En la kvalito de la kunligo estas implicita la kvalito de la enhavo. Fakte, ne eblas plene konekti se ne pri enhavoj, kiuj antaŭvidebligas estontan homaron (ali maniere la kunligo estus malhumaniga). Tiaj kunligoj resumas en si mem la kvalitojn, kiujn la klaseca romantika deformado ĝis nun atribuis al la paro, kiel ebla produktanto de alia homo, kiu tamen ne estas la nova homo sed tiu, kiu daŭrigas la pasintecon kaj heredas ĝin.

Tion ebligas la ideologio, kiu atribuas individuan karakteron al la universalilo

---

32. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 53 “Quaderni”, fasc. “1972”

33. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 2, “Tesine la qualità della vita”.

kaj inverse: ĉi-kaze la partnero resumas en si la valoron de la tuta homaro, tial la totala absorbo en la rilato kun li pravigas la postlason de la tuta cetero de la homaro. Tial ĉiu privilegia rilato riskas esti false humaniga: ĝi ja stimulas homajn aspektojn, sed poste ĝi enŝlosas ilin en privateco.

## **LA KONSERVADO DE LA SPECIO<sup>34</sup>**

En la nuna historia situacio eblas oferti multe pli signifan kontribuon al la konservado de la specio, batalante por plibonigi la kondiĉojn de vivo kaj pluvivado de la laboristoj.

La burĝa paro, fermita en la malvasta rondo de privataj interesoj, starigis al si – pli-malpli konscie – la taskon plifortigi la homaron laŭnombre, sed ne en terminoj de vivokvalito kaj de pluviveblo por ĝiaj membroj.

Ne hazarde la vorto “patrimonio”/heredaĵo devenas de patro.

Laŭ la malnova burĝa morallo kaj la antaŭj moraloj, kiu posedas heredaĵon, havas la devon esti patro, alivorte havi almenaŭ unu filon aŭ pli ĝuste heredonton.

Aliflanke, tiuj sen havaĵoj, sed kun klara vizio pri la lukto nuntempe okazanta en la mondo, en kiu ili decidis partopreni je la unua persono, povas hodiaŭ racie decidi – kune kun sia edzino – dediĉi sin – plentempe – al ĉi tiu tasko.

En ĉi tiu kazo, la manko de gefiloj neniel estos antaŭsigno de malkontento aŭ soleco.

Oni povas eĉ racie antaŭvidi, ke la paro da militantoj, kiuj – en ĉi tiu historia momento – decidis plentempe dediĉi sin al la ĝeneralaj interesoj de la proletaro kaj do de la homaro, povos vivi ege viglan kaj intensan vivon, ne ŝiritan de dividoj inter la privata parto kaj la socia.

Ne la soleco, sed la solidareco, la korinklino, la zorgo pri iliaj kunuloj certe akompanos ilin dum ilia tuta vivo.

7/10/1974<sup>35</sup>

**LA SEKSA AGO NE POVAS ESTI FONTO** de nur transira biologia kontento.

Por ke ĝi transformiĝu en aman agon, la paro devas nepre enirigi siajn sentojn al pli vasta kunteksto, en kiu ekzistu almenaŭ embria partopreno en la luktoj, kiujn la homaro faras por eliri el la antaŭhistorio.

---

34. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 46 “Personalità e rapporti interpersonali 2”, fasc. 3, “Coppia”, sottofasc. 2.

35. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 46 “Personalità e rapporti interpersonali 2”, fasc. 3, “Coppia”, sottofasc. 1.

24/6/1978<sup>36</sup>

## **NOMI PANON LA PANO KAJ VINON LA VINO**

Havi la kapablon nomi pano la panon kaj vino la vinon, sekso la sekson, kapabli rekoni kaj nomi siajn sentojn, bezonojn, aspirojn laŭ tio, kio ili vere estas, kaj do povi konsideri similajn sentojn, bezonojn, aspirojn en la aliaj konsistigas unu el la elementoj (kaj certe ne la plej malgrandan!) de mensa sano kaj de kapablo alfronti la malfacilaĵojn de la vivo.

Por fari tion, nepras kompreni sin kaj la aliajn laŭ la du aspektoj de biologia objekto kaj historia subjekto, kiuj kunloĝas en la personeco de ĉiu individuo ne sen konfliktoj, eĉ ne ĉe tiuj, kiuj povis elekti vivi en ne-individuisma maniero kaj meti sian biologion je la servo de la historio.

De tiu kapablo grandparte dependas la nivelo de interhomaj rilatoj, la alianckapabloj, kiel ili vere malkaŝas sin precipe en kriz-tempoj, en la momentoj kiam la situacioj faras al ni pli malfacile alfronteblajn postulojn ol kutime okazas en la ĉiutaga vivo.

Ĝuste en tiaj momentoj la malfacilaj mensogoj zorge kultivitaj dum jardekoj tuj falas kaj subite ni vidas bildon de ni mem malsamegan de tiu, kiun ni ame kultivadis.

Estas la horo de la vero, la horo, en kiu oni ne plu povas ŝajni esti, kiu oni ne vere estas.

2/12/1982<sup>37</sup>

**NI KOMPATAS HUNDON, KIU ESTAS FEROCE KONDIĈITA** preni manĝaĵon ekskluzive el la mano de la mastro aŭ lasi sin morti pro malsato.

Ni ne kompatas tiun, kiu anstataŭe spertis similan kondiĉadon en la seksa aŭ emocia kampo.

**LA BURĜA VIRINO**<sup>38</sup> prezentas sin kiel altvaloran objekton ornamitan per ĉiu estetikaj valoro permesita al ŝi de sia privilegio.

Sed la proleta virino, kiu konscie prezentas sin kiel historian subjekton, kapablas proponi al sia partnero multe pli altan kaj pli intensan emocion ol la simpla biologia emocio ligita kun la amrilato.

---

36. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 46 "Personalità e rapporti interpersonali 2", fasc. 8, "Sesso", sottofasc. 1.

37. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 46 "Personalità e rapporti interpersonali 2", fasc. 8, "Sesso", sottofasc. 1.

38. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 47 "Progetti libri", fasc. 8, "La vita quotidiana come storia".

Tamen ofte okazas, ke la proleto, kiu kapablis rafini siajn homajn kvalitojn en la lukto, trovas al si barita la vojo al plua progreso, se aperas – ĉe lia horizonto – la burĝa virino. Ekscitita kaj enuigita de la viroj de sia socia klaso, ŝi subite sentas viglan intereson pri tiu viro tiel malsama, ke – anstataŭ batali por sia kariero – li sin dediĉas al la progreso de sia tuta klaso.

Tre ofte la politikisto el proleta deveno faris precizan analizon de klasaj privilegioj, sed tre ofte ĉi tiu analizo ĉesis ĉe la sojlo de la plej intimaj personaj kondiĉadoj: kiuj implikas iliajn erotikajn elektojn.

En ĉi tiu kampo li konservas sensajn kaj vidajn kondiĉigojn, kiuj akceptigas al li la burĝan idealon de ina beleco kaj ligas por li tiun idealon al la ebleco de la plej intensaj emocioj.

En tia situacio ofte okazos, ke la burĝa sinjorino estos preferata al la proleta kamaradino.

Eĉ se tiu elekto ne nepre implicas rezignon de propraj politikaj idealoj, je la persona nivelo ĝi kunportos tre altajn kostojn, kiuj poste influos la kapablon batali kaj ligiĝi kun siaj kamaradoj.

## NE PLU ESTI JUNA<sup>39</sup>

Ne plu esti juna ofte signifas ne nur, ke multaj aferoj, kiuj iam ne kostis al ni penon, nun kostas al ni penon, sed ĝi ankaŭ signifas pli grandan facilecon ĉirkaŭpreni pli da spacoj por da lukto, ĉar la politika pasio reviviĝis paralele kun la malstreĉiĝo aŭ formorto de aliaj pasioj.

Se oni volas daŭre havi viglan percepton pri mondo, en kiu oni baldaŭ ne plu ĉeestos, oni devas disvolvi pli viglan kaj neinteresan amon al tiuj, kiuj daŭrigos nian lukton [...].

Grupo de dek- ĝis dekdujaraj infanoj plendis al sia plenkreska amiko pri la miskompreno de la aliaj plenkreskuloj pri ilia bezono havi spacon por ludi.

Ili diris: “Ankaŭ plenkreskuloj estis infanoj, kial ili ne komprenas nin? Se ni ne komprenas plenkreskulojn, ni estas pli pravaj, ĉar ni neniam estis plenkreskuloj”.

Verdire povas okazi ne nur, ke la plenkreskulo forgesas la bezonojn de la infano kaj juĝas raciaj nur siajn proprajn bezonojn, sed povas ankaŭ okazi, kaj kutime okazas, ke la maljunulo – krom se li havas intensan komunikadon kun la plej junaj homoj – tendencas ne konsideri la bezonojn de tiuj, kiuj ne estas liaj samuloj.

Esti maljunulo – kiam oni politike engaĝiĝas – ofte kondukas al rimarkinda simpligo de siaj bezonoj kaj al la alprenado – kiel propraj – de la bezonoj de la parto de la homaro, al kiu oni konscie referencas.

---

39. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 57 “Tesine varie”, fasc. 2, “Tesine la qualità della vita”.

El tio venas la eraro postuli similan simpligon fare de junuloj, kies vivo, male al tio, kion oni ofte pensas, ne estas pli simpla, sed pli kompleksa ol tiu de la matura homo, kaj pro la malfacileco povi kohere kontentigi individuajn bezonojn kaj eble antagonismajn kolektivajn bezonojn, kaj pro tio, ke la sperto ankoraŭ ne maldensigis kaj selektis iliaj vivhipotezojn.

### **LA AĜOJ DE LA VIVO<sup>40</sup>**

Batali por ke la maljunuloj estu feliĉaj ne nur utilas al maljunuloj, sed ankaŭ al junuloj, ĉar ĝi mobilizas iliajn plej bonajn kvalitojn kaj ĉar ĝi ĵetas pozitivan lumon sur la tutan vivon.

**PROPONI AL MALJUNULOJ RIPOZON ANSTATAŬ DEVONTIGON<sup>41</sup>** produktas deprimon ne nur ĉe la maljunuloj, sed ankaŭ ĉe la junuloj, kiuj vidas ĉe la deprimitaj maljunuloj (se ili ne lernis helpi ilin) la ĝenan bildon de tio, kio ili mem iam fariĝos.

Eduki en si la kvalitojn necesajn por helpi batali la deprimon de aliaj reprezentas formon de socie signifa preventado.

**LEONARDO DA VINCI SUB BELEGA KAPO DE MALJUNULO<sup>42</sup>** skribis la devizon “ankoraŭ mi lernas” kaj per tio li donis al ni la vivantan bildon de homa specimeno altiĝanta malgraŭ sia maljuneco kaj kune li malkaŝis la sekreton: daŭrigi lerni.

Ni scias fakte, ke bestoj, kies maljunaĝo estas multe malpli malgaja ol tiu de la homo, neniam ĉesas lerni dum ili vivas, ĉar ilia neestingebla scivolemo ne estas malhelpata de ia invito de membroj de sia specio, kiuj komprenigas al ili, ke venis nun la tempo flankeniri por doni “sian lokon al la junuloj”. Gis kiam ili vivas, estas loko por ili. La limigoj al ilia vicleco estas esence biologiaj, ili ne estas de socia origino.

La laŭgrada limigo de la homaj kapabloj ne rekte ligitaj kun biologiaj faktoj estas plejparte la rezulto de rezigno kreski, de erara penso pri la necesa fino de sia vivo kiel la fino de la vivo ĝenerale, same kiel rezigno kontribui al la ekspansio de alies vivo kaj do al sia propra pluvivo pere de la efikoj de siaj propraj pozitivaj agoj en la mondo, post sia morto.

---

40. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 34 “Giovani e anziani”, fasc. 1, “Anziani”, sottofasc. 2.

41. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 34 “Giovani e anziani”, fasc. 1, “Anziani”, sottofasc. 1.

42. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 44 “Pedagogia, handicap, scuola”, fasc. 9, “Educazione permanente”, sottofasc. 2.

25/7/1979<sup>43</sup>

**EĈ EN LA PERIODO, EN KIU NIA INDIVIDUA VIVO NUN ESTAS FINIĜANTA**, necesas rezervi por la pluformado kaj transformo de si mem signifan parton de la persona energio, kiun ni ankoraŭ posedas, krom de la energio, kiu senĉese venas al ni el la interhomaj ligoj de ni intence promociitaj kaj transformitaj.

En la naturo, la neripetebla diverseco de la brilo kaj de la koloroj de sunsubiro dependas preskaŭ ekskluzive de mediaj kondiĉoj: ne de la kvalito de la stelo, kiu mortas.

Ĉe nia specio la mortanta stelo diferencas de la suno pro tio, ke ĝi konscie transformis ne nur la medion, sed ankaŭ sin mem: Krome ĝi ankaŭ kapablas antaŭvidi, almenaŭ parte kaj proksimume, la efikojn sur la mondo de la suferitaj kaj provokitaj transformoj kaj, almenaŭ ene de iuj limoj de tempo kaj spaco, ankaŭ la efikojn de la transformoj de la transformoj mem kaj de iliaj reciprokaj interagoj.

Ĉu iam ne estos eble por ĉiuj, kio estis eble en la pasinteco nur en iuj esceptaj kazoj?

Ĉu ne povus esti, ke iam la fino de ĉiu vivo koincidu kun ĝia maksimuma brilo?

**SE TIO, KIO FINIĜAS BONE, ESTAS BONA**,<sup>44</sup> kiel oni povas esti optimisma pri la homa vivo, se la kondiĉoj ne estas kreitaj, por ke eĉ ties parto ĝis nun difinita kiel la involucia aĝo, povu daŭre esti – almenaŭ en kelkaj rilatoj – evolua epoko?

En ĉi tiu perspektivo, eĉ la fino de la vivo povas aperi ne nur kiel io akceptebla, sed kiel la fino de feliĉa vojaĝo, same kiel aperas al ni endormiĝi lacaj post festo, kiu feliĉigis nin [...].

---

43. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 34 “Giovani e anziani”, fasc. 1, “Anziani”, sottofasc. 1.

44. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 34 “Giovani e anziani”, fasc. 1, “Anziani”, sottofasc. 2.



## ĈAPITRO 4

# La senraciaj timoj: instrumento de povo super homoj

### SE VI PERDAS VIDON DE LA EBLO

Se vi perdas vidon de la eblo  
vi ne plu rigardas: vi nur aŭskultas  
la malhelajn petojn de la internaĵoj.

Sen metamorfozo kaj sen celo,  
vi restus sub la homa:  
rompu viajn plumbĉenojn kaj ekiru.

10/1/1981

ACSM, Parma, /AntoniettaBernardoni/ busta 19  
“Poesie a macchina” (Poeziaĵoj per maŝino)

## ENHAVTABELO

- Ĉiu civitano kapablas kontribui al sia kaj alies mensa sano...
- Neraciaj timoj reprezentas malĝustan formon de lernado...
- La neraciaj timoj de plenkreskuloj kaj infanoj
- La asembleo kiel malkondiĉa agento por ĉiuj
- Mutismo kaj surdeco
- Neraciaj timoj kiel ilo por la koloniigo de la infano
- Se 4-jaraĝa infano vidas la diablon, ĉu li estu konsiderata mensmalsana?
- Timo de la sekso
- La malpermeso de la deziro...
- Eĉ kiam oni kapablis supervenki...
- Ne la senkonscio sed la nekonfeseblo
- Ne la senkonscio sed la nekonfeseblo...
- Ne la senkonscio sed la nekonfeseblo
- La forto de la racio...
- Timo de la peko de penso (1984)
- Timo de la peko de penso (1980)
- La reflekso de orientiĝo kaj esplorado...
- La teruro de mensmalsano kiel kaŭzo de mensmalsano...
- La timo je soleco, la timo je mensa malsano...
- Al kiu utilas, ke oni timu frenezigi?
- Al kiu utilas ekzameni alies konduton kaj personecon
- Dialektiko de biologio kaj socio en la psikiatria problemoj
- Psikozo kiel interplektiĝo de surmetitaj fobioj...

**ĈU CIVITANO KAPABLAS KONTRIBUI AL SIA KAJ ALIES MENSA SANO,<sup>1</sup>** rekonante siajn timojn kaj venkante ilin.

**NERACIAJ TIMOJ REPREZENTAS MALĜUSTAN FORMON DE LERNADO,<sup>2</sup>** malutila por la subjekto: ili tamen povas estingiĝi per la aktiva interveno de la subjekto mem kiel ĉefrolulo, helpita de siaj kunuloj, por esti anstataŭigitaj per nova lernado, pli taŭga por ebligi feliĉan ekziston.

### **LA NERACIAJ TIMOJ DE PLENKRESKULOJ KAJ INFANOJ<sup>3</sup>**

Timo esence originas el aparteco, izolado, soleco, malfido inter homoj [...]. Sed por havi pli feliĉan kaj plenan personan, familian kaj socian vivon ni bezonas scii kiel liberigi nin de ĉia senracia timo, de ĉia angoro ne pravigita de realaj kialoj, de angoro ne ligitaj al konkretaj danĝeroj [...].

Ni unue observu, kiel la diverseco de povo inter la diversaj membroj de la familio kaj la diferencoj de traktado, kiuj devenas de ĝi, konsistigas terenon, sur kiu pli facile aperas sentoj de angoro kaj timo.

Tamen, jam ekde hodiaŭ, necesas klopodi agi ene de sia propra familio tiel, ke (ne nur en la kunteksto de la familio mem, sed ankaŭ rilate al la plej proksimaj kunuloj) la interhomaj rilatoj ebligu ke, almenaŭ laŭ la nuntempa eblo, “ĉiu donu laŭ siaj kapabloj kaj ricevu laŭ siaj bezonoj”, do unuflanke, ke la kapabloj de ĉiu daŭre pligrandiĝu, aliflanke ke la bezonoj de ĉiu estu identigitaj kaj submetitaj al konfirmo kaj kritika esploro.

Alivorte, necesas scii kiel malakcepti falsajn bezonojn induktitajn de la konsumsocio, same kiel nepras kapabli malkovri verajn bezonojn, kiujn socio regata de la leĝoj de la merkato emas kaŝi kaj sufoki, krom se ili estas bezonoj, kiuj estas kontentigitaj per la vendo de varoj aŭ havaĵoj. Kvankam tiuj navajo mem ne estas varoj, ili estas nerekte varigitaj, obee al la ĝeneraligo de la merkataj leĝoj, kiuj – en socio kiel la nia – trapenetas kaj deformas la tutan vivon de la homoj. Fakte, ni vivas en epoko, en kiu ĉio fariĝis objekto de aĉeto kaj vendo. Temas eĉ pri aferoj, kiuj en la pasintaj epokoj neniam estis konsiderataj kiel objektoj de vendo, kiel reciproka helpo inter homoj, kiu ĉiam estis donita, sed neniam vendita. Do eĉ amo, estimo, scienco, konscienco: ĉio transiris en la komercon [...].

Ni tre bone scias, ke la rektaj kaŭzoj de la neraciaj timoj troviĝas [...] en la leĝoj, kiuj reguligas la plej altan nervan agadon, je kies bazo, kiel montris Pavlov kaj lia Lernejo, estas la tiel nomata kondiĉita reflekso.

---

1. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 42 “Paure”, fasc. 1, “Paure”.

2. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 42 “Paure”, fasc. 1, “Paure”.

3. A. Bernardoni, *Psichiatria senza futuro*, La Linea, Padova, pp. 35-39.

Por la momento ni nur memorigas, ke per kondiĉita reflekso ni celas apartan reason de la organismo al eventoj de la ekstera mondo.

La kondiĉita reflekso establas provizoran ligon inter la malsamaj partoj de la centra nervosistemo kaj mediaj stimuloj. Tiun ligon do dependas samtempe de mediaj kondiĉoj eksteraj al la organismo kaj de kondiĉoj internaj al la organismo mem.

Estus ege utile, ke ĉiuj povu koni la leĝojn de la plej alta nerva agado, kaj ankaŭ la kondiĉojn de ekesto kaj malapero de kondiĉitaj refleksoj, ankaŭ por malhelpi ke la malkovroj de la granda sovetia sciencisto – kiu zorgis tiom multe pri la libereco kaj la feliĉo de la homoj – transformu sin en ilon de subpremo, de falsado kaj, do, en plian instrumenton de timo.

Sed se, anstataŭ kelkaj specialistoj (kiel okazas nuntempe), la tuta loĝantaro regus la sciojn rilatajn al la fundamentaj leĝoj, kiuj reguligas la plej altan nervan aktivecon, ne eblus, ke ĉi tiuj leĝoj, anstataŭ esti aplikataj al la serĉo de pli granda homa libereco, povu esti distorditaj – fare de tiuj, kiuj tenas la povon – por la celo de subpremo kaj ekspluatado.

En multaj kazoj, fakte, per la fenomeno de kondiĉita reflekso, la regantaj klasoj arte kultivas la grundon, sur kiu timo povas senkonteste superregi. Tion pruvas al ni konkretaj faktoj, kiujn ni ĉiuj kapablas konstati.

Ekzemple, ni konsideru timon, kiu ofte havas ĉe laboristoj bremsan agon al la lukto por konkrete realigi siajn rajtojn kaj al la ligo kun kamaradoj kaj organizaĵoj.

Mi aludas ĉi tie al la timo paroli publike, kiu tre ofte instigas laboristojn rezigni fari sian propran kontribuon, ĉar tio postulus la kuraĝon elparoli por elmontri spertojn kaj projektojn, kiuj koncernas ilin persone.

“Parolu vi, kiu studis! Mi ne kapablas, mi estas nur laboristo” aŭ “mi estas nur kamarano, se mi parolus, kiu scias kiom da eraroj mi farus!”.

Sed silentante, la laboristo jam faris la plej gravan eraron el la socia kaj politika vidpunktoj, antaŭ kiuj ajnaj gramatikaj eraroj havus nenian gravecon: li fakte rezignis aserti siajn rajtojn, ne pro libera elekto, sed pro timo. Li delegis – negrave ĉu en najbara asembleo aŭ dum publika debato – la defendon de sia vido pri aferoj al homoj, kiuj certe kapablas paroli, sed kiuj tre malofte konas kaj partoprenas en la bezonoj kaj en la nepraj interesoj de tiuj, kiuj delegis ilin paroli, anstataŭ havi la kuraĝon esprimi sin en la unua persono, eble eĉ uzante la dialekton.

La laboristo, kiu uzas la dialekton, faras geston de konfido en si kaj en sia klaso, reasertante la rajton de la popola kulturo kaj lingvo stari – kun digno almenaŭ egala – apud la lerneja kulturo.

Farante tion, li postulas por ĉiu la rajton esprimi sin plene – sen timo fari erarojn – en sia propra gepatra lingvo.

Sed kial ni tiom ofte hontas uzi la dialekton, aŭ kial ni tiom timas fari gramatikan aŭ sintaksan eraron?

Ĉar ekde la elementa lernejo la uzado de dialekto aŭ gramatika eraro estis asociita – per kondiĉita refleksio – kun la riproĉo de la instruisto.

Fakte, en la granda plimulto de la kazoj, la instruisto neniam klopodis plibonigi la enhavojn de homa kaj socia valoro elmontritajn de la infano.

Jen do la laboristo, kiu, kvankam li havas senfinajn argumentojn por debati kaj kunligojn por substreki, tamen cedeme obeas – kontraŭ sia propra intereso – la altrudon de tiu instruisto, kiu antaŭ dudek aŭ kvardek jaroj kondiĉigis lin silenti, nur ĉar la tiama infano ne havis la sekurecon paroli la italan sen eraroj.

Sed kiu parolos anstataŭ tiu laboristo?

Kiu malkaŝos liajn problemojn?

Je ĝenerala nivelo, la laboristaj organizaĵoj protektas kaj esprimas la interesojn de la laborista klaso kaj de ĝiaj aliancanoj. Sed je la nivelo de ĉiutaga misuzo kaj kvartala asembleo kio anstataŭos la silenton de la laboristo, kiu fariĝis – arte – malsekura ekde infanaĝo pro lerneja kondiĉado?

Se la problemoj ne estas diskutata ekde la radikoj kaj ni ĉiuj ne kune konsentas venki la negativan kondiĉadon tiel ofte induktitan de la lernejo, daŭre parolos la privilegiuloj, kiuj ne eraras en gramatiko aŭ sintakso, sed kiuj – plej ofte – ne persone spertinte la sociajn problemojn de la subpremataj klasoj, ne povos doni (kiel privilegiuloj, ne kiel kleruloj!) validan kontribuon al la solvo de sociaj problemoj.

Oni neniam substrekos sufiĉe la gravecon – por la celoj de vera demokratio – de la konkero – fare de ĉiuj el ni – de la kutimo kaj de la kapablo plene esprimi sin mem, en la unua persono, negrave ĉu en la itala aŭ en dialekto. Gravas libere esprimi siajn ideojn, por defendi siajn interesojn kaj rajtojn, je la nivelo de persona kaj ĉiutaga politiko, kaj je la nivelo de ĝenerala politiko [...].

12/3/1975<sup>4</sup>

#### **LA ASEMBLEO KIEL MALKONDIĈIGA AGENTO POR ĈIUJ**

Ni provu nun ekzameni la efikojn devenantajn el la fakto paroli antaŭ popola asembleo pri problemoj, kiuj foje ĝis tiam aperis tiel malfacilaj aŭ hontigaj kaj humiligaj, ke ili eĉ ne povus esti pensitaj eksplicite, en sia tutaĵo, sen ke la menso tuj forkuru de ili pro timo, honto aŭ la sento de senutileco devenanta de la kredo, ke temas pri nesolveblaj problemoj.

Iu el ni jam multajn jarojn antaŭe, dum la periodo en kiu li ŝajne agis kiel privata terapeŭto, sed fakte kiel scienca esploristo je la servo de la laborista klaso, rimarkis la ekstreman utilecon de la fakto, ke la terapeŭto denove rakontu, plurfoje, per trankvila voĉo, kun la maksimuma sereneco kaj komprenemo ebla, subjektive kaj foje eĉ objektive terurajn travivaĵojn de la ĉefrolulo. Tiu lasta, post pli-malpli longa serio da tiaj ripetoj, atingis kompletan inhibicion rilate al la

---

4. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 42 “Paure”, fasc. 1, “Paure”.

iama kondiĉita respondo, kiu antaŭe kaŭzis al li tiom da damaĝo kaj sufero. Tiamaniere ekestis iom post iom nova kondiĉado, surbaze de kiu la traŭmata epizodo povis esti travivita de la ĉefrolulo same kiel ĝi estis travivita de la terapistino: tio estas signifa homa sperto, kiu ekde tiu momento komprenigas al li pli profunde la suferojn de alia, tiel iĝante pli konkrete pli homa.

La malapero de la malnova kondiĉado kaj la starigo de la nova havis ankaŭ kiel sekvon restrukturadon de la personeco de la ĉefrolulo kaj ankaŭ la akiron – per procezo de ĝeneraligo – de konfido en la ebloj de transformado de la homoj kaj do de la mondo.

Komencante de la observoj ŝajne faritaj ĉe unuopaj individuoj (el kiuj estis tamen ekzamenita la tuta ligo de la sociaj rilatoj, kies parto ili estis), ne estis malfacile vidi, kiel simila procezo okazis ankaŭ dum popolaj asembleoj, sed multe pli rapide kaj efike.

8/5/1978<sup>5</sup>

## **MUTISMO KAJ SURDECO**

Senfinaj estas la manieroj uzataj de la reganta klaso por silentigi la membrojn de la regataj klasoj [...].

Ni limigu nin al la ĉiutaga vivo, kie estas duobla trompo, kiu unuflanke povas esti difinebla kiel muteco, aliflanke kiel surdeco. Alivorte, oni klopodas mutigi la membrojn de la subpremataj klasoj, por ke ili ne povu esprimi sian ribelon kaj ne povu batali kontraŭ la reganta klaso, kiu per la reganta kulturo konservas ilian pensadon en malsupera situacio.

Sed krom mutigi la membrojn de la dominataj klasoj, oni klopodas igi la membrojn de la dominaj klasoj iel surdaj.

Se iuj el ili, precipe junuloj ankoraŭ ne sufiĉe kondiĉigitaj por ekzerci klasan privilegion, estus malkvietigitaj kaj instigitaj pensi per la protestoj de la subprematoj, estante finfine instigitaj transiri al la alia flanko, jen oni vidas la utilecon de la barilo. Per sia kondiĉigo horori antaŭ iu ajn gramatika eraro, la membro de la regataj klasoj, kiu aŭdos subprematon paroli, estos frapita, ne vere de la enhavo de lia protesto, sed precipe de la gramatikaj eraroj ĉeestantaj en lia parolo. Alivorte, li estos frapita pli fare de la formo ol de la enhavo.

---

5. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 46 “Personalità e rapporti interpersonali 2”, fasc. 2, “Condizionamenti di classe”.

## **NERACIAJ TIMOJ KIEL ILO POR LA KOLONIIGO DE LA INFANO<sup>6</sup>**

Por helpi niajn infanojn venki timojn, ni devas unue fari enkondukan distingon: timo estas reago, kiu ne ĉiam estas malutila. Estas cirkonstancoj, en kiuj ĉi tiu malagrabla sento utilas, ĉar ĝi puŝas nin eskapi el realaj danĝeroj. Estas utile, ekzemple, ke ĉiu infano sciu, ke furioza dogo devas esti evitata, sed ne utilas al li timi senkulpan muson, kiu ne povas fari al li iun ajn malbonon.

Necesas do antaŭ ĉio fari klaran diferencon inter timoj asociitaj kun la ĉeesto de realaj danĝeroj kaj timoj ligitaj kun fenomenoj, kiuj ne estas danĝeraj en si mem, sed kiuj iĝas malutilaj nur pro la neracia reago, kiun ili kaŭzas ĉe la subjekto.

Se estas senracia timo en aparta individuo, por malfortigi ĉi tiun timon antaŭ la objekto de angoro, necesas krei malstreĉan atmosferon uzante kaj la fonton de sekureco, kiu povas veni, ekzemple, de la konfido de iu pozitiva interhoma rilato, kaj la kontentigon de tiuj bezonoj, kiuj estas objektivaj gravaj.

Ni imagu, ekzemple, ke infano havas senracian timon koncerne apartajn insektojn kaj ke tio malhelpas lin ludi ekstere kun siaj kunuloj.

Se la infano ricevas agrablajn stimulojn (kiel la guston de ĉokolado) samtempe kun la ĉeesto de la objekto de angoro, se ni zorge trankviligas la infanon ankaŭ per la sufiĉa distanco, ni vidos, ke la timo malpliigĝos, ĉar la agrabla efiko de manĝado kaj la trankviliga distanco de la objekto de timo estigos objektivan kontentigon, malgraŭ la relativa ĉeesto de la objekto de timo.

Por atingi naturan indiferentecon rilate al “la objekto de angoro”, oni devas ripeti la supre priskribitan metodon iom post iom malpliigante la distancon de la objekto, sed ĉiam strikte respektante la tempon de la infano.<sup>7</sup>

## **SE 4-JARA INFANO VIDAS LA DIABLON,<sup>8</sup> ĉu li estu konsiderata mensmalsana?**

Multaj faras tion kaj ne pro nescio. Estas eminentaj fakuloj, kiuj tiel pensas.

Estas facile diri al 4-jara infano, ke li estas freneza.

Pli malfacile estas diri, ke estas terure timigi infanon ĵus naskitan kaj plene sub la arbitro de plenkreskuloj per tiaj kruelaj bildoj.

---

6. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 46 “Personalità e rapporti interpersonali 2”, fasc. 2, “Condizionamenti di classe”

7. Gruppo MCE di Modena “Studio dell'uomo nella scuola: le paure” in “Co-operazione educativa”, 1972, n. 5-6.

8. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 42 “Paure”, fasc. 1, “Paure”.

8/6/1988<sup>9</sup>

### **TIMO DE LA SEKSO**

La timo de la sekso (aŭ spekulde ĝia diigo) estas mortiga malhelpo al edukado je tenero, kiu tamen estus vere tiel facila, ĉar oni ne devas instrui ion ajn, sed nur ne malhelpi ion, kio konsistigas la esencon mem de ĉiu nova vivo, inkluzive de tiu de la homido, kiu petas kaj vekas nenion krom tenero.

17/6/1988<sup>10</sup>

**LA MALPERMESO DE LA DEZIRO** malhelpas la rekonon de la individuaj impulsoj, biologiaj kaj konaj, disponeblaj por la ago.

La temo estas ege kompleksa, sed, se oni ne havas la kuraĝon alfronti ĝin, oni devos kontentiĝi – kiel nun oni jam faras pli kaj pli grandskale – per perfortaj agadoj de puna kaj subprema naturo, pro kiuj individua kreemo kaj fantazio estos distorditaj en la urĝa serĉado de anstataŭaj kontentigoj.

**EĈ KIAM ONI KAPABLIS SUPERVENKI**<sup>11</sup> el ideologia vidpunkto, ke seksumi estas peko, en la personeco de la subjekto restas mem-vundigaj mekanismoj, kiuj kontraŭ lia volo malhelpas lin fari tion, kion li antaŭe evitis, kredante ĝin peko.

25/5/1980<sup>12</sup>

### **NE LA SENKONSCIO SED LA NEKONFESEBLO**

Ne la senkonscio! sed la timo de la ŝanĝiĝanta vero.

Ne la senkonscio! sed la timo de la konkreta transformo de la realo kaj de la povo-rilatoj.

Ne la senkonscio! sed la timo ke malegalaj pov-rilatoj estu malkaŝataj je la nivelo makro- kaj mikro-ekonomia, socia kaj politika.

**NE LA SENKONSCIO SED LA NEKONFESEBLO:**<sup>13</sup> la gesto, la rilato, la penso, kiuj forte kolizias kun la kondiĉado trudita de la burĝa moralo [...] La nekonfeseblo

---

9. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 42 “Paure”, fasc. 1, “Paure”.

10. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 46 “Personalità e rapporti interpersonali 2”, fasc. 8, “Sesso”, sottofasc. 1.

11. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 46 “Personalità e rapporti interpersonali 2”, fasc. 8, “Sesso”, sottofasc. 2.

12. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 49 “Psicanalisi”, fasc. 7, “Psicanalisi”, sottofasc. 1.

13. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 49 “Psicanalisi”, fasc. 7, “Psicanalisi”, sottofasc. 1.



perdas sian karakteron de individua kulpo kaj transformiĝos en konsekvenco de mondo, kiun oni devas ŝanĝi, por ke ne nur la individuo, sed la tuta homaro povu progresi.

22/3/1984<sup>14</sup>

#### **NE LA SENKONSCIO SED LA NEKONFESEBLO**

Ne la senkonscio sed tio, kio – laŭ jud-kristana moralo – estas konsiderata nedirebla, malhelpas la fluon de la informoj inter la biologiaj tavoloj kaj la plej alta agado de la pensanta materio: la konscienco.

La timego de la tiel nomata “peko de penso” stultigas.

Vigla kaj libera percepto de personaj deziroj estas malutila al povo, malhelpante la konservadon de la ekzistanta stato de aferoj [...].

**LA FORTO DE LA RACIO**<sup>15</sup> povas esti febligata de la povo, pere de la timego de la peko de penso aŭ pere de la “nerezisteblaj” fortoj de diigita senkonscio, nehaltigebla fonto de “obskuraj malbonoj”, kiujn nur la religiaj kaj monavidaj ritoj de la psikanalizisto ebligis elteni.

13/5/1984<sup>16</sup>

#### **TIMO DE LA PEKO DE PENSO**

Vi ne povas malpermesi al vi pensi tion, kion vi pensas: ju pli vi insistas pri la malpermeso, des pli la pensoj, kiuj turmentas vin, ekkaptos vin ĝuste per tiu malpermeso, per kiu vi esperas povi ilin ekskludi. En tute simila maniero tiuj, kiuj serĉas pacon sin armante kiel eble plej multe, povos nur pliigi la agresemon de la malamiko.

1980<sup>17</sup>

#### **TIMO DE LA PEKO DE PENSO**

Nur libera penso, kiu konsideras sen timo ĉiujn dezirojn kaj ne nur la “bonajn”, povas ebligi kritikan elekton de agado, kiu havos multe pli da probableco esti ĝuste elektata kaj vere efektivigata, se ni ne kaŝis la kontraŭajn dezirojn, kiuj ĉeestas ene de ni.

---

14. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 42 “Paure”, fasc. 1, “Paure”.

15. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 42 “Paure”, fasc. 1, “Paure”.

16. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 42 “Paure”, fasc. 1, “Paure”.

17. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 53 “Quaderni”, fasc. “1980”.

5/12/1974<sup>18</sup>

**LA REFLEKSO DE ORIENTIĜO KAJ ESPLORADO** kiel elementa sinteno de enketado, el kiu, ĉe la homa specio, povas ekesti ĉionentena vido de la mondo.

Al la subjektoj, en kiuj la reflekso de orientiĝo kaj esplorado malfortiĝis pro la timo je peko aŭ je malkovro de la veraj fontoj de jam ne plu tolerebla privilegio, ne restas elekto krom tiu de tute antaŭformita mondkoncepto. En ĝi ĉiu percepto de la realo trovas jam kanonigitajn aranĝon kaj interpreton (tiel senigante la subjekton de ĉia konkreta analizo de konkretaj situacioj, forigante de li ĉian ajn kritikan kaj memkritikan armilon kaj fraŭdante lin samtempe je la realigo de sia propra potencialo kaj je la kapablo ligi sin kun siaj kunuloj cele al transformado de la realo).

**LA TERURO DE MENSMAKSANO**<sup>19</sup> kiel kaŭzo de mensmalsano kaj disiĝo inter homoj

Kiom da energioj flankenlasitaj de la lukto! Kiom da vivoj detruitaj de timo je frenezo, kiu fakte estas nur rezigno disponi, pro timo, je la uzado de tio, kio apartenas al ĉiu viro kaj virino, naskiĝintaj sur nia planedo!

La grava afero estas timi kaj esti nesekuraj.<sup>20</sup>

1/5/1978<sup>21</sup>

**LA TIMO JE SOLECO, LA TIMO JE MENSA MALSANO**, la timo vivi, la timo ne povi esti amataj, la timo neniam povi atingi tiun personan liberecon, je kiu ĉiuj sentas pli-malpli konfuzo havi rajton, estas iuj el la plej oftaj fontoj de sufero. Kun malsama intenseco kaj diversmaniere, ili ĉeestas ĉe tiuj, kiuj estis difinitaj – per malsamaj diagnozoj – mensmalsanuloj.

25/5/1975<sup>22</sup>

**AL KIU UTILAS, KE ONI TIMU FRENEZIĜI?**

Neniu organo en nia korpo estas pli bone protektita ol nia centra Nerva Sistemo.

Akva tavolo kaj eĉ tri meningo, fortika krania skatolo kaj forta kaj fleksebla vertebrala kolumno protektas ĝin kontraŭ eksteraj traŭmatoj.

---

18. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 40 “Neurofisiologia e ATP”, fasc. 1, “Appunti e tesine”, sottofasc. 1.

19. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 42 “Paure”, fasc. 1, “Paure”.

20. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 42 “Paure”, fasc. 1, “Paure”.

21. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 42 “Paure”, fasc. 1, “Paure”.

22. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 42 “Paure”, fasc. 1, “Paure”.

Koncerne la sidejon de nia pensado, la tiel nomata griza materio de nia cerbo, konsistas el senlime pli granda nombro da ĉeloj ol ni efektive uzas, tiel ke kiam kelkaj el ili estas difektitaj, aliaj povas anstataŭigi ilin, kvankam ili restis neaktivaj ĝis tiam.

Krome, ĝis antaŭ kelkaj jaroj oni kredis, ke la ĉeloj de la centra nervosistemo ne kapablas reproduktiĝi tiel facile kiel la ĉeloj de nia haŭto reproduktiĝas, kiam vundo ilin damaĝis aŭ forigis. Tamen, lastatempe oni malkovris, ke, male al tio, kion oni ĉiam pensis en la pasinto, ankaŭ la cerbaj ĉeloj kapablas reprodukti sin.

Tra la jarmiloj de jarmiloj, kiuj kondukis al la formiĝo de la homa specio, la plej grava organo de ĉiu vivanta estaĵo (tiu, kiu komunikigas ĝin per la sent-organoj kun la ekstera mondo) disvolviĝis en la homo en multe pli alta maniero, kvante kaj kvalite, ol ĝi faris en iu ajn alia bestospecio.

**AL KIU UTILAS EKZAMENI ALIES KONDUCTON KAJ PERSONECON<sup>23</sup>** kiel juĝisto de la mensa sano aŭ malsano?

Al kiu utilas ekzameni alies konduton kaj personecon kun spirito ne de kunulo aŭ kontraŭulo sed kiel juĝisto de la mensa sano aŭ malsano?

Al kiu utilas enigi en kiel eble plej multe da homoj la timegon povi iam fariĝi viktimo de “frenezo”?

Kiu profitos de tiom da damaĝo?

Kiel eblas, ke la apartenantoj al la laboristaj klasoj, portantoj de la estonteco de la tuta homaro, povu eduki unu la alian por batali, se ĉiam pendas super ili la koŝmaro, arte kreita de la regantaj klasoj, de la ĉiam ebla mensa malsano?

Nur komprenante, ke preskaŭ ĉiuj ŝanĝoj de personeco kaj konduto dependas de la nekapablo adekvate ligi sin kun siaj kamaradoj, nur per liberigo de la timego de mensa malsano [...] ĉiu laboristo povos agi kiel stimulo por la kresko de siaj najbaraj laboristoj, kiuj reciproke, favoros lian personan kreskon.

La konduto de viro aŭ virino estas la rezulto de nevola aŭ intenca kondiĉado.

De la plej frua aĝo, la homido estas kondiĉigita kondukti malsame depende de la malsama personeco kaj klasa aparteno de tiuj, kiuj lin kreskigas, edukante aŭ misedukante lin.

Sed ekde iu momento la infano – se li havas fidon je siaj propraj kapabloj – povas alpreni la funkcion de edukanto de si mem. Kiam oni alprenis tiun funkcion en intenca maniero, oni ne plu rezignos je ĝi dum sia tuta vivo, kvankam oni devas konscii, ke tiu, kiu sin edukas, ne povos fari tion individueme, sed nur per la helpo de aliaj.

---

23. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 42 “Paure”, fasc. 1, “Paure”.

## DIALEKTIKO DE BIOLOGIO KAJ SOCIO EN LA PSIKIATRIA PROBLEMO<sup>24</sup>

Ekzistas konduktismaj ŝanĝoj ligitaj – en maniero science konstatita aŭ konstatebla – kun akutaj aŭ kronikaj ŝanĝoj de la centra nerva sistemo: ili apartenas al medicina branĉo nomata neŭrologio. Kvankam neŭrologio foje kapablas doni ĝisfundajn klarigojn rilate al la kaŭzoj, mekanismoj de komenco, evoluo, prognozo, kaj ankaŭ al eblaj farmakologiaj aŭ dietaj terapioj, ĝi devus – laŭ nia opinio – pli multe konsideri la rezultojn akiritajn de la sciencoj de lernado kaj edukado. Oni devas kompreni ilin en la plej profunda kaj vasta senco de la vorto, kiu inkluzivas ankaŭ la socian aspekton de la personeco de la paciento kaj de la homoj plej proksimaj al li: ĉiu malsanulo, precipe tiu neŭrologia, fakte, prezentas al si mem kaj al la komunumo specifajn konduktismajn problemojn.

Ekzistas ankaŭ konduktismaj ŝanĝoj, kiuj ne estas ligitaj al anatomiaj aŭ biokeemiaj lezoj de la centra nerva sistemo sed nur al lernaj difektoj aŭ eraroj: la sciencoj de lernado kaj edukado traktas, aŭ devus trakti ilin.

Ekzemple, estas tre ofte diagnozitaj kiel “psikozo” severaj ŝanĝoj en konduto, kiuj devenas de densa interplektiĝo de surmetitaj fobioj. Pacience dissolvante ilin – per taŭga malkondiĉo – la subjekto povas reakiri sian propran liberecon de elekto kaj movo, kune kun pli justa rilato kun si mem kaj la aliuloj.

Fine, ekzistas preciza plano de la Kapitalo, kiu, por povi kreski neĝenate per ekspluatado, klopodas certigi, ke la ekspluatitoj estu necertaj, nesekuraj, pretaj rekoni sin nekapablaj ĝuste percepti la ĉirkaŭan realon. Tiel ili estos nekapablaj funkcii por transformi sian propran ĉiutagan realon -- kun la helpo de la plej proksimaj kamaradoj -- kaj por transformi – en intima rilato kun la laboristaj organizoj – multe pli vastan realon.

Jen do la utilo kaj la funkcio, por kapitalismaj celoj, de la psikiatria “scienco”.

En la pasinto ekzistis aliaj fontoj de timigo kaj malsekuro por la homoj, sed kiam la antikvaj fontoj komencis sekigi, oni sentis la bezonon de novaj iloj kapablaj ĝenerale malkuraĝigi kaj selekte frapi la laboristojn kaj iliajn aliancinojn.

La ĉefa instrumento de malplivalorigo de la homa personeco, precipe por membroj de la laborista klaso kaj iliaj aliancinoj, estas reprezentata de la psikiatrio, al kies efiko kunlaboras hodiaŭ pli kaj pli ofte psikologio kaj psikanalitika “kulturo”.

Psikologio agas precipe en lernejoj, en la kunteksto de profesia gvidado kaj dungado, por la celoj de klas-bazita selektado; la psikanaliza “kulturo” ĉiel nutras malfidon je la homo kaj je lia kapablo koni sin kaj la mondon, ligante sin kun organizoj kaj kunuloj. Ĝi eĉ aŭdacas iri ĝis interpreti la grandajn eventojn de la internacia politiko por deturni atenton de la konkretaj sociekonomiaj realaĵoj, kiuj formas ĝian bazon.

---

24. A. Bernardoni, *Psichiatria senza futuro*, La Linea, Padova, pp. 57-65.

## LA PSIKOZO KIEL INTERPLEKTIĜO DE SURMETITAJ FOBIOJ<sup>25</sup>

Tre densa reto, kiu ŝajne tiel forta kaj rezistema, ke ĝi povas nerepareble teni homan vivon kaptita, subite ĉesas konsistigi nesupereblan obstaklon kaj preskaŭ fandiĝas sub la manoj de tiu, kiu ĝin ekzamenas, se en iuj punktoj aperis truo.

Kiu, ekzemple, sekvante superstiĉan timegon de la infero, vidas embuskojn kien ajn li turnas sian rigardon, povas esti helpita de la fakto, ke la malnova fotelo (malantaŭ kiu, laŭ liaj timoj, kaŝatendis la diablo, kiel en tiom multe de la medio de li loĝata) komencas povi esti asociita de li kun la ideo de la ĝojo vivi. Tio povas esti alportata de la ideo de kunulo, kiu sidas kelkfoje apud li sur tiu fotelo, amike kaj gaje diskutante kun li pri liaj problemojn.

En aliaj kazoj, sufiĉas foto de tiu fotelo portata en medion, en kiu kreiĝis sento de varmo kaj sekureco, por ke la sorĉo dissolviĝu kaj maŝo de la reto estu interrompita. Tiu maŝo povas fariĝi pli kaj pli larĝa ĝis permesi al la kaptitoj konkeri definitivan liberigon.

En aro de perturboj, kiel tiuj difinitaj kiel “mensa malsano”, sufiĉas tre malmulte.

Junulo 20-jara suferis kelkajn psikiatrajn enhospitaligojn, dum kiuj li estis diagnozita je “disocia sindromo” (skizofrenio).

El lia rakonto ni ekscias, ke, male al la atendoj de liaj gepatroj, kiujn li senkritike faris siajn, li devis rezigni pri siaj studoj post du sinsekvaj malsukcesoj. Jam post lia unua malsukceso vizitadi la lernejon kaŭzis al li senĉesajn suferojn: antaŭ siaj samklasanoj li sentis sin malinda kaj nekapabla.

Liaj gepatroj de kamparana origino per sia laborego (ŝi servistino, li portisto) sukcesis malfermi tre malgrandan butikon, al kiu ili sin dediĉis – korpe kaj anime – kun la espero povi diplomigi sian filon.

Sed post la fina kolapso de tiaj esperoj, la ĉiutaga laboro fariĝis ĉiam pli malagrabla. La filo, ne havante alian okupon, pasigis la plej grandan parton de la tago maleme aŭ eĉ naŭze.

La naŭzo transformiĝis en timo precipe en la momentoj de eniro kaj eliro de la lecionoj kaj ĝenerale en la posttagmezoj, kiam estis la danĝero, ke unu el liaj kunuloj aŭ iliaj familianoj povu eniri ilian butikon, situantan en urbeto de kelkaj miloj da loĝantoj.

Precipe la gepatroj ne povis klarigi al si, kiel en la komenco de la tago ilia filo aperis aparte laca kaj rifuĝis en la malantaŭan ĉambron por rigardi la plafonon, rifuzante – malgraŭ la nediskuteblaj ordonoj de la patro – ial eliri el tie.

Rekte ataki tian staton de aferoj estis evidente neeble kaj senrezulte: psikiatroj multfoje provis esplori la misterojn de la psiko de la knabo, sed la rezulto estis

---

25. ACSM, Parma, /Antonietta Bernardoni/, busta 30 “Disalienistica”, fasc. 3, “Disalienistica antropoevolutiva”, sottofasc. 2.

pligraviĝo de simptomoj.

Nur kiam, radikale malatentante la perturbojn de la infano, ni komencis – kune kun li – turni nian rigardon al spacoj pli larĝaj ol tiuj, kiuj vekis en li timegojn kaj rifuzojn konsideri ilin, la kapabloj de analizo kaj sintezo, kiujn li havis kiel ĉiu alia homo, komencis agi aktive ekde la demando, kiel iuj aspiroj estas formataj kaj transformataj sub la influo de sociaj kondiĉigoj, kiuj agas en la individuo kaj en ties interhomaj rilatoj.

Li tiam komprenis la kialon de la ambicioj de siaj gepatroj kaj sian suferon senti sin instrumento de ne siaj propraj ambicioj, kiujn fine li ne kapablis kontentigi.

Ĉar tiuj ambicioj venis de liaj gepatroj, en la pasinteco li provis senkonscie adopti ilin kaj igi ilin siajn proprajn por plaĉi al ili. Ĝis sia malsano li vivis en obeemo al tiaj ambicioj. Nur kiam, kun la alproksimiĝo de la abiturientekzameno de la klasika liceo, li havis la klaran senton, ke li ne povas sukcesi, ekestis en li ia ĝenerala rifuzo, ne esprimita per vortoj kaj ne akompanata de ia ajn serĉado de konscio.

Li tiam estis petita fari enketon pri siaj samklasanoj kaj iliaj familioj, pri la signifo havi filon kiu vizitadas la liceon en tiu vilaĝeto.

La fakto mem posedi butikon vizitatan de la parencoj de liaj samklasanoj, kune kun la malgranda nombro da vilaĝ-loĝantoj, ebligis al li havi relative precizajn datumojn rilate al la apartena klaso kaj al la opinioj de ĉiuj roluloj.

Dum la esploro estis progresanta, subite la knabo ekkriis: “Mi nun komprenas, ke tio, kio plej terurigas min estas imagi, ke licea amiko vidu min, dum mi balaas mian butikon kun balailo en la mano”.

La sento de malkovro, akompanata de ĝojo kaj honto, tuj transformiĝis en gaja rido pro mia partopreno. “Morgaŭ matene mi venos kaj balaos vian butikon kaj mi volos balai la trotuaron antaŭ ĝi ĝuste en la tempo, kiam viaj samklasanoj preterpasas. Vi povos observi min el la malantaŭa ĉambro, eble kaŝita de nigra kurteno” [...].

Mi insistis, ke la sekvan tagon mi iros antaŭ lian butikon por balai la trotuaron ĝuste kiam la gimnazianoj preterpasos.

Unue li ne kredis je la seriozeco de mia propono, sed poste li konvinkiĝis.

Frue matene, kvaronhoro antaŭ ol mi devis foriri, sonoris la telefono: “Ne ĝenu vin, mi jam havas la balailon en la mano, mi unue venis al la butiko kaj bone balais la trotuaron por esti vidata de la patrinoj de miaj samklasanoj, sed kiam ili preterpasos mi revenos tien kun la balailo en la mano por ke ĉiuj vidu min, fiera pri tio, ke de nun mi gajnos monon por vivi.”

# Enhavo

Komuniko de la redaktoroj . . . . .	5
Biografio . . . . .	7
Prefaco . . . . .	11
Antaŭparolo . . . . .	17
Ĉapitro 1 - La homo estas historia subjekto kaj biologia objekto . . . . .	21
Politiko kaj ĉiutaga vivo . . . . .	23
En la studo pri personeco . . . . .	24
Kiel ni povas kompreni la rilaton inter individuo kaj historio . . . . .	26
La kerno de individueco ĉefe konsistas . . . . .	26
Reala povo kaj ebla povo rilate al la kvalito kaj kurso de la vivo . . . . .	26
Nia ĉiutaga vivo . . . . .	27
La ŝanĝo de la medio nepre venas antaŭ la ŝanĝo de la subjekto . . . . .	27
Volo de ŝanĝo kaj iloj por ŝanĝi . . . . .	28
Kiel disvolviĝas homa personeco? . . . . .	28
Volo ŝanĝi . . . . .	29
Homa interagado neniam estas neŭtrala . . . . .	29
La historia valoro de homa vivo . . . . .	29
En la kampo de feliĉo . . . . .	29
Ĉu la homo vivas nur per racio? . . . . .	30
La homa specio diferencas de la bestaj specioj . . . . .	30
La kampo de la instinktoj . . . . .	31
Estas nenio pli neracia ol kontraŭstarigi racion kaj instinktojn . . . . .	31
Ni ŝanĝiĝu hodiaŭ por la feliĉo de hodiaŭ kaj morgaŭ . . . . .	31
Kiel vi, ankaŭ mi okupiĝas pri historio . . . . .	33
Ĉapitro 2 - Ni malkoloniigu nian ĉiutagan vivon . . . . .	35
La malkoloniigo de la ĉiutaga vivo . . . . .	37
Esti esence partizanoj . . . . .	37

Ni ĉiuj estas plentempaj sociaj laboristoj...	37
Konsciaj sociaj laboristoj...	37
La historio de ĉiu individuo ĝis nun vivinta...	37
Ĉu agi en la teatro de vivo, aŭ vivi en historio?	38
Kiu el ni povas aserti...	38
Enhejmaj arestoj	39
La esprimo de si mem kaj de siaj bezonoj helpo kiel koloniigo.	39
Helpo kiel koloniigo	39
Feliĉo estas historie determinata: hodiaŭ ĝi inkluzivas lukton.	40
Feliĉo estas plejparte ligita...	40
Ni estas ĉirkaŭitaj...	40
Bonas feliĉo...	41
Kiu nutras la ĝojon vivi?	41
Aŭstereco kaj feliĉo	41
Ĝojo estas socia produkto, kiu devas esti socie reinvestita...	42
La misrezono de hedonismo	42
Proleta solidareco kaj kristana kompato	42
Ĝis kiom oni rajtas esti implikita en la sufero de aliaj?	43
La perforto de kutimo	43
Kontraŭ ĝentileco	43
La etiketo plenumas la funkcion...	44
La scivolemo de aliaj...	44
Ni liberigu la liberan tempon!	45
Kapabli diri ne por povi diri jes	45
Lasu tempon al tempo	46
La dubo kiel valoro	46
Ĉu optimismo aŭ pesimismo?	46
La regado de misuzo	46
Fantazio ĉiam estis konsiderata...	47
La parolo: nemalhavebla armilo por klasbatalo.	47
La parolo kiel demonstrado anstataŭ ol kiel komunikado.	48
La parolo ne nur preparas la agon...	48
Silentigi...	48
Aŭskulti kaj esti aŭskultata.	49
Tre profunda memrespekto...	50
Multaj malestime eldiras la frazon "paroli per sloganoj"...	50
Tuj, kiuj ne sukcesis atingi...	51
Spontaneco kaj spontaneismo	51
La mortaj tempoj de la tago mortigas la evoluon de la vivo	52
Renkontiĝi por manĝi aŭ por komuniki?	52
La akiro de personaj kapabloj...	52



La sola maniero, kiu ebligas disvolvi... ..	53
Lerneja sukceso ne indikas la kontentigan kreskon.....	53
Perdota havaĵo, savota vivo .....	54
Ĉu temas pri preceptema kaj subprema moralo.....	54
<b>Ĉapitro 3 - Ĉiutaga subpremo, ĉiutaga liberigo. Povaj rilatoj en la familio ..</b>	<b>55</b>
La infano naskiĝas kun la senkondiĉa reflekso.....	57
La bezono ne subpremi infanan scivolemon. ....	58
La infano kiu alfrontas la vivon... ..	58
La povo de la plenkreskulo super la novnaskita infano.....	59
La novnaskito kiel tia apartenas al la homa specio.....	59
Sed kiu respektas la infanojn? .....	59
Nek fabeloj nek legendoj, sed la kapablo interagi.....	59
La korinklinoj de la infano. ....	60
La rilato infano-plenkreskulo.....	60
Honoru vian patron kaj patrinon! Kiu honoros la filon? .....	61
Reciprokeco de la eduka rilato gepatroj-infanoj .....	61
Juna burĝo kaj privilegio .....	62
La privata proprieto de la infanoj. ....	63
Kiam infanoj, kiam junuloj pensas pri amo.....	64
Kiu povas vere ami la vivon? .....	65
Tro longa gepatrado kiel sencerebrig-agado .....	66
En ajna aĝo de vivo... ..	70
Oni neniam estas plenkreskulo unufoje por ĉiam.....	71
Homa kresko .....	71
Plurfamilia kunlaboro .....	71
Plurfamiliaj mikrokolektivoj kaj politikaj kolektivoj .....	72
Por ni malferma familio signifas.....	73
Neniam zorgu pri ne esti amataj... ..	73
Neposedema amo aperas al multaj kiel malhavo.....	73
La blinda amo de la klasika mito.....	73
Mi povas krei simfonion... ..	73
Geedzeca ekzaltigo .....	74
Se mi supreniras la turon "Ghirlandina".....	74
Viro kaj virino: renkontiĝo konstruota. ....	74
Vireco kaj virineco. ....	75
La kvalito de la rilato. ....	75
La konservado de la specio. ....	76
La seksa ago ne povas esti fonto.....	76
Nomi panon la pano kaj vinon la vino. ....	77
Ni kompatigas feroce kondiĉitan hundon... ..	77
La burĝa virino... ..	77

Ne plu esti juna . . . . .	78
La aĝoj de la vivo . . . . .	79
Proponu al maljunuloj ripozon anstataŭ devontigon... . . . .	79
Leonardo da Vinci sub belega kapo de maljunulo... . . . .	79
Eĉ en la periodo, en kiu nia individua vivo nun estas finiĝanta... . . . .	80
Se tio, kio finiĝas bone, estas bona... . . . .	80
<b>Ĉapitro 4 - La senraciaj timoj: instrumento de povo super homoj . . . . .</b>	<b>81</b>
Ĉiu civitano kapablas kontribui al sia kaj alies mensa sano... . . . .	83
Neraciaj timoj reprezentas malĝustan formon de lernado... . . . .	83
La neraciaj timoj de plenkreskuloj kaj infanoj . . . . .	83
La asembleo kiel malkondiĉa agento por ĉiuj . . . . .	85
Mutismo kaj surdeco . . . . .	86
Neraciaj timoj kiel ilo por la koloniigo de la infano . . . . .	87
Se 4-jaraĝa infano vidas la diablon, ĉu li estu konsiderata mensmalsana? . . . .	87
Timo de la sekso . . . . .	88
La malpermeso de la deziro... . . . .	88
Eĉ kiam oni kapablis supervenki... . . . .	88
Ne la senkonscio sed la nekonfeseblo . . . . .	88
Ne la senkonscio sed la nekonfeseblo... . . . .	88
Ne la senkonscio sed la nekonfeseblo . . . . .	89
La forto de la racio... . . . .	89
Timo de la peko de penso (1984) . . . . .	89
Timo de la peko de penso (1980) . . . . .	89
La reflekso de orientiĝo kaj esplorado... . . . .	90
La teruro de mensmalsano kiel kaŭzo de mensmalsano... . . . .	90
La timo je soleco, la timo je mensa malsano... . . . .	90
Al kiu utilas, ke oni timu freneziĝi? . . . . .	90
Al kiu utilas ekzameni alies konduton kaj personecon . . . . .	91
Dialektiko de biologio kaj socio en la psikiatria problemo . . . . .	92
Psikozo kiel interplektiĝo de surmetitaj fobioj... . . . .	93

Presita por ILEI de  
Edistudio, Pisa  
en aprilo 2023a

Mendebla per  
[info@edistudio.it](mailto:info@edistudio.it)  
[www.edistudio.it](http://www.edistudio.it)

**Antologio de eseoj  
fare de la kolektivo Antonietta Bernardoni**

**Kun prefaco de  
Ahmad Reza Mamduhi  
Prezidanto de ILEI**

**Eldonita de  
ILEI  
Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**

**Distribuata de  
Edistudio  
[www.edistudio.it](http://www.edistudio.it)**

ISBN 978-2-940665-02-0

